ISSN 2819-4861

Gonçalo Neves


Julian Modest

LITERATURA VIVO

Numero 007 Januaro 2026

©Monthly Published by John Huang & Erika Godo in Mississauga, Ontario, Canada

Enhavo

Vortoj al la legantoj *(Erika Godó; John Huang)* 4

Literatura Vivo *(Erika Godó)* 5

Intervjuo kun Julian Modest *(Erika Godó)* 6

Sinjoro Dukov kaj la pupo *(Julian Modest)* 8

Kristnaska nokto *(Erika Godó)* 11

Viktimo *(Laimundas Abromas)* 12

Intervjuo kun Gonçalo Neves *(Erika Godó)* 14

Lavistino fonta *(Gonçalo Neves)* 17

Kie vi tenis mian manon *(Tamás Medek;* tradu.: *Erika Godó)* 19

KRISTNASKO *(Endre ADY , trad.: Miklós Pál Gajdos)* 20

Malgranda Kristnaska kanto *(Endre ADY , trad.: Miklós Pál Gajdos)* 20

Poetoj *(Erika Godó)* 24

Mago *(2) (Elena Popova)* 25

Hajkoj *(Светлана Коняшова)* 32

LETEROJ EL LA KOSMO *(Elena Popova)* 33

Momento *(Maria Nazaré Laroca)* 36

La vojaĝanto *(Johannes "Johano" Genberg)* 37

Hej, Kristnasko, Kristnasko... *(Elżbieta Wolak; Ryszarda Kwiatkowska)* 38

Vento orienta Vento okcidenta (8) *(Pearl S Buck* trad.: *Detlef Karthaus)* 39

Letereto de poeto al poeto *(Blazio Vaha)* 44

INFANKANTO *(Li Weilun)* 45

AŬTUNA EKSKURSO *(Li Weilun)* 46

Jaga (9) *(Sergei Isakov; Aŭtoro:; Maksim Boĉkarev)* 47

LA ĜOJA MEMORO *(Vullnet Mato;* trad.: *Bardhyl Adem Selimi)*... 50

Vi .... *(Lilaketo)* 52

Forpasis... *(Lilaketo)* 53

Decembra nokto *(Jadranka Miric)* 55

Naskiĝis Amo! *(Stanislao M Esposito)* 56

KRISTNASKA BENO *(Elena Popova)* 57

KRISTNASKAJ RENKONTIĜOJ *(Elena Popova)* 58

La memoro de la lumo *(Stanislao M Esposito)* 60

La Suno Brilas *(Christopher Lee Scoville)* 62

LUNDO HORARO *(Su Fidler Cowling)* 63
Antaŭ la spegulo *(Angel Arquillos)* 67
LA BURĜONAĜO DE FRAŬLINO JOHANA BRODI
DE MURIEL SPARK (1) *(Muriel Spark* trad.: *Detlef Karthaus)* 68
La Preĝejeto *(Claude PROUVOST* trad.: *Roland Platteau)* 76
Malĝoja Kristnasko *(Erika Godó)* 78
Neĝas *(Rudina Muharremi Beja;* Trad. : *Bardhyl Adem Selimi)* 79
La tago kiun mi malkovris ke Pačjo Kristnasko estis vera *(Karlo Germany)* 81
Kristnasko *(Elizabeta Tuboly)* 83
NOVONTOLOGISMO *(Akrila Lordo)* 84
Vintro *(Jadranka Miric)* 88
Sen kunulo mi *(Elizabeta Tuboly)* 89
Advento *(Yi Qiao)* 90
MI TIMAS (*anonimulo* trad. *Ardo*)... 91
Rakonto de la urbeto *(Zhuang Nu;* Trad.: *Trezoro Huang Yinbao)* 92
Propagandisto Hongo *(Ĉielismo)* 93
Laborkanto *(anonimulo* Trad.: *John Huang)* 96
D-ro L.L. Zamenhof *(Miguelángel Bueno Ávila)* 97
Ho, nia kara Zamenhof *(Henriel Fidilalao)* 98
Ario de juneco *(Yin Jiaxin)* 99
Flegistino kaj almozulo *(Yin Jiaxin)* 105
PAPERFLOROJ *(Yohanes Manhitu)* 107
La Sorto de Aina *(Ranja Zafinifotsy)* 108
Propono de la maljuna majstro *(Miaohui)* 113
Malgranda Stacidomo *(Wang Zhengyue trad.: Miaohui)* 114
Kunkoriĝu ni ĉe maro sub ĉielo *(Shu Nan; trad.: Lu Jixin)* 116
La lumeto *(trad.: Lu Jixin)* 117
La graveco de la vojaĝo *(Etienne LUHEKA)* 118
Haŭlista Laborkanto de Jangzio *(He Weijia; Trad.: Batalanto)* 119
Amindumo inter Geamantoj *(He Weijia; Trad.: Batalanto)* 120
Flor' Unika, Freŝe Freŝe Brilas *(He Weijia; Trad.: Batalanto)* 121
Birdo kaj mi *(Gajo)* 122
Bovpaŝtisto kaj Teksistino *(Arbsemo)* 123
Al la lumo tra bataloj *(Kelly Muteke)* 125
Decembro, la lasta spiro *(Jeroubbesheth Banyanga)* 126
En Profunda Nokto, la Paŝoj de Flegistino *(Orpaco)* 127
Momenteto *(Luo Shuigen)* 128
La Ĝenoj de Kabi (1) *(Viktoria)* 131
Rezultoj de la 15-a literatura konkurso 133
Rakonto de Georgo *(John Huang)* 135
Taglibro de Pipi *(Pipi)* 136
Internacia Traduk-Konkurso "Vejdo" *(2026)* 141

Karaj legantoj!
Dum la kristnaskaj
lumoj iluminadas la
mallumajn vintrajn
vesperojn, la vortoj ankaŭ
kapablas alporti varmecon
kaj esperon al niaj koroj.
Ĉi tiu periodo donas al ni la eblon
haltigi nin dum momento kaj taksi
ĉion, kion la literaturo ofertas al ni:
la magion de rakontoj, la lirikon de
poemoj kaj la profundon de pensoj.
Dum Kristnasko, ni memoru, ke amo
kaj empatio estas la plej belaj donacoj,
kiujn ni povas doni unu al la alia.
La potenco de literaturo kuŝas en la fakto, ke
ĝi kunligas nin, donante al ni la eblon sperti la
vivon de aliaj kaj kompreni la komunan homan senton.
Sur la sojlo de la nova jaro, ni rigardu antaŭen,
plenaj de espero kaj novaj eblecoj.
Estu la nova jaro plena je inspiraj legadoj, kreivaj
skribaĵoj kaj malkovroj, kiuj riĉigas nian vivon.
Ni deziras, ke ĉiu trovu sian propran voĉon kaj havu la
kuraĝon revoji, ĉar la potenco de vortoj estas senlima.
Pacon kaj ĝojan novjaron al ĉiuj!

Ĝuu la legadon!
Kun amikecaj salutoj,



En la paĝoj de revuoj, la vortoj floras.
Kreante mondojn, kie la imagoj loĝas.
Literatura Vivo, voĉo de la literaturo.
Ĝi kombinas pensojn, en arto sen cenzuro.

Poemoj kaj rakontoj, en la lumo brilas.
Kreaĵo flugas, la mensoj flugas.
De klasikaj voĉoj ĝis novaj sonoj.
Ĉiu vorto pulsas, en la koroj de homoj.

Revuo de kulturo, kun spirito vivas.
En la mondo de literaturo, ni ĉiuj dividas.
Literatura Vivo, nia inspiro, nia futuro.
Kuniĝu kun ni, en la vojaĝo de la literaturo.

LITERATURA VIVO

Erika Godó

Intervjuo kun Julian Modest



Erika Godó

1, Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?
Jam de mia infaneco mi tre ŝatis legi kaj la legado de libroj instigis min interesiĝi pri literaturo.

2, Kiam vi verkis vian unuan novelon aŭ romanojn?
Mi verkis mian unuan bulgarlingvan versaĵon kiam mi estis dekjara kaj mian unuan bulgarlingvan novelon, kiam mi estis dekkvinjara. Mi verkis miajn unuajn Esperanto-novelojn, kiam mi ekloĝis en Hungario en 1979. Tiam en 1980 mi verkis mian unuan Esperanto-romanon „La Ora Pozidono", kiun eldonis Hungara Esperanto_Asocio en 1984.

3, Kio estas la fonto de via inspiro por verki novelojn aŭ romanojn?
La ĉefa fonto de mia inspiro estas la ĉiutaga vivo.

4, Ĉu laŭ via opinio viaj verkoj apartenas al iu literatura skolo?
Miaj verkoj ne apartenas al literatura skolo.

5, Ĉu vi iam tradukis literaturaĵojn el naciaj lingvoj en Esperanton aŭ inverse? Se jes, ĉu vi povus doni kelkajn ekzemplojn?
Mi tradukis poemojn el bulgara lingvo en Esperanton. Tiuj ĉi miaj tradukoj aperis en revuo „Bulgara Esperantisto", kies redaktoro mi estas. Mi tradukis hungarajn rakontojn en bulgaran lingvon de Istvan Orkeny, de Gyorgy Moldova kaj de aliaj verkistoj, kiuj aperis en diversaj bulgaraj ĵurnaloj.

6, Kion signifas literaturo por vi?
La literaturo por mi estas la vivo.

7, Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?
Mi amas esplori sociajn kaj etikajn temojn, la vivproblemojn de la ordinaraj homoj.

8, Kion vi memoros pri via tempo en Budapeŝto, kaj kiel ĝi influas vian verkadon?
Mia loĝado en Budapeŝto estis tre grava por mi. Ĝi forte influis mian Esperantan verkadon. En Budapeŝto mi konatiĝis kaj amikiĝis kun elstaraj hungaraj esperantistoj: Vilmos Benczik, Marton Fejes, Imre Szabo, Peter Rados kaj kun multaj aliaj. Ili instigis min verki. En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento en Budapeŝto estis tre vigla kultura Esperanta vivo.

9, Kiaj interagoj kun aliaj Esperantistaj verkistoj havis la plej grandan efikon sur vi?
La plej granda efiko sur mi estis la interago kun la elstara Esperanta poeto William Auld.

10, Ĉu vi partoprenis literaturajn konkursojn kaj gajnis premion iam?
Mi ne kutimas partopreni en literaturaj konkursoj. Mi partoprenis nur en la Esperanta konkurso Floraj Ludoj, en kiu mi gajnis premion.

11.Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?
Mi planas daŭrigi la verkadon de Esperantaj noveloj kaj romanoj.

12, Kion vi volus diri al legantoj de Literatura Vivo?
Al la legantoj de la alloga revuo Literatura Vivo mi deziras diri, ke ili ne ĉesu legi. La legado riĉigas ilin anime, malfermas antaŭ ili novajn miraklajn mondojn. ◆





Sinjoro Dukov kaj la pupo



Julian Modest

Ĉio komenciĝis en varma julia posttagmezo. Sinjoro Dukov rapidis hejmen. Li ŝvitis, lia kapo doloris kaj li planis reveninte hejmen, tuj senvestiĝi kaj eniri la banejon, kie la friska akvo freŝigos lin.

Li iris sur la strato, sed io igis lin halti kaj alrigardi la vitrinon de la vendejo, preter kiu li pasis. Estis malgranda vitrino de antikvaĵvendejo. Ordinare en la vitrinoj de aliaj antikvaĵvendejoj estis sennombraj aĵoj: malnovaj libroj, vazoj, pentraĵoj, muzikinstrumentoj, kandelingoj, sed en tiu ĉi vitrino staris nur unu infana pupo kaj verŝajne ĝi vekis la atenton de sinjoro Dukov. Li haltis por pli bone trarigardi la pupon. Ĝis nun li neniam interesiĝis pri pupoj. Li havis nek infanojn, nek nepojn.

Kiam li estis knabo, li ludis per ludiloj por knaboj: ligna pafilo, infana kamioneto, infana pafarko. Pli ĝuste li havis iajn ludilojn, sed malofte li ludis per ili. Lia patro, serioza, severa viro, ne permesis al li ludi. La patro instruis lin legi jam en la frua infaneco, aĉetis por li librojn, kiujn sinjoro Dukov devis diligente legi kaj poste rakonti al la patro. Tiel lia infaneco pasis en librolegado kaj li ne memoris ĉu li havis ŝatatan ludilon aŭ ne.

Nun sinjoro Dukov atente rigardis la pupon, kiu estis alta ĉirkaŭ kvindek centimetrojn kun blonda hararo, mola kiel silko, helverdaj okuloj kaj kun longa blua robo, kies ŝtofo iom brilis. La glata vizaĝo de la pupo eligis karecon kaj al sinjoro Dukov ŝajnis, ke la pupo ridetas. Ĝiaj teneraj lipoj estis iom malfermitaj kaj videblis la dentoj kiel etaj perloj. Sur la dekstra brako de la pupo estis etikedo kun surskribo “Sonja”, verŝajne ĝia nomo.

Kelkajn minutojn sinjoro Dukov staris senmova antaŭ la vitrino kaj ne povis klarigi al si mem kial tiel atente li observas tiun ĉi pupon. Li eĉ ironie nomis sin gapulo. Fin-fine li turnis sin por ekiri, sed tuj denove haltis. Ŝajne la pupo okulsignis al li. Sinjoro Dukov ekridetis. “Eble mi suferis sunfrapon aŭ mi fartas malbone – meditis li.” Tamen li alrigardis la pupon. Ne. Ne eblis. La pupo estis senmova. Li ekiris kaj la pupo denove okulsignis. Nun sinjoro Dukov tre bone vidis, ke ĝi okulsignis per sia dekstra okulo kaj tio tute ne estis dubinda. Sinjoro Dukov meditis. Plej verŝajne en la pupo estas iu meĥanismo per kiu de tempo al tempo ĝi okulsignas. Tio tiklis la scivolon kaj li decidis eniri la vendejon kaj pli detale trarigardi la pupon. Li malfermis la pordon kaj enpaŝis en obskuran ejon, kie sur la bretoj videblis diversaj bagatelaĵoj. Kvazaŭ neniu estis ene, sed subite de iu angulo aperis malalta blankhara oldulo, kiu afable salutis lin:

– Bonan tagon sinjoro. Kion vi bonvolos?

Dukov ne povis tuj diri kion li deziras kaj nur demandis:

– Ĉu eblas, ke mi vidu la pupon, kiu estas en la vitrino.

– Kompreneble – respondis la oldulo kaj facilmove proksimiĝis al la vitrino por preni la pupon.

– Tiu ĉi pupo – diris li – estas unika. Oni faris ĝin en Germanio, en la kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento dum la milito. Ĝi prononcas “panjo” kaj havas nomon “Sonja” – kaj la oldulo montris la etikedon sur ĝia brako. Poste li iom klinis la pupon kaj ĝi sible prononcis “panjon”.

– Ĉu la pupo okulsignas? – demandis Dukov.

La oldulo alrigardis lin embarasite.

– Kion vi diras – ne komprenis li.

– Ĉu ĝi okulsignas? – ripetis Dukov.

– Ne. Tute ne – respondis la vendisto. – Tio estas pupo, ne homo kaj ĝi ne povas okulsigni.

– Kiam mi estis ekstere, antaŭ la vitrino, mi tre bone vidis, ke ĝi okulsignas – diris Dukov.

La oldulo rigardis lin mirigite kaj verŝajne opiniis, ke Dukov estas mensmalsana. Eĉ en liaj grizaj okuletoj aperis timo. Por montri al la vendisto, ke li estas tute normala, Dukov demandis lin kial nur la pupo estas en la vitrino.

– Mi devas rapide vendi ĝin – respondis la oldulo. – Mi promesis al konata familio nepre vendi ĝin kaj tial nur ĝi estas en la vitrino.

– Kiom ĝi kostas? – demandis Dukov.

La oldulo diris la prezon kaj Dukov nevole fajfis.

– Ĉu tiom multekosta?

– Ja, mi diris al vi, ke ĝi estas unika. Delonge jam ne estas tiaj pupoj. Verŝajne en la tuta mondo estas nur tri aŭ kvar similaj…

– Dankon. Vi tre afablis. Ĝis revido – diris Dukov kaj rapide eliris el la vendejo.

Li revenis hejmen kaj kiel li planis, tuj eniris la banejon kaj bone freŝigis sin. Poste li sidis en la ĉambro kaj trafoliumis la ĵurnalon, kiun li alportis. Kiam la suno komencis subiri, Dukov eliris el la domo por iom promenadi. En la proksima parko li sidis sur benko sub la ombro de malnova akacio.

Dukov loĝis sola. Li ne havis familion. Kiam li estis juna li ne edziĝis. Poste li bedaŭris, sed iom post iom alkutimiĝis al la soleco. Lia tagordo estis preciza kaj neniu maltrankviligis lin. Dum li estis en la parko, li forgesis la pupon. Vespere li revenis hejmen, spektis iom la televiziajn novaĵojn kaj poste ekdormis. Kutime li rapide ekdormiĝis. Tamen ĉi nokte li sonĝis la pupon, kiu denove okulsignis al li. Dukov vekiĝis kaj ĝis la mateno li ne povis ekdormi.

Tutan tagon li meditis pri la pupo, ne povis ion alian fari kaj tute ne eblis liberiĝi de ĝi. Tri noktojn li sonĝis ĝin. La kvaran tagon li iris en la vendejon kaj aĉetis la pupon. La oldulo kun la grizaj okuletoj estis senlime feliĉa kaj ne ĉesis paroli dum pakis la pupon.

– Sinjoro, vi aĉetis unikan pupon. La mono, kiun vi donis, ne estis vana. Via nepino ege, ege ĝojos.

Dukov prenis la pupon kaj rapidis hejmen por ke lin ne renkontu iu konato, kiu priridos lin. Hejme Dukov metis la pupon sur la komodo ĉe la televidilo kaj provis forgesi ĝin, sed de tiu ĉi momento lia vivo ŝanĝiĝis.

Kiam li estis hejme, la pupo ridetis kaj okulsignis al li, sed ofte li forestis kaj kiam revenis la pupo rigardis lin malafable kaj kolere. En la unuaj tagoj Dukov opiniis, ke tiel ŝajnas al li, sed poste konvinkiĝis, ke ne eraras. Li eĉ sentis, ke la pupo parolas al li. Ĝi parolis senvoĉe kaj sen vortoj, sed li komprenis ĉion. La pupo rakontis, ke ĝin posedis multaj knabinoj kaj ĝi loĝis en diversaj familioj, iuj el ili tre riĉaj. La homoj estis bonaj kaj malbonaj. La plej interesa estis la historio pri iu familio, en kiu la patro de la knabino mortis. La viro, al kiu edziniĝis la patrino, ne amis la knabinon kaj foje-foje vangofrapsi ŝin. La pupo decidis doni al li bonan lecionon. Foje, kiam la patro vangofrapis la knabinon, la pupo alrigardis lin kaj lia dekstra brako ekpendis senmova. Tutan semajnon li ne povis teni kaj la kuleron, kaj la forkon kaj li ne komprenis kia estas la kialo, sed plu li ne vangofrapis la knabinon.

Dukov demandis sin ĉu la pupo havas riĉan fantazion aŭ li mem subkonscie elpensas tiujn ĉi historiojn. De tago al tago li iĝis pli embarasita kaj pli embarasita, kaj ne sciis ĉu li sonĝas, deliras aŭ ĉio estas reala.

Foje li decidis veturi al la maro por unu semajna ripozo. Kiam li prepars sin por la veturado, la pupo rigardis lin kolere. Li ŝajnigis, ke ne rimarkas ĝin.

Kiam post semajno li revenis, la pupo ne estis hejme. Dukov ne povis kompreni kiel ĝi malaperis. Li serĉis ĝin en la tuta loĝejo, sub la skribotablo, sub la lito, sed nenie trovis ĝin. De tiu ĉi tago li ĉagreniĝis. Ja, li perdis sian la plej karan amikon. ◆

Kristnaska nokto

Erika Godó

Kristnaska nokto briligas stelon,
varmo kaj amo lumigas la belon.
Vico de donacoj sub pinarbo,
infanaj okuloj brilas kiel arbo.
Neĝflokoj dancas en la silento,
flugiloj de anĝeloj flugas en vento.
La lumo de kandeloj mallaŭte flagras,
la magio de Kristnasko ĉie brilas.

Familioj kune, mano en mano,
en koroj espero, paco kaj amo.
La odoro de dolĉaj kukoj venas,
ĉiu miraklo de Kristnasko ni ĝuas.
Tintanta sono flugas malproksimen,
lumo de steloj gvidas nin proksimen.
Espero kaj ĝojo brilas en okuloj,
ĉar Kristnasko estas tempo de mirakloj

Viktimo

Laimundas Abromas

Hieraŭ neatendite mi renkontis surstrate Andreon, instruiston de muziko kaj iaman aktivulon de esperantista movado. Nun li ne plu aktivas en Esperanto agado kaj evitas renkonti la esperantistojn.

-Saluton, Andreo! Jam delonge ni ne vidis unu la alian, - mi diris al li, akompanante perokule la belajn gambojn de preteriranta fraŭlino. – Ni eniru apudan bierejon, trinku po bokalo da malvarma biero, interparolu iomete.

-Senhontulo! – respondis Andreo. – Verdire, tiuj gamboj senhonte belas kaj allogas, tamen ĉu indas postiri ĉiujn... Nu, kiel vi fartas?

-Mi malsanetas. Mi sentas, ke mi baldaŭ mortos, - mi respondis zorgoplene.

-Mi ĝojas. Tiel decas, -parolis li. – Kaj kie vi laboras nun? Ĉu en tiu sama oficejo?

-Vi ĉesu! Preskaŭ ĉiujare mi ŝanĝas laborlokon. Mi ne ŝatas porlonge resti en tiu sama oficejo. Mi enuas, - parolis mi kun defio.

-Tio bonas, ke vi ne vagabondas. Bravulo! Kaj kiel fartas via edzineto?

-Ni divorcis. Ni ne sukcesis kunvivi en la konkordo.

-Tre agrablas aŭdi. Via edzineto estas oro. Kaj kiel fartas viaj infanoj?

-Dankon al dio, ke ni ne havis infanojn. Unue, - kaj mi fleksis unu fingron,- mi devus pagi monon por vivteni la infanon, kaj due, - mi fleksis alian fingron, - la infano kreskus sen patro kaj tio kaŭzus por infano edukan traŭmon. Al diablo, ĉu mi bezonas tion?

-Kion vi diras?! – ekmiris Andreo. – Eĉ ĝemelojn vi havas! Mi gratulas vin! Kaj kiel fartas via Esperanto? Ĉu vi aktivas en la movado?

-Nu, jes. Esperantista movado furoras kaj mi fosas mian sulkon. Ĵus mi eldonis libron de miaj humuraĵoj, -fanfaronis mi.

-Ĉu mi ne diris al vi ,ke ĉiuj priridas esperantistojn. Esperanto estas senutila, -parolis Andreo.

Mi ekrigardis Andreon strabe. Ĉu li , satano, primokas min?

-Tamen, - refoje mi demandis, - kion ni faros kun tiu biero? Ĉu vi ne volas?

-Jes, -digne kapjesis li, - nun mi iras al ĵaza koncerto. Ĉu ni iru kune? Mi havas superfluan bileton.

-Mi ne havas tempon, - respondis mensoge mi, ĉar mi ne ŝatas ĵazan muzikon.

-Vere! Tian koncerton indas ekaŭdi. Ni iru, ĉar ni malfruos.

-Ĉu vi surdiĝis?! –mi ekkriis, ĉar subite komprenis, ke Andreo ne aŭdas. –Vi parolas diversajn sensencaĵojn kiel ebria. Vi lavu viajn orelojn!

-Vere, oni bone ludas, - respondis Andreo. – Supera klaso! Ni iru.

- Atendu!.. –mi ektuŝis lin je ŝultro, elpoŝigis skribilon kaj notlibreton. –„Aŭskultu, -skribis mi, - ĉu vi ne aŭdas?“

-Jes, vere. Mi iom malbone aŭdas, - traleginte konfirmis Andreo.

-Cent diabloj, nur iomete! Do, kiel vi aŭskultos kaj aŭdos koncerton?, - mi prezentis tiun demandon skribe.

-Kion fari? Nun ĉiu muzikista ensemblo posedas tiajn fortajn amplifilojn, tiel forte kaj laŭte ludas, pro tio mi iom surdiĝis. Do, ni iru, mi jam malfruas.

-Mi ne iros kun vi. Ne, - mi kapneis kaj svingis permane.

-Kiel vi volas, - respondis li kaj, rigardinte surmanan horloĝon, ekkuris trans la straton kaj apenaŭ ne trafis sub la aŭton. Ekhurlis la aŭtomobila bremso kaj el aŭtomobila fenestreto ŝoviĝis grandega pugno kiel martelego.

-Hej, ci! Ĉu vi blindas aŭ surdas?!, - ekkriis kolere stiristo.

-Saluton, - respondis Andreo. – Tamen mi ne memoras vin.

-Mi tuj memorigos al vi, sentaŭgulo!- kaj stiristo elaŭtiĝis. – Ĉu vi volas, ke mi trafu pro vi en prizonon?! Mi tuj veturigos vin al policejo.

-Mi tre dankas, -ekridis Andreo. –Mi mem iros, jam ne malproksimas. Eble vi volas aŭskulti koncerton? Mi havas superfluan bileton. Kvankam mi ne memoras vin. Ĉu vi estas bofilo de mia najbaro Staseo?

-Mi montros al vi tiujn koncertojn kaj bofilojn de via najbaro, ke vi viajn dentojn ne sukcesos kolekti! –furiozis stiristo.

-Mi rigardas vin kaj, al mi ŝajnas, ke vi estas ie vidita. Transdonu bondezirojn al via bopatrino! – diris Andreo kaj, svingante permane al stiristo adiaŭe, fetorigis ĉirkaŭe aeron kaj foriris sian vojon.

Kvankam la stiristo jam tenis enmane bastonon, tamen li ne postkuris Andreon. Li nur kraĉis, turnante montran fingron ĉe tempio, kaj blasfemante forveturis.

Do, ekde tiu tempo mi jam ne plu vizitas estradajn kaj ĵazajn koncertojn, ĉar mi ne volas perdi mian aŭdkapablon kaj ne volas iĝi la viktimo de moderna muziko. ◆

Intervjuo kun Gonçalo Neves

Erika Godó

1. Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Nu, instigoj estis pluraj. Unuflanke, mi, feliĉulo, ĉiam loĝis en libroplena hejmo. Legemon kaj verkemon mi evidente heredis de mia patro kaj de mia patra avo. Mia avo estis ĵurnalisto kaj verkisto. Mi bone memoras lin: li ĉiam sidis ĉe sia tajpilo kaj senĉese frapis la klavojn. Mi rigardis lin, fascinate. Plia instigo venis el la lernejo. Estis tie devigaj legaĵoj: portugalaj klasikuloj. Tio estis nur devo por iuj, sed kreskanta plezuro por mi. Fakte, mi ŝatis ekkoni vortojn kaj dirmanierojn, kiujn mi renkontis en la ordinara vivo nur malofte, aŭ eĉ neniam. Mi ofte konsultis mian patron pri la signifoj, sed mi ŝatis ankaŭ traserĉi dikajn vortarojn.

2. Kio estas la fonto de via inspiro por verki rakontojn aŭ poemojn?

Inspiron por verki rakontojn kaj poemojn mi trovas preskaŭ ĉie. Pri poeta inspiro mi eĉ verkis la poemon “Poeteco”, kiu aperis en la kolekto Simptomoj, ĉe FEL en 1999 (poste aperis islandigo en islanda gazeto, fare de Baldur Ragnarsson). En ĝi mi skribis i.a. jenon: “poemo estas nur pluko kaj senŝeligo”; “majstroverko rezultas nur el fortuno / de oreloj strečaj kaj atentaj fingroj“; “Poeto estas nur kaptanto de vibroj, / plibeliganto de svagaj ŝvebaj voĉoj, / enmondiganto de verkoj jam iamaj antaŭ malkovriĝo”. Tiel mi verkas: mi rigardas, observas, kontemplas, aŭskultas. Eĉ vorto kaptita el apuda konversacio en restoracio povas esti fonto de inspiro. Jam okazis, dum grupa manĝo en restoracio, ke mi prenis skribilon kaj paperan buŝtukon, forlasis la ejon por kelkaj minutoj kaj verkis poemon sur la papero. Poste tiu poemo aperis en la kolekto Ibere libere (1993).

3. Kiel la partopreno en Belartaj Konkursoj de UEA formis vian karieron? Kion vi lernis el tiuj konkursoj?

Mia partopreno kaj premiiĝo en la Belartaj Konkursoj de UEA – kaj ankaŭ en la Internaciaj Floraj Ludoj – estis evidente granda stimulo por plua verkado. Unuafoje mi premiiĝis en 1991, kiam mi estis 27-jara. Tiam oni aljuĝis al mi la premion “Nova Talento”, kio ege kortuŝis min. La nomon de ĉiu nova gajninto de tiu premio oni kutime ĉizas sur samnoma pokalo, kaj UEA sendis al mi pakon da verdaj poŝtkartoj, sur kies bildo videblis la pokalo. Tamen mi ne emis elmontri min kaj dissendis nur malmultajn poŝtkartojn al miaj korespondantoj; tial mi ankoraŭ havas 10 ekzemplerojn, post 34 jaroj. El la konkursoj mi lernis precipe, ke ne sufiĉas “inspiro” kaj “talento”: necesas ankaŭ disciplino, pacienco kaj volforto por doni formon al ŝajne bona ideo kaj poluri la tekston. Instrua estis ankaŭ la fakto, ke ne ĉiuj miaj sendaĵoj premiiĝis. Tiel oni lernas ekkoni siajn limojn, esti pli modesta kaj respekti la ceterajn konkursantojn.

4. Vi estas membro de la Ibera Skolo, ĉu vi povus prezenti al ni ĉi tiun skolon?

Mi ne scias, kie kaj kiel estiĝis la nomo “Ibera Skolo”. En la komenco, ni estis nur grupeto da amikoj, kiuj amis Esperanton kaj literaturon, precipe poezion. Nin ligis nur tiu amo al la lingvo kaj ankaŭ nia amikeco, kiu rezultis el ĝi. Okazis evidente ankaŭ interinspiro kaj interfluo. Tamen nur tio nin ligis. Ni ne intencis fondi “skolon”, kaj fakte ni ĝin formale ne fondis. Kial tiu nomo estiĝis?

Ŝajne nur tial, ke ni ĉiuj loĝis sur la t. n. Iberia Duoninsulo (la komenca kerno konsistis el tri hispanoj kaj unu portugalo), kaj eble ankaŭ pro la titolo de nia unua komuna verko, la poemaro Ibere libere. Nia intenco estis nur venki la marasmon kaj prezenti verkojn, kie neniu temo kaj neniu stilo estus malpermesita aŭ nerekomendinda, do verki tute libere kaj kultivi liberon verke.

5. Kian influon laŭ vi la skolo havas sur la esperanta literaturo?

Laŭ mia scio, la Ibera Grupo ne influis rekte la disvolviĝon de la esperanta literaturo, kaj ĝi fakte neniam celis tion. Al la komenca kvaropo poste aliĝis aliaj homoj kun sama aŭ simila aliro al la esperanta kulturo kaj literaturo. Tamen temis ne pri formalaj "aliĝoj", sed pri simplaj alproksimiĝoj, kiuj evidente riĉigis la grupon kaj ĉiun apartan membron. La komenca kvaropo produktis nur du komunajn verkojn, sed poste ĉiu kvaropano enmondigis plurajn volumojn, kaj la origina spirito (kamaradeco, interrespekto kaj plena libero tema kaj stila) daŭras ĝis nun.

6. Kie vi trovas inspiron por viaj propraj verkoj kaj tradukoj? Ĉu estas specifaj lokoj, homoj aŭ eventoj, kiuj motivas vin?

La ĉefa loko, kiu inspiras min, estas la maro. Oktobre de 1991 la UEA-revuo Esperanto intervjuis min sub la titolo "Kiel disŝaŭmiĝas mara ondo". Tie mi aperas sur foto antaŭ mara pejzaĝo. Tiam mi loĝis apud la maro, sed poste la vivo min puŝis al aliaj lokoj kaj pejzaĝoj. Nun, feliĉe, jam de ok jaroj, mi loĝas en alia marurbo, kaj la maro pli kaj pli fariĝas mia inspirfonto. Rigardi la maron, aŭskulti ĝian muĝadon kaj observi la mevojn sur kaj super la plaĝo igas min mediti kaj portas al mi inspiron el mi ne scias kie. Ĉu la versoj, kiujn mi surpaperigas (aŭ, pli malofte, rekte tajpas komputile) jam ekzistas kaj ie ŝvebas, kaj mi nur kaptas ilin, kiam mi kapablas senti tiajn misterajn vibrojn? Mi ne scias. Tamen, nun, sen maro apenaŭ eblus al mi verki.

7. Kial vi elektis Idon kiel vian tradukan lingvon?

Mi ĉiam estis scivola pri Ido, sed longe mi supozis, ke ĝi estas formortinta... ĝis mia unua vizito ĉe Haupenthal en Germanio. Tiam li montris al mi kompletan kolekton de la revuo Progreso, kiu inkluzivis ankaŭ pli freŝdatajn numerojn, do ne nur malnovajn flavaĵojn, kiel mi tiam atendus. Kiam mi demandis mian amikon, ĉu Ido ankoraŭ ekzistas, li respondis – en Ido! – ke ankoraŭ okazas renkontiĝoj. Baldaŭ poste, en 1997 (do dek jarojn, post kiam mi fariĝis esperantisto), mi trovis bonajn Ido-materialojn en interreto, elŝutis ilin, eklernis la lingvon kaj aliĝis al pluraj interretaj forumoj. Baldaŭ post la eklerno mi komencis verki poemojn en Ido – kion mi faras ĝis nun – kaj idigi verkojn, ĉefe el la portugala. Ĝis nun mi verkis kaj publikigis 22 librojn en Ido (el kiuj 10 estas tradukoj) kaj 17 en Esperanto (el kiuj 6 estas tradukoj). Do Ido estas nur unu el miaj du traduklingvoj, paralele al Esperanto. Mi elektis ĝin, ĉar ĝi, same kiel Esperanto, estas lingvo tre fleksebla kaj adaptebla. Per ĝi oni povas verki libere kaj elegante, sen atenci la gramatikon. Ju pli da lingvoj oni uzas verke, des pli bone. Tio estas utila por la cerbo. Mi uzas ankaŭ trian verk- kaj traduk-lingvon, kvankam malpli ofte: Interlingua. Antaŭ multaj jaroj mi verkis ankaŭ tri poemojn en Volapuko, sed mi ne plu okupiĝas pri tiu lingvo. Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro mi konatiĝis kun Uropi, kiun mi eklernis (kaj plu lernas), kaj en kiu mi verkis ĝis nun du poemojn. Kvankam ĝi estas malmulte konata kaj apenaŭ praktikata, ĝi estas eble la plej bona planlingvo ĝis nun aperinta.

8. Kion vi pensas pri la unikeco de Ido kompare kun aliaj lingvoj?

Ido elstaras ĉefe pro sia muzikeco (ĝi estas iaspeca Esperanto kun sukero), precizeco kaj logika vortfarado. Evidente, kiel ĉiu lingvo (natura aŭ planita), ankaŭ ĝi havas siajn limojn kaj minusojn, sed tio nur igas ĝin pli homa, do pli alloga. Se iu iam iel kapablus forĝi "perfektan" lingvon, ĝi certe estus tre teda. Ŝajnas al mi, ke Ido staras (preskaŭ) mezvoje inter la (modera)

skemismo de Esperanto kaj la (modera) naturalismo de Interlingua. Tio ja igas ĝin unika. Evidente, pro tia pozicio, ĝi ankaŭ estas submetata al konstantaj streĉoj inter du polusoj: iuj emas tiri ĝin al la skemisma, aliaj al la naturalisma ekstremo. Tamen tia (malfacila) streĉiteco ankaŭ stimulas ĝian disvolviĝon kaj igas ĝin vigla lingvo, malgraŭ la magra nombro da adeptoj kaj praktikantoj.

9. Kiel vi elektas la verkojn, kiujn vi tradukas?

Nu, ŝajne, kiel ĉiu Esperanto- aŭ Ido-verkisto. Kiam mi legas ion, kio plaĉas al mi, tuj venas en mian kapon la ideo, emo kaj deziro ĝin traduki, por provi transdoni al aliaj homoj la ĝuon, kiun mi mem spertis. Ankaŭ tial, ke traduki ĉiam estas granda defio, kaj defioj certe plaĉas al mi. La tradukmerkato en "Planlingvujo" do funkcias ne kiel en la "ekstera mondo". En ĉi lasta, decidon pri tradukotaj verkoj faras la eldonejoj, surbaze de komercaj kaj merkatikaj kriterioj, kaj poste ili kontraktas tradukistojn por traduki verkojn, kiujn tiuj ne elektis kaj eĉ povas ne (tute) ŝati (tradukistoj ja tradukas por perlabori sian panon). En Planlingvujo, male, elektas kaj decidas la tradukistoj mem, do ili tradukas nur ion, kion ili (tre) ŝatas. Ĉu tiu diferenco speguliĝas en la fina rezulto, en la traduko mem? Estas malfacile respondi kaj kompari, eĉ ĉar en Planlingvujo rolas alia elemento, kiu ordinare mankas en la profesia tradukmerkato: amatoreco.

10, Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Jes, estas multaj tiaj temoj, eĉ tro multaj: defioj de AI kaj de la nunaj teknologioj, komunikado kun aliaj planedanoj kaj estuloj el aliaj eblaj mondoj (nefizikaj), telepatio, teletransporto, novaj metodoj por produkti nutraĵojn, historio de la homa parolkapablo, historio de tradukado kaj interpretado, naturaj kuracmetodoj, studo pri slango kaj fivortoj laŭ sociologiaj kriterioj, konstruado de ekologiaj domoj kaj urboj, ktp.

11. Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

La plej grava afero en la vivo estas libertempo, kiu laŭ mi povas havi du signifojn: libera tempo kaj tempo por liberi, t. e. tempo kiam oni povas fari (nur) tion, kion oni volas, eĉ se tio signifas fari nenion: manko de devigoj, manko de altruditaj taskoj kaj okupoj, manko de farendoj. Kiam oni ĝuas tian libertempon, oni povas diri al si mem matene, tuj post ellitiĝo: mia agendo malplenas, do mi faru ĉion, kion mi volas, aŭ eĉ nenion, kaj mi povos eĉ okupi min intense dum la tuta tago, sed, se mi tion faros, tion decidos nur mia volo kaj plaĉo. Tian liberon mi volas atingi, sed dume ĝi ankoraŭ estas nur revo.

12. Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?

Mi havas multajn projektojn (aŭ, pli ĝuste, embriojn de projektoj), sed mia ĉefa plano nun estas havigi al mi manieron akiri pli da libertempo por povi legi kaj verki libere.

13, Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?

Ili ĝuu la revuon kaj konsciu, ke ĝi ludas gravan rolon por disvolvo de la esperanta literaturo. Ni vivas en tempo, kiam la ŝancoj de iu ajn planlingvo – eĉ de Esperanto, kiu estas la plej granda kaj plej vigla, kun granda distanco al la ceteraj – pli kaj pli ŝrumpas. Kion do eblas fari? Unuflanke, ĝui la (malmultajn) avantaĝojn, kiujn la lingvo ankoraŭ prezentas, kaj aliflanke – kaj precipe – ĝui ĝian perlon, kiu estas la literaturo, originala kaj traduka. Ĝi estas valora, kaj ĝi sufiĉas (eĉ se mankus kongresoj kaj aliaj avantaĝoj) por plu interesiĝi pri la lingvo kaj plu okupiĝi pri ĝi. Sen literaturo, neniu lingvo povas vere vivi kaj disvolviĝi. Do plu legu kaj apogu ĝin, kaj diskonigu ĝin. ◆

Lavistino fonta

Lavistino fonta,
najado fakta kaj reala.

Zefiroj nunaj
vian karnon traktas
disdegne kaj profane.

Via pimpo kruda kaj spontana
ne cedas al rabioj
de aŭroroj misaprecaj.

Koluzias fridoj, frostoj,
viaj manoj hirtas, dronas
en tumulto de bobeloj.
La sinuo viabrusta,
dura kaj aŭtenta,
la sino blanka kaj novala
konkeras tutan frison
el koketoj kaj preciozoj,
superas la dekoltojn
de postiĉoj gelatenaj.

Gonçalo Neves

Lavistino fonta,
majesta ĉe gargaroj:
vian revon vringu,
sternu sur la ŝtonoj,
kaj la suno venu kaj regalu,
kaj komplezu kaj provizu,
kaj alvoku la latentojn
el soporoj kaj somnoloj
de elfoj kaj niksinoj.

En epoko de galopo,
hasto, strečo kaj nervozo,
via tasko gurde frota
garantias la daŭrivon
de legendoj kondamnitaj.

Tamás Medek

Kie vi tenis mian manon

Tradukis: *Erika Godó*

Vin mi serĉadas
Ĉe la pordo, en la seruro;
La paŝoj min ne forgesas
En somero jam forpasinta.

Nun ŝajnas, ke apenaŭ
Mi povus trovi vin ekstere,
Sed kun vi mi vekiĝas,
Se la ŝlosilo denove eksonas.

Nun tie mi ploras,
Kie la Suno ekbrilas,
Kaj preskaŭ mi ne povas stari
Tie, kie paliĝas la matenoj.

Sed mi faras tion, ĉar
Vi tiel instruis min:
Ke ĝardeno fariĝos Edeno,
Kie vi tenis mian manon.

KRISTNASKO

KARÁCSONY

Verkis:

Endre ADY

I.

Sonolir’ sonoras,
Bela kant’ eksonas,
Foren zumas dankokanto,
En mia kara vilaĝo
Je Kristnasko
Enpensiĝas ĉiu homo.

Ĉiu homo amoplene
Adorfalas kore preĝi,
En mia kara vilaĝo
La Mesio
Feliĉon kutimas porti.

I.

Harang csendül,
Ének zendül,
Messze zsong a hálaének,
Az én kedves kis falumban
Karácsonykor
Magába száll minden lélek.

Minden ember
Szeretettel
Borul földre imádkozni,
Az én kedves kis falumba
A Messiás
Boldogságot szokott hozni.

Al preĝejo
Longa-vice
Gejunuloj, maljunuloj
Ekiras en la vilaĝo
Dankon diri
Al la Dio de la alto.

Ol se tere
Sankta graco
De la Dio flustrus, flugus,
En mia kara vilaĝo
Ĉiukore
Nur amo loĝas Kristnaske.

II.

Ĝenas min la kruda bruo
De l' grandurbo.
Kiel bonus festi en la
Hejmvilaĝo.
Bona estus purakore
-Kiel longe-
Petopreĝi,
Kiel bonus trankviliĝi.

Bona estus ĉion, ĉion
Jam forgesi,
Kiel bonus nun ludanta

Knabo esti,
Per vera kred', infana kor'
Per la mondo
Repaciĝi,
En la amo beatiĝi.

A templomba
Hosszú sorba
Indulnak el ifjak, vének,
Az én kedves kis falumban
Hálát adnak
A magasság Istenének.

Mintha itt lenn
A nagy Isten
Szent kegyelme súgna, szállna,
Az én kedves, kis falumban
Minden szívben
Csak szeretet lakik máma.

II.

Bántja lelkem a nagy város
Durva zaja,
De jó volna ünnepelni
Odahaza.
De jó volna tiszta szívből
-Úgy mint régen-
Fohászkodni,
De jó volna megnyugodni.

De jó volna mindent, mindent
Elfeledni,
De jó volna játszadozó
Gyermek lenni.
Igaz hittel, gyermek szívvel
A világgal
Kibékülni,
Szeretetben üdvözülni.

III.

Se ĉi bela mito
Vera kred' fariĝus,
Feliĉo tre granda
Al la mondo flugus.
La pekema homo
Ree homo estus,
Al la trista vojo
Talizmanon havus.
Golgoto ne estus
Tiu tera vivo,
Trapenetrus tutan
Universon forto,
Ne povus alia
Religio esti:
Adori la Dion
Kaj la homojn ami…
Se Kristnaska mito
Fine realiĝus,
Vera feliĉego
Al la mondo flugus…

III.

Ha ez a szép rege
Igaz hitté válna,
Óh, de nagy boldogság
Szállna a világra.
És a gyarló ember
Ember lenne ujra,
Talizmánja lenne
A szomoru útra.
Golgota nem volna
Ez a földi élet,
Egy erő hatná át
A nagy mindenséget,
Nem volna más vallás,
Nem volna csak ennyi:
Imádni az Istent
És egymást szeretni…
Karácsonyi rege
Ha valóra válna,
Igazi boldogság
Szállna a világra…

El la Hungara al Esperanto tradukis: Gajdos Pál Miklós en Advento de 2025.



Tradukis: *Miklós Pál Gajdos*

Malgranda Kristnaska kanto

Oni sonirigis,
Morgaŭ sonorigos,
Postmorgaŭ la anĝeloj
Arĝent-neĝon portos.

Ŝatus mi la Dion
Kiel vir' laŭdegi,
Sed mi ja knab' estas,
Nun komencas vivi.

Glori Dion tamen
Kuraĝe elpaŝas
Mi, kiel tri reĝoj
Kaj ŝafistoj faras.

Ankaŭ mi ekiris
Por kanti ekirus
Por Jesuet' inter viroj
Ĉion belan farus.

Novajn botojn en koto
ofte malpurigus.
Al la sinjor' mian amon
Bele mi atestus.

Tiel mi kantetis
per infana kredo,
Je kristnasko turpa
De ĉi tiu jaro:

1883

Verkis: *Endre ADY*

Tradukis:
Miklós Pál Gajdos

Kis, karácsonyi ének

Tegnap harangoztak,
Holnap harangoznak,
Holnap után az angyalok
Gyémánt-havat hoznak.

Szeretném az Istent
Nagyosan dícsérni,
De én még kisfiú vagyok,
Csak most kezdek élni.

Isten-dícséretre
Mégis csak kiállok,
De boldogak a pásztorok
Sa három királyok.

Én is mennék, mennék,
Énekelni mennék,
Nagyok között kis Jézusért
Minden szépet tennék.

Uj csizmám a sárban
Százszor bepiszkolnám,
Csak az Urnak szerelmemet
Szépen igazolnám.

(Így dúdolgattam én
Gyermek-hittel, bátran, 1883
Csúf karácsonyában.)

Poetoj

Erika Godó

Poetoj, kiuj kreas vivon per vortoj sur papero,

Ili teksas emociojn el la profundo de siaj koroj.

Ili pentras la mondon bunte per rimoj, kiel sorĉistoj,

kiel revuloj, ili malkovras la sekretojn de la homa animo.

La fonto de inspiro loĝas en la animoj de poetoj,

ili esprimas per vortoj tion, kio vivas en iliaj koroj.

Ĉiu poemo estas kiel stelolumo en la nokto,

ho poetoj, kies pensoj flugas sur la flugiloj de la libereco.



Gonçalo Neves

En IDO

POETI

da *Erika Godó*
(tradukita de Esperanto, *Gonçalo Neves*)

Poeti qui kreas vivo per vorti sur papero,

Li texas emoci ek la profundajo di sua kordii.

Li piktas la mondo bunte per rimi, quale sorcisti, quale reveri, li deskovras la sekretaji dil anmo homal.

La fonto di inspiro habitas la anmi di poeti,

li expresas per vorti to quo vivas en lia kordii.

Singla poemo esas quale stelo-lumo en la nokto,

ho poeti, di qui pensi flugas sur la ali di libereso.

Mago (2)

Elena Popova

Daŭrigante la enhavon de numero 006

Iun tagon mi rigardis la katan Facebook-paĝon.

Blanka belulino havis naskiĝtagon kaj ricevis ruĝan ŝalon kiel donacon, kiun la posedantoj ligis ĉirkaŭ ŝia kolo.

Ŝi estis surprizita kaj ne sciis, kion diri. Ŝi pensis: “Ŝi estas tre bela, sed ĉu mi ricevos ion por manĝi?

Krom tiu ĉi ŝalo, mi ne vidas aŭ sentas ion alian…”

- Bella, - diris la knabineto al sia amatino, kiu portis ŝian nomon, - ni havas surprizon por vi por la tagmanĝo, sed vi devos atendi iom!

La okuloj de Bella estas malĝojaj, ŝi ŝajne ne komprenis la vortojn.

- Pacienco, Bella! – diris la infano. – La plej bona afero estas atendi…

Mi rigardis kaj pensis, kiel oni povas atendi, kiam li estas malsata?

...

La Somero ankoraŭ regas, sed ĝi finiĝas.

Belaj devagaj katoj kuŝas sur la varma tero. Mi vidas tristecon en iliaj okuloj kaj mi demandas min, ĉu la homoj kaj la bestoj estas similaj, kiam ili estas lasitaj solaj?

La varmaj tagoj baldaŭ finiĝos, kaj kio poste? Kio okazos al la devagaj katoj? Ĉu ekzistas ŝirmejoj por katoj, ĉu ili traktas ilin bone? Kaj ĉu sufiĉos por ili nur ricevi manĝaĵon? Manĝaĵo pro devo, sen amo, ĉu ĝi varmigas la animon?

...

Onklo Ori kaj mi vizitis la dolĉaĵejon „Espero“.

La posedanto vidis du katidojn rigardantajn tra la fenestro kaj kaŝrigardantajn tra la pordo. Li kompatis ilin kaj donacis al ili ion dolĉaĵon. Onklo Ori diris al mi:

- Ili certe estos dankemaj, sed ĉu ĉi tiu lia gesto estas bona?

Ekzistas malsano nomata "Diabeto", homoj, kiuj manĝas tro da dolĉaĵoj povas malsaniĝi, kaj eble la bestoj ankaŭ malsaniĝas, mi ne scias! Mi esperas, ke almenaŭ la dolĉaĵoj, kiujn li donas al ili, estas fruktaj!...

En la filmo, kiun mi spektis hejme, iu kato trovis komfortan lokon apud drinkejo. Li ofte eniris, ĉar ĉiam estis manĝaĵo sur la tabloj, kiun ĝi uzis por kontentigi sian malsaton. Iafoje li trempis sian langon en la glasojn, sed li ne ŝatis tion, kion la viroj trinkis. Iun tagon li estis tre malsata kaj soifa, kaj ĉar la du amikoj jam trinkis sufiĉe por eĉ endormiĝi ĉe la tablo, li profitis la fakton, ke ili ne vidis lin, kaj decidis fini tion, kio restis en iliaj glasoj. Li trinkis, trinkis kaj... falis sub la tablon. La ebriuloj jam foriris, kaj la kelnero, kiam li venis por ordigi kaj vidis lin kuŝanta sur la tero sen moviĝi, pensis, ke li estas mortinta. Li rapide levis lin kaj ĵetis lin en la rubujon. Iam dum la nokto, la kato moviĝis, rigardis ĉirkaŭen kaj, ho hororo! – li vidis, ke li estis ŝlosita kaj ne estis elirejo. Tiam, honto ne honto, li elkriis por helpo. Sed estis nokto kaj neniu estis por aŭdi liajn plendojn.

Malsata hundo, kiu ankaŭ ofte preterpasis la drinkejon, aŭdis la kriojn de la kato, iris al la ujo kaj, komprenante la malĝojon de la stratbubo, komencis boji por atentigi. Sed kiu aŭdus lin tiam?!

Iu almozulo, kiu ankoraŭ ne trovis ion por manĝi, iris malrapide, malĝoje. Li aŭdis la bojadon de la hundo, alproksimiĝis kaj malfermis la kovrilon, kaj de tie la kato elsaltis kaj forkuris.

Li kaŝis sin proksime kaj komencis lavi sin, li estis tiel malpura… Li lavis sin kaj pensis: “Kio okazis al mi? Kial mi estis en ĉi tiu malliberejo?” Iom post iom li memoris. “Kiel mi povis trinki tiel avide, kaj mi estis malsata… Kiel la homoj trinkas ĝin? ... Mi neniam plu trinkos ion el la tasoj, mi serĉos akvon por ne denove alporti problemojn sur min. Ŝajne, ne ĉiu deziro estas por bono! "

Tiam panjo diris: - Ĉiu filmo aŭ rakonto portas lecionon. Mi certas, ke ĉi tiu senhejma kato lernis lecionon kaj mense dankis la hundon, kiu venis al lia helpo, kaj la malriĉulon, kiu malfermis la kovrilon.

...

Kaj alia memoro el mia hejmurbo, kiam ni promenadis kun panjo en nia kvartalo.

Du katidoj - blanka kaj nigra - alfrontis unu la alian, kiel du infanoj. La blanka ekridis:

- Kiel malbela vi estas en tiu nigra vesto! Kiu volus preni vin en sian hejmon... Homoj ne ŝatas nigrajn katojn, ili tute ne ŝatas malsamajn homojn... Ha - ha - ha!...

La nigra kato tremis, kvazaŭ li estus trafita per ŝtono, sed post momento li demandis:



- Ĉu la vestaĵoj gravas aŭ la kvalitoj, kiujn mi posedas?
- Pri kiaj kvalitoj vi parolas? - la blanka daŭre ridis. - Neniu haltos ĉe vi!
- Mi! - diris knabineto. - Kial vi insultas? Via konduto estas tre malbela! Mi ne prenus vin en mian hejmon, ĉar vi ne havas bonan edukadon...

Ŝi prenis la nigran katidon en ŝiaj brakoj, kaj la blanka hontita rapidis malaperi.

- Neniu rajtas insulti diversajn estaĵojn, sendepende de ĉu ili estas blankaj aŭ nigraj, tiuj kun problemoj, malriĉaj kaj malsataj... Se li povas helpi, estas bone, se li ne povas, estas pli bone preterpasi kviete. Mi komprenas, ke la stratbubo ne havas kie ricevi edukadon, sed ĉies koro diras al li, ĉar tie kaŝiĝas la amo - diris panjo.

...

- Mi estas kato. Mi vivas ŝlosita en apartamento la tutan tagon, ĉar ĉiuj estas ĉe la laboro, sed mi ne enuas. Ili donis al mi la nomon de fama kantistino, kvankam mi ne povas kanti. Mi elpensis la nomon Maja, sed mi ne povas diri al miaj homoj. Ili amas min, karesas min kaj lasas min ludi kun ili vespere. Ili nomas min Princino, mi ne scias kion ĝi signifas, sed ĝi devas esti agrabla, mi sentas ilian amon en iliaj voĉoj, okuloj, ridoj.

Kion mi faru kiam ili ne estas tie dumtage? Mi mense konektas kun miaj amikoj el la grupo de la hundo Roki, ni parolas. Estas bone havi amikojn, kie ajn ili estas, ĉar distanco ne gravas. Ni ĉiuj havas komunan kodon nomatan Amo. Kaj ĉu ni povas fari grupon ankaŭ ĉi tie kaj helpi la senhejmulojn?

Se vi volas, skribu pri Princino Maja!

Tiel mi renkontis Maja-n en la kata Facebook. Ŝia ideo estas interesa, sed kiel ni povas helpi? Eble doni kuraĝon al tiuj, kiuj perdis ĝin?

Vespere, kiam mi dividis tion kun Onklo Ori, li diris al mi:

- Ĉiu devus havi amikon, sed tiu, kiu instruas al ili bonajn aferojn, kiel Maya. Evitu aliajn, kiuj allogos vin al malbonaj aferoj! Tiu kato el la drinkejo, forportita de malsato, ne pensis pri kia malbona ekzemplo donas al li ebriaj viroj, kiuj, bedaŭrinde, estas ĉie. Pensi unue, poste agi. Ne estas facile, sed estas bone.

...

Nova letero alvenis en mian katan Fejsbukon. Mi malfermis ĝin zorge.

- Mi estas Miu! Mi estis malsata, malsana kaj senhejma kato, kaj nun mi loĝas en bela domo kun korto plena de floroj. Mi estis adoptita de Helli kaj Manny el Germanio. Li fotas min, kaj panjo Helli desegnas min, ĉar ŝi estas pentristino. Helli pentras aliajn belajn bildojn kun homoj, animaloj, la naturo. Mi estas dankema pro ilia zorgo kaj amo, do mi uzas mian talenton kiel resanigisto kaj helpas ilin mildigante ilian doloron aŭ endormigante ilin ronronante apud ili.

- Mago, ĉu vi povas akcepti min kiel amikon? Miaj homaj gepatroj parolas Esperanton kaj mi lernas de ili.

Dankon anticipe! Ni la katoj povas helpi homojn laŭ multaj manieroj. Tiel ni amas kaj helpas unu la alian.

Ĝis revido, mia amiko!

...

Maljuna najbarino sidis sur la benko antaŭ nia enirejo, kaj katido dormis sur ŝiaj genuoj. Ili parolis kun mia patrino, kaj la kateto rigardis min kun unu okulo.

La najbarino diris: - Miaj nepoj trovis lin senhelpa, portis lin al la kuracisto, kaj poste ni prenis lin hejmen.

- Kiun nomon vi elektis por li?
- Kredo! Mi kredas, ke ŝi trankviliĝos kaj malstreĉiĝos, ŝi ankoraŭ estas kunvolvita en mi, serĉante protekton.

La najbarino parolis mallaŭte kaj karesis la kateton. Li denove dormis. Bonkoreco kaj fido en la nekomprenebla mondo...

...

Mi pensis, "La homoj havas proverbon, kiu diras: "Ili amas unu la alian kiel hundo kaj kato," kio ne ŝajnas tute vera laŭ mi. Mi atestis multajn renkontojn inter ni kaj strathundoj, kiuj ne ĉiam estas bonaj por ni, sed ĉu estas nia kulpo? Surstrate vi malofte trovos ion por manĝi kaj trinki, lasitan de bonaj homoj, sed neniu volas dividi tion, kion li trovas, kun la aliaj. Bedaŭrinde, tio ankaŭ validas por la homoj, laŭ mia kompreno.

Onklo Ori ĉiam helpas kaj mi sendis al li mian demandon mense: "Ĉu io povas esti farita por alporti pacon kaj komprenon?"

Lia respondo ne longe venis:

- Mi pensas, ke ĉiu mem decidu, ĉu dividi manĝaĵon aŭ ion alian, ĉu cedi lokon al la pli juna kaj atendi... Mi ĉiam helpas... Ĉu vi volas, ke ni vizitu ŝirmejon por forlasitaj kaj malsanaj bestoj? Tio estos interesa leciono..."

"Mi ne estas preta!" - mi respondis al li kaj decidis pensi.

...

Mi daŭrigas miajn promenojn kun Onklo Ori. Iun tagon ni iris al ŝirmejo por vagantaj bestoj. Li plenigis sakon per skatoloj da manĝaĵo.

Ili akceptis nin. Mi sidis en lia dorsosako kaj nur rigardis kaj aŭskultis. Kion mi vidis? Kaĝojn kun atendantaj okuloj, plenaj de malĝojo. Mi komprenas ilin, ili havas lokon por vivi, sed ili ne estas liberaj, cetere, la manĝaĵo ne ĉiam sufiĉas, kvankam bonaj homoj helpas. Kaj kiom da krioj mi aŭdis, kiom da petegoj!...

La katoj estis kvietaj, sed la hundoj laŭvorte ploris kaj kriis...

Mi komprenis, ke estas tre malfacile, kaj por la posedanto de la ŝirmejo kaj por la bestoj.

Ni foriris. Post la renkontiĝo ĉe la ŝirmejo, li silentis, sed mi pensis, ke libereco surstrate estas preferinda, eĉ kiam oni malsatas. Ni, la katoj, neniam atakas homojn, sed la hundoj faras tion pro malsato kaj tial ili akceptas ilin definitive, kiel oni diras. Mi ankaŭ pensis, ke mi estas bonŝanca, ĉar mia patrino adoptis min, mi havas bonajn vivkondiĉojn, ŝi instruas min, kaj nun mi estas turisto en ĉi tiu malproksima kaj bela lando.

...

Onklo Ori, post ĉi tiu malĝoja renkontiĝo ĉe la Hejmo por Senhejmuloj, diris al mi:

- Nun mi kondukos vin al loko, kie vi povas vidi kiel oni prizorgas bestojn.

Ni haltis ĉe luksa hotelo kun restoracio kaj butikoj. Ni eniris kaj li montris al mi:

- Rigardu tien! Ĉi tio estas speciale farita rulŝtuparo por hundoj kaj katoj grimpi - oportuna kaj sekura. Nu, ĝi ne estas ĉie nun, nur por riĉaj dorlotbestposedantoj, sed la ideo estas grava. Iam ĝi estos por ĉiuj! Nun la homoj ankoraŭ zorgas pri la manĝaĵo de la senhejmuloj – homoj kaj bestoj, sed mi kredas je bona estonteco! - li finis.

Mi ankaŭ kredas!

...

Mi ricevis novan amikecan leteron.

- Mi estas Riki. Mi loĝas en la urbo Burgas, Bulgario, en la hejmo de Ani kaj Ivan, kiu estas mia homa patro. Ni loĝas kune kun la hundo Roki, kiun vi verŝajne konas el la libro "Mi, Roki". Ni festas niajn naskiĝtagojn kaj aliajn festojn kune. Ni havas ludilojn, kiujn ni ne dividas.

Estas feliĉo havi tian lojalan amikon kiel li. Ni disiĝas nur kiam Roki promenas apud la maro - la Nigra Maro estas ĝia nomo, sed ĝi estas tiel blua kiel la ĉielo. Mi amas sidi en la brakoj de mia patro Ivan kaj aŭskulti kion li diras al mi. Kaj vespere ili legas al ni fabelojn.

Hejme ili nomas nin "Anĝeloj" - manifestiĝo de amo, kiun ni provas meriti.

Mi ankaŭ deziras al vi amikiĝi kaj helpi unu la alian.

Mi petas vin jesu min en via grupo pri amikeco. Dankon!

...

Kiam Dumtage ni estis kune kun Onklo Ori hejme aŭ vojaĝante, li kantis, li havis belan voĉon, ravantan. Domaĝe, ke mi ne povas kanti, sed mi memoras rapide. Li parolis al mi en Esperanto kaj mi komprenis preskaŭ ĉion nun, kaj se mi ne povis, mi demandis lin.

Li komprenis tuj dekomence, ke mi havas taglibron kaj dum mi legis tion al li, li komencis desegni sur papero. Mi ĝojis, ke miaj pensoj kaj liaj, kreas ion novan, kion mi montros al mia patrino, kiam mi revenos, sed kiel mi povus konservi ilin, ili estis ankoraŭ nur en mia menso.

Onklo Ori ŝajnis legi miajn pensojn:

- Ne zorgu, mi konservas la notojn, kiujn mi skribis kiam vi rakontis al mi la historiojn, kaj mi afiŝos ilin en la homa Facebook-paĝo. Tiel viaj pensoj kaj sentoj atingos ne nur Panjon Mila, sed ankaŭ multajn aliajn homojn. Kaj iu afabla kaj talenta homo povas desegni aŭ meti bildojn sub ĉi tiujn tekstojn. Kaj vi povas fari la samon en la kata Facebook-paĝo. Vi havos novajn amikojn, kaj kiam vi estos hejme, vi ne sentos vin soleca. Vi nur devas esti singarda pri kiaj amikoj vi konektas, kiel mi jam menciis al vi iam.

...

Mi dividis kun li konversacion kun mia patrino. Ŝi diris al mi, ke ekzistas popola kredo, ke kiam homo translokiĝas al nova domo, la unua afero, kiun li devas fari, estas lasi katon promeniĝi, tiel li purigos la malbonan energion de ĝi.

La homoj ĉiam sciis pri niaj kapabloj, sed mi ne komprenas, kial iuj homoj traktas nin malbone.

Vespere li ludis la pianon, kelkfoje li kantis, kaj mi staris apud li, ofte sur la piankovrilo. Li estis ne nur bona, sed ankaŭ talenta.

...

Mi memoris alian konversacion kun mia patrino, ĝi temis pri la musoj. Mi naskiĝis en urbo, mi neniam vidis tiujn, kaj mia patrino montris al mi foton de ili.

Mia patrino estas vegetarano kaj ŝi diris:

- La katoj ŝatas kapti kaj manĝi musojn, sed ĉiu vivanta estaĵo rajtas vivi. Estas pli bone, se vi iam renkontas muson, lasi ĝin vivi.

Mi dividis ĉi tiun memoron kun Onklo Ori kaj li diris:

- Ĉu vi volas fariĝi vegetarano? Kion ŝi konsilis al vi?
- Mia patrino diris, ke mi mem decidu, kiam mi estos preta rezigni pri fiŝoj, sed mi amas ilin tiel multe! Kaj mi neniam aŭdis, ke estas katoj vegetaranoj...

…

Iun tagon li demandis min, kion mi pensas fari, kiam mi revenos hejme.

- Eble mi faru tion, kion mi povas - kune kun miaj geamikoj, ni alvoku la hundojn, la homajn infanojn, kaj per ili la plenkreskulojn, por ni faru rondon por paco kaj amikeco. Kiam ni helpos unu la alian, nia vivo pliboniĝos.

...

En la filmetoj, kiujn mi spektis, la vorto Heroo ofte estis uzata, sed kion ĝi signifas ne estas tute klara al mi. Tial mi demandis Onklon Ori.

- Herooj troviĝas dum militoj, katastrofoj kiel inundoj, tertremoj aŭ incendioj. Tiam multaj homoj iras helpi kaj savi homojn kaj bestojn. Iafoje ili eĉ perdas sian sanon aŭ sian vivon. Sed herooj, kiuj faris eĉ la plej malgrandan bonon, kutime estas modestaj, ili neniam fanfaronas, aliaj parolas pri ili. Monumentoj estas konstruitaj por ili, generacioj memoras iliajn farojn...

Tre ofte, dresitaj hundoj estas kun ili, kiuj ankaŭ helpas... Mi ankaŭ legis pri kato, kiu sentis sufokan gason hejme kaj vekis siajn posedantojn, tiel savis ilin. Kaj tio, eĉ se ĝi ne estas konsiderata heroeco, meritas laŭdon kaj dankemon.

Kaj mi memoris ion. Dum granda tertremo en najbara lando, knabo estis trovita kun kato en siaj brakoj. La du travivis plurajn tagojn, ĉar ili kuraĝigis unu la alian, ke ili estos trovitaj, kaj mi estas certa, ke dum tiu tempo la kato sendis kontinuajn signalojn por helpo. Grandega amo kaj fido subtenis iliajn vivojn ĝis la savantoj trovis ilin. Ĉu tio ne estas heroeco?

...

Sed, pli kaj pli ofte, miaj pensoj revenis al mia patrujo kaj unu vesperon mi petis onklon Ori provizi al mi revenbileton. Li promesis al mi. Kaj baldaŭ venis la tago, kiam ni devis disiĝi.

Mi dankis al li pro la zorgado pri mi, pri la lecionoj, pri tio, kion mi vidis en lia bela lando.

Kaj li skribis al mi Diplomon pro la fino de la elementa kurso de Esperanto. Mi dankis lin, mi nun estis membro de granda familio – per Esperanto oni povas iri ien ajn en la mondo. Mi ankaŭ partoprenus en la societo de Esperantaj legantoj, kiel egalulo inter la egaluloj. Mi iĝis Sumoisto...

Kaj mi ekiris survoje al mia patrujo.

...

Dum la flugado mi pensis. Ni, la hejmajn katojn, estas feliĉaj, ke ni havas domon kaj nutraĵon, ke oni amas nin, sed ni ne havas liberon. Ni estas, kial la homoj diras en „ora kerno“. De miaj novaj geamikoj nur Miu estas libera. Kion ni povas fari, ke ni ne perdu nian katan esencon? Mi havas ideon – pri la homoj estas belaj sportaj salonoj, ĉu ili konsentos kaj ni uzi ilin kune kun niaj homaj parencoj? Tiam kaj ni estos sanaj, neniu dikiĝas, neniu devas sekvi dieton, kiel Maja.

La revoj realiĝas, mi kredas, sed la homoj devas helpi, ni solaj ne povas.

Ĉion bonan al vi, kara leganto, eble vi helpos?...

...

Mi ankoraŭ estis sub la influo de tio, kion mi spertis kun Onklo Ori, do mi petis mian patrinon iri al proksima vilaĝo. Mi estas urba ido, mi ne konas la bestojn, kaj libere kuri ĉirkaŭe. Ŝi parolis kun iu telefone, kaj la sekvan tagon ni veturis per buso. Ridetanta maljunulino salutis nin kaj tuj donacis al mi paron da botoj, kiujn ŝi trikis, dirante: "La vojoj en la vilaĝo ne estas kiel en la urbo, vi povus vundiĝi!". Poste ŝi vokis la hundon kaj ordonis al ĝi: "Anĝelo, zorgu pri nia gasto! Promenigu lin!" Ni ekiris. Azeno paŝtis herbon en la proksima herbejo. Mi haltis. - Jen mia amiko Marko! - la hundo sendis al mi siajn pensojn. - Saluton Marko, kiel vi fartas, kiel vi vivas? Mi vidis vin nur en bildetoj kaj filmoj. - Dankon, mi fartas bone, mi laboras por la aliaj kaj mi estas feliĉa. - Kio? - En la vilaĝo loĝas maljunuloj kaj mi portas iliajn pezajn aĉetaĵojn kaj ĉion, kion ili petas de mi. Ili estas kontentaj, ke mi helpas ilin. Ili amas min... Ĉu vi aŭdis, ke la lakto de la azeninoj helpas homojn, kiam ili malsaniĝas? Tial ili eĉ pli valoras nin... - Estu sana, azeno, mi ĝojas vidi vin! Ni daŭrigis la vojon kun mia gardanĝelo. Ni vidis ĉevalon, bovinon, diversajn birdojn, pliajn hundojn, eĉ hejmajn kuniklojn, sed mi laciĝis kaj petis la hundon pri ripozo. Li proponis al mi grimpi sur lian dorson kaj li portos min al ilia domo, sed mi rifuzis, mi ne povis uzi la bonkorecon de mia nova amiko. Ni iris hejmen malrapide. La dommastrino kondukis min al kapro kaj diris: - Ĉi tiu kapro estas mia alia anĝelo - ŝi donas al mi varman, resanigan kaj bongustan lakton por manĝi ĉiutage. Mi ankaŭ faras fromaĝon el ĝi. Mi faris al vi pansupon kun ĉi tiu fromaĝo, manĝu ĝin! Mi manĝis, ĝi estis vere bongusta. Ni foriris. Ĝi estis neforgesebla tago de freŝa aero, paco kaj novaj scioj...

…

Infanoj el bazlernejo, eksciinte pri mi, invitis min kiel gaston al sia sporta festivalo. Ni iris kun mia patrino. La infanoj montris siajn kapablojn, ricevis aplaŭdojn kaj premiojn, kaj poste ili bombardis min per demandoj.

- Mago, ĉu vi estas eksterterulo?
- Ne, mi estas ordinara kato, kiel la aliaj, sed tre scivola, mi konstante lernas kaj fariĝas pli inteligenta - mi transdonis miajn pensojn al mia patrino, kaj ŝi respondis al la infanoj. Panjo daŭrigis:
- La legendoj diras, ke niaj katoj estas posteuloj de la egipta diino Bastet, kiu estis la filino de la sundio Ra. Ŝi estas pentrita kiel virino kun katkapo.
- Kaj ĉu vi sportas?
- Tiom kiom oni povas en la ĉambroj de malgranda apartamento…
- Kaj kiel vi verkis Taglibron, kiam vi ne povas skribi?
- Mi kreis ĝin en mia menso ĉiutage, kaj poste mi rakontis ĝin al Onklo Ori, li skribis ĝin kaj sendis ĝin al mia patrino. Kaj nun mi rakontas ĝin al ŝi, kaj ŝi daŭrigas la Taglibron. Eble Iu iam interesiĝos pri tio, kion pensas kato, enfermita hejme, eĉ se edukita kun amo.
- Ĉu vi revas kiel la homoj kaj pri kio?
- Jes, se ne estas revoj, ne estas progreso. Sed se vi nur revas kaj ne laboras, ne faras sufiĉe por plenumi viajn revojn, ili malaperos. Tial mi deziras al vi revadi, malkovri vian talenton, studi kaj tiel atingi ilin.

Ni fotiĝis kun la infanoj kaj ili forsendis min kun aplaŭdoj. Estu singarda, memorigis min mia patrino, ne fieri pri famo, famo alportas danĝerojn. ...

…

Mi trovis min inter nekonataj homoj, kies vizaĝoj strange similis al... katvizaĝoj. Ili festis, ili estis gajaj, ili kantis, ili ludis... - Kiu vi estas, de kie vi estas? - iu demandis min. - Kiun vi serĉas?

- Mi estas Mago, mi venas de la Tero... - mi murmuris konfuzite, ili ŝajnis konataj al mi.
- Kaj kiuj vi estas? Vi aspektas kiel antikva diino, kiun mi vidis en bildo.
- Ni estas iamaj katoj, kaj nun ni fariĝas homoj. La diino Bastet, kiu estas la filino de la egipta dio de la Suno Ra, sugestis al siaj infanoj, ke iam ili fariĝos homoj.
- Kio okazos al la nunaj homoj sur la Tero?
- Ili iom post iom fariĝos anĝeloj, kaj ni - homoj. Ne miru, Mago, la vivo ĉiam ŝanĝiĝas.
- Kiam okazos ĉi tiu ŝanĝo?
- Post miloj da jaroj, malrapide kaj nevideble.
- Ĉu mi ankaŭ ŝanĝiĝos?

Ili kondukis min al granda spegulo kaj mi vidis min mem - mi estis alta junulo kun bela homa korpo kaj kataj okuloj.

- Ni ĉiuj estas infanoj de la Sundio - niaj animoj portas sparkon de liaj radioj.

Mi vekiĝis el ĉi tiu stranga sonĝo. Ĉu estis la magio de la sonĝo, aŭ ĉu mi kaŝrigardis en pecon de la estonteco? ◆

Hajkoj

Светлана Коняшова

En frosta tago
sub suna lum' neĝeroj
maloftaj belas.

Decembre sur branch'
de viburno ruĝbrusta
pirolo sidas.

Neĝa novembro.
Sed en la ĉambro floras
Blua hibisko.

noktaj frostetoj -
sed tage papilio
sur krizantemo.

flugas al sudo
sovaĝanasoj... solas
la papilio.
Vintre pirolo
sub la fenestro estas
agrabla gasto.

LETEROJ EL LA KOSMO

Elena Popova

Ĉio komenciĝis per unu mia

P E T O

– Bonvolu, sledo, rapidu! Flugu kun mi al la stelaj spacoj.
Mi volas scii, ĉu estas tie sledoj, skioj, kaj “homo” el neĝo, kiu povas paroli kun la infanoj.
Ĉu la luno ravas ilin kaj la suno frue vekas ilin?
Ĉu steloj en la ĉielo vespere flustras sekretojn kaj estas neĝaj steletoj, kiel sur la tero?
Ĉu estas printempo, somero, aŭtuno, vintro?
Bonvolu, sledo, rapidu dum mi estas juna, poste estos tro malfrue!
Kial? – Mi aŭdis malproksiman voĉon. – Astronaŭtoj jam delonge surpaŝis la lunon. Se vi ne volas esti ordinara turisto, vi povus atingi aliajn planedojn, sed unue ekkonu la Teron, vian landon. Tiam vi mem respondos al la hodiaŭaj demandoj.
Vi ĉiam povas flugi kun viaj revoj, ĉar ne ekzistas limoj aŭ aĝo por ili ...
Mi ekflugis...
Via Nikolao

****

LA GLACIA PLANEDO

Saluton, amiko,
– Hodiaŭ mi volas skribi al vi kion oni rakontis al mi pri la Glacia planedo.

Senfinaj glaciaj kampoj, frosto kaj neĝo, nekonataj al ni. Tie regis la Vintro. Estis glacia kampo, malvarmeco kaj multe da neĝo. Kiam la vintra vento venas alporti la Vintron al la Tero, ĝi estas kontenta. Kiam ĝi revenas, ĝi rakontas mirindaĵojn kaj neniu al ĝi kredas.
La Vintro en ĉi tiu reĝlando vivas sola kaj tre malĝoijas pri la homoj, kiujn ĝi renkontis sur la Tero kaj petis multfoje: – Homoj, venu vivi kun ni! Ni konstruis kun la vento tiom da domoj, veraj kasteloj, sed mi vivas sola. Ni kunvivas kun la ursoj, sed ne estas kiel kun la homoj. Kiam mi venas al vi, mi gajas, vi varmigas mian koron, speciale tiun de la infanoj – ili ĉiuj amas min kaj min atendas.
Petegas la Vintro, sed neniu komprenas ĝiajn vortojn – pri la homoj ĝi estas nur unu sezono, eĉ ne konata en ĉiuj partoj de la Tero.
La preparado pri la translokiĝo de la homoj estis konata ideo. Kiam ĉio estis preta kaj la kosmaŝipo forveturis al la Glacia planedo, oni elektis min preni la unuan intervjun.
Mi parolas kun la gvidanto.
– Kiel pasis via vojaĝo, kiu estis tre longedaŭra?
– Ni ne perdis tempon dum nia vojaĝo, ni faris la unuan kunvenon. Ni devis elekti Ĉefministron, kiu gvidu la laboron. Ĉiuj voĉdonis por mi. Tiam mi diris la jenan:
– Dankon pro via konfido! Niaj unuaj taskoj estos:
– Forgesu la lingvojn, kiujn vi parolis! Por ke ni estu egalaj, ni parolos unu lingvon – Esperanton. Multaj el ni scias ĝin, sed por la aliaj ni tuj komencos kurson. Ĝis ni atingos la novan planedon, ni ĉiuj devas komuniki nur per ĝi.

– Ĉu la lingvo estas malfacila? – iu demandis.
– Ne! – respondis virino. – Esperanto estas facila kaj belsona!
– Ĉu tiu lingvo estas artefarita? Kiu kreis ĝin?
– La pola kuracisto d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Nun tiun lingvon parolas homoj de diversaj landoj. Ankaŭ ni, en nia nova lando, ni devos ĝin uzi. Dum la kurso ni parolos plu! – respondis virino.
Mi daŭrigis:
– Vi povas memori viajn landojn kaj rakonti pri ili al viaj infanoj kaj genepoj, kiel fabelo.

Sed ne trist(u), verŝajne baldaŭ ni povos paroli rekte kun ili.– Forgesu la malnovajn kutimojn, kaj ni kreos novajn, laŭ nia vivmaniero.– La sola religio de nun estos la Amo.
– Nenia perforto al homoj kaj bestoj, se ekzistas tiaj malbonoj.
– Memoru la virtojn – Amo, Saĝo, Vero, tiom deziratajn de la homaro...

Ni decidos ĉion alian, kiam ni alvenos tien.
Jen ni estas sur la planedo. Bela, blanka, pura... Estas lumo, sed neniu suno videblas. Ekzistas sennombraj kasteloj, grandaj kaj malgrandaj, kie la homoj ekloĝiĝis. Ĉiuj serĉis trankvilecon...
Dum la nokto, se ni povus paroli pri nokto, neniu dormis. Ĉio en ĉi tiuj kasteloj parolis, ludis... Ni kunvenis matene kaj ni faris al tiuj, kiuj diris ke ili vojaĝis multe, ni taskis la esploron.
Alia tasko – ni devis trovi la senditajn materialojn kaj komenci laboron – ni havis planon kiel devas aspekti la nova urbo. Ni elektis ĝian nomon – Espero. Do, tia devas esti ankaŭ la nomo de nia nova ŝtato, kiu nun konsistos el unu urbo. Urbo–Ŝtato.
Kiam venos aliaj homoj kaj ili kreos sian urbon... Tiam aperis iu Granda Blanka Urso. Ĝi radiis potencon, konfidon kaj bonvolon...

– Mi, – diris li, – estas la Regnestro de ĉi tiu planedo. Ĝi estas Ursa domo. Laŭ nia kutimo, mi diras al vi: „Bonvenon!” Vivu laŭ viaj komprenoj, sed ni havas unu postulon – vi faru nenion malbonan al la ursoj! Ni ĉiuj estas vegetaranoj kaj vi estos! Sur ĉi tiu planedo oni malpermesas manĝi viandon.
– Kiel ni forlasos la viandon, ni kutimiĝis al tio... – diris unu el la ĉeestantoj. – Mi scias, ke tere estis vegetaranoj kaj veganoj[1], sed neniu avertis nin, ke tio estos necesa. Krom tio, ĉu ni permesos al iu Urso nin komandi?
Ankaŭ aliaj konsentis kun li. La urso silentis.
– Ni devas ilin estimi, ili estas niaj najbaroj! – respondis mi.
Estis ankaŭ aliaj nekontentaj, sed neniu povus reveni Teren. Nia vivo sur ĉi tiu planedo dependos de ni mem.
– Ne iru tien, vi eble ne revenos vivaj kaj sanaj! Tie estas plej malvarme! Tie estas la Reĝo de la Vintro! – montris kaj diris La Granda Blanka Urso. La stranga Blanka Urso, deziris al ĉiuj vivi kun Amo, Saĝo kaj Vero, kaj foriris.
– Kiuj estas viaj planoj por la estonteco?
– Ni ilin ricevos! – respondis la gvidanto kaj nenion diris plu.
Tiel la Ĉefministro rakontis al mi pri la komenco de la vivo sur tiu nekonata planedo. Verŝajne ĝi fariĝos pli bela ol la landoj, konataj al ni. Kaj tie regos paco kaj kompreno! Tiu planedo havas perspektivon, oni ne sendus homojn vane...Via amiko

Nikolao, la korespondanto◆ (*daŭrigota*)

1 Veganoj estas homoj, kiuj ne manĝas bestajn produktaĵojn.

Momento

Maria Nazaré Laroca

Hieraŭ mi ricevis
neatenditan donacon.
Ĉe krepusko,
petolema suno
forbalais la lastajn
pluvgutojn,
kaj ĉielarko
ĉirkaŭbrakis la ĉielon,
pentrante
du minutojn
da senfina paco.

Momento

Ontem ganhei
um presente
inesperado.
Ao entardecer,
um sol travesso
varreu as últimas
gotas de chuva,
e um arco-íris
abraçou o céu,
pintando
dois minutos
de infinita paz.

La vojaĝanto

Johannes "Johano" Genberg

Kiom longe mi revis iri al Marso. Ne gravis al mi, ke kaj mia tuta familio kaj miaj amikoj diris ke mi ne iru. Ke estas danĝera vojaĝo. Ke la kosmovojaĝa firmao ne estas fidebla. Ke tiom multe da raketoj jam eksplodis. Kion ili scias? Ili nur envias ke mi sekvas mian revon, kaj ili ne.

Nun mi estas proksima. Post minutoj mi surteriĝos al Marso. Jes, la raketo ja eksplodis, ekzakte kiel ĉiuj diris ke okazos, sed mi estis forĵetita en unu peco, ŝvebante tra la kosmo dum jardekoj. Sed nun mia vojaĝo fine finiĝos. Per miaj frostiĝaj okuloj mi rigardas la realiĝon de mia revo.

La korpo disfrakasiĝas en mil pecojn kiam mi trafas la grundon. ◆

Hej, Kristnasko, Kristnasko...

Elżbieta Wolak

Tradukis: *Ryszarda Kwiatkowska*

Hej! La papavo rapide saltis en la makutron...
La odoro de vanilo iritis niajn nazojn,
La karpo rigardas siajn vitrecajn okulojn...
La kristnaska arbo kombas sian anĝelan hararon...
La polvoj forkuras de la lavtukoj,
Brasiko jam bolas en la potoj,
La borŝo ruĝiĝis kun siaj oreletoj ,
La kristnaska kanto ludis sur la lipoj.
La velkintaj fungoj glatigis iliajn vizaĝojn,
Ili eniris la pastoglobojn, falis en la supon,
La haringo en oleo jam altiris sian forton,
La ŝuoj pendis plenaj de donacoj.
Poinsetio atendiĝas sur la tablo
Brilantaj pilkoj pendas sur la arbo,
Dignaj en sia mirinda rolo
La sankta nokto ravas per sia silento...
Kaj la tempo de naskiĝo de la Sinjoro venis
Kaj momento alvenis, ravita per magio
Mia edzo diras: Kristnasko venis, mia amo...
Du mallongaj tagoj kaj... nu! Kristnasko finiĝis.
Kaj tiom da manĝaĵo estis preparita,
Tiom da purigado, tiom da kapdoloroj,
Tiom da kurado kaj ornamado
Tamen la Kristnaska magio restas!

aŭtorino, *Pearl S Buck*
(Usono)

Vento orienta – Vento okcidenta (8)

Daŭrigante la enhavon de numero 006

elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

ĈAPITRO 11

Ni ankoraŭ nenion aŭdis, Fratinjo! Ĉiutage mi sendas la ĝardeniston al la domo de mia patrino por informiĝi pri ŝia sano kaj ekscii ĉu oni aŭdis pri mia frato. Kaj ĉiutage, dum la lastaj dek kvin tagoj, li respondas:

La Altaĝa Honorindulino diras, ke ŝi ne malsanas, sed en la okuloj de la servantoj, ŝi fariĝas ĉiam pli magra. Ŝi ne povas manĝi. Rilate al la juna sinjoro estas nenia novaĵo. Sendube tial ŝia koro ronĝas la korpon. Je ŝia aĝo angoro estas malfacile eltenebla.

“Ho, kial mia frato ne sendas mesaĝon? Mi preparis delikataĵojn por mia patrino kaj sendis ilin en bonkvalitaj porcelanaj bovloj; Mi sendis tion pere de servantoj kaj mi diris:

“Manĝu tiun aĉan[32] viandon. Ĝi estas sengusta, sed, ĉar ĉi tiuj manoj preparis ĝin, degnu manĝi iomete.”

Oni raportas al mi, ke ŝi komencas manĝi kaj tiam demetas la manĝbastonetojn. Ŝi ne povas liberigi sian koron de la angoro. Ĉu estas do permesata al mia frato mortigi sian patrinon? Li devus scii, ke ŝi ne povas elteni tiun Okcidentecan mankon de fila devo. Estas hontinde, ke li ne memoras siajn devojn!

Mi pasis multajn horojn en meditado kaj cerbumado. Ne klaras al mi kion faros mia frato. Unue mi ne dubis, ke finfine li obeos al nia patrino. Ĉu lia korpo, lia haŭto kaj liaj haroj ne venis de ŝi? Ĉu li do povas polui tiun sanktecon kun fremdulino?

Krome, ekde lia junaĝo, oni instruis al mia frato pri la saĝeco de la Granda Majstro[33] kiu diras, “La unua devo de viro estas zorge atenti ĉiun deziron de siaj gepatroj.” Kiam mia patro revenos kaj aŭdos kion mia frato estas faronta, certe ankaŭ li malpermesos tion. Mi tiel konvinkis min resti trankvila.

---

32 aĉa = bona, Pro ĝentileco, en tiu kulturo, oni devas malplivalorigi la proprajn posedaĵojn, atingojn ktp.

33 Konfuceo

Tiel mi rezonis unue. Sed hodiaŭ mi maltrankvilas kiel torento, kiu ne restas en sia fluejo sed trapasas la sablajn bordojn.

Estas mia edzo, Fratinjo, kiu dubigas min pri la saĝeco de la malnova tradicio. Per la potenco de lia amo li kaŭzas miajn dubojn! Hieraŭ vespere li diris strangajn aferojn. Mi rakontos tion al vi. Estis jene:

Ni sidis sur la malgranda brika teraso, kiun li konstruigis je la suda flanko de la domo. Nia filo estis dormanta en supra etaĝo en sia bambua lito. La servantoj retiriĝis al siaj propraj aferoj. Mi sidis sur la porcelana ĝardenseĝo, iomete apartigita de mia sinjoro, kiel decas. Li kuŝis en longa kanseĝo.

Ni kune rigardis la plenvizaĝan lunon trairantan alte en la firmamento. La nokta vento ekblovis, kaj tra la ĉielo blankaj nuboj procesie preterblovis kun la rapideco de grandaj neĝblankaj birdoj, kiuj jen kovris, jen lasis magie klare videbla la vizaĝon de la luno. La nuboj tiel rapidis, ke la efekto estis kvazaŭ la luno mem ruliĝis super la arboj. La odoro de pluvo pendis en la nokta aero. Beateco pro la beleco kaj paco kreskis en mi. Mi subite fariĝis tre kontenta kun mia vivo. Mi levis la okulojn kaj vidis, ke mia edzo gapis al mi. Belega kaj sinĝena plezuro tremetigis min.

“Tia luno!” li diris fine kun voĉo emociigita. “Ĉu vi ludu la malnovan harpon, Kŭei Lan?”

Mi incitetis lin per ŝerca riproĉo.

“La harpo, laŭ la vortoj de la prauloj kiuj konstruis ĝin, havas ses malŝatojn kaj ses malpermesojn”, mi diris. “Ĝi ne volas sonigi sian voĉon dum tempo de funebro, dum ĉeesto de festaj instrumentoj, kiam la muzikisto estas malfeliĉa, kiam la ludanto estis insultita, kiam incenso ne estis freŝe fumigita, aŭ dum la ĉeesto de nesimpatia aŭskultanto. Se ĝi ne kantos ĉi-vespere, mia sinjoro, kiu el tiuj malŝatoj ĉeestas?”

Li fariĝis gravmiena, dirante:

“Ne, mia koro: Mi scias, ke antaŭe ĝi ne eligis sian voĉon, ĉar mi estis tiu malŝato, tiu nesimpatia aŭskultanto. Sed nun? Lasu viajn fingrojn ludi la malnovajn kantojn de amo, la kantojn de la poetoj.”

Tiam mi ja leviĝis kaj prenis mian harpon, kaj metante ĝin sur la etan ŝtonan tablon mi starante tuŝis la kordojn dum mi meditis pri tio, kion kanti al li. Finfine mi kantis jene:

“Malvarmeta estas la aŭtuna vento. Klara estas la aŭtuna luno. La mortintaj folioj falas kaj disas; Korvo frapita de frosto ekflugas de la arbo. Kie vi estas mia karulo? Ĉu mi refoje renkontos vin? Ho, ĉi-vespere ploras mia koro, mi estas sola!”

Tiam tiu trista rekantaĵo eĥis ĉiam denove de la kordoj, longe post kiam miaj fingroj ĉesis tuŝi ilin. “Sola Sola Sola”. La vento kaptis la eĥon, kaj baldaŭ la ĝardeno estis plena de tiu morna sono. Ĝi vibris strange en mi kaj revokis mian malĝojon, kiun mi estis forgesinta dum horo. Tio estis la malĝojo de mia patrino. Mi leĝere metis la manojn sur la kordojn por ĉesigi ilian ĝemadon. Mi diris:

“Estas mi, mia sinjoro, kiun la harpo malŝatas. Estas mi, kiu malĝojas, mi la muzikanto. Kaj la harpo ĝemas de si mem.

“Malĝojas?” Li leviĝis, kaj reveninte al mi, li prenis mian manon.

“Estas mia patrino”, mi diris mallaŭte, kaj mi aŭdace ripozis la kapon dummomento kontraŭ lia brako. “Ŝi malĝojas kaj ŝia tristeco parolas al mi tra la harpo. Temas pri mia frato. Mi sentas ŝian maltrankvilon ĉi-vespere. Ĉio maltrankvilas, atendante lian alvenon. Ŝi nun havas neniun krom lin. Inter ŝi kaj mia patro ĉio finiĝis jam antaŭlonge, kaj nun eĉ mi apartenas al alia familio, al la via.”

Mia edzo diris nenion unue. El lia poŝo li prenis fremdlandan tabakon kaj eklbruligis ĝin. Finfine li parolis per trankvila voĉo.

“Vi devas esti preparita”, li diris. “Plibonas alfronti la veron. Li verŝajne ne obeos vian patrinon.”

Mi estis alarmita.

“Ho, kial vi pensas, ke li ne obeos?” mi demandis.

“Kial vi opinias, ke li ja obeos?” li responde demandis, blovante nubojn de tabakfumo el lia buŝo.

Mi malproksimiĝis de li.

“Ne, ne respondu per demando. Mi ne scias – mi ne estas lerta – precipe ne pri rezonado. Se mi havas veran kialon, tio estas, ke oni instruis al li, ke obeemo al siaj gepatroj estas la fundamento de la ŝtato kaj devo de ĉiu filo.”

“Malnovaj fundamentoj estas rompiĝantaj – jam rompiĝis.” Li interrompis min kun signifoplena rigardo. “Nuntempe oni bezonas pli fortajn kialojn!”

Mi eksentis dubon dum li parolis. Tiam mi memoris sekretan pensaĵon, kiun mi neniam elparolis kaj kiu konsolis min. Jen mia sekreta pensaĵo:

“Sed fremdlandaj virinoj estas tiel malbelaj!” mi flustris. “Kiel viro el nia raso povas edziĝi kun tiaj? Iliaj propraj viroj, kompreneble, ne havas elekton, sed – ”

.

Mi silentiĝis, ĉar mi hontis paroli tiel pri viroj antaŭ mia edzo. Tamen kiel viro povus deziri tian virinon, kian ni vidis antaŭ la naskiĝo de nia filo? Kiaj helaj plataj okuloj kaj paliĝintaj haroj, kiaj malfajnaj manoj kaj piedoj? Mi konis mian fraton! Ĉu li ne estis filo de mia patro, kaj ĉu mia patro ne ĉiam amis super ĉio la belecon de virinoj?

Sed mia edzo mallonge ridis.

“Ho! Ne ĉiuj ĉinaj virinoj estas belaj, kaj ne ĉiuj fremdaj virinoj estas malbelaj! La filino de Li, al kiu via frato estas fianĉigita, ne estas belulino, laŭ tio, kion mi aŭdas. Ili diris en la teejoj, ke ŝiaj lipoj estas tro larĝaj – ke ili kurbiĝas malsupren kiel rizfalĉileto.”

“Kiel la ripozemuloj en la teejoj aŭdacas paroli pri tiaj aferoj?” mi indigne kriis. “Ŝi estas respektinda fraŭlino el nobla familio!”

Li kuntiris la ŝultrojn.

“Mi nur mencias kion mi aŭdis, kaj kion via frato verŝajne ankaŭ aŭdis”, li respondis. “Povas esti, ke tia babilado plifaciligis al lia vaganta koro, la vojon al alia virino.”

Ni restis silentaj dum momento.

“Kaj tiuj fremdaj virinoj!” li diris dum li pensante daŭrigis fumi. “Iuj el ili estas belaj kiel la Blanka Stelo! Klaraj okuloj – liberaj korpoj – .”

Mi turniĝis kaj grande malfermis la okulojn direkte al mia edzo. Sed li ne vidis min. Li daŭrigis.

“Tiuj belaj, nudaj brakoj! La fremdulinoj tute ne posedas tiun artefaritan modestecon kaj deteniĝemon de niaj virinoj, mi povas konfirmi al vi. Ili estas liberaj kiel la suno kaj la vento; per ridado kaj dancado ili povas pluki koron el viro kaj lasi ĝin gliti tra siaj fingroj kiel sunlumo, kaj lasi ĝin langvori sur la tero.”

Mia spiro haltis dum momento. Pri kio li, mia edzo, tiam parolis? Kiu fremdulino instruis tion al li? Mi sentis subitan amaran koleron leviĝi en mi.

“Vi – vi jam” mi balbutis.

Sed li nee skuis la kapon ridante iomete pri mi.

“Kia virino vi estas! Neniu iam detruis tiel mian koron. Mi iel ĝin gardis ĝis – “ Lia tono falis en tenerecon, kaj mia koro rekonis tion, kaj mi trankviliĝis.

“Sed estis malfacile, ĉu ?” mi flustris.

“Nu, jes, iufoje. Ni viroj ĉinaj estis ĉiam apartigitaj. Niaj virinoj estas detenemaj, prudaj. Ili rivelas nenion. Kaj al viro juna, kaj via frato estas juna, tiuj aliaj, tiuj fremdulinoj kun sia bela cigno-blanka karno, sia ravega korpo prezentas sin en la danco.”

“Ĉit, mia sinjoro,” mi diris digne. “Tio estas vireca parolado. Mi ne intencas aŭdi tion. Ĉu tiuj homoj estas vere tiel senkulturaj kaj sovaĝaj kiel ili sonas sur viaj lipoj?”

“Ne”, li respondis malrapide. “La kaŭzo parte estas ke ilia nacio estas juna, kaj la juneco prenas plezuron en krudaj formoj. Sed mi parolas pri tio, ĉar ankaŭ via frato estas juna. Kaj eĉ se vi ne volas aŭdi tion, oni ne forgesu ke la lipoj de lia fianĉino estas larĝaj kaj kurbitaj kiel rizo-falĉileto.” Li ridetis refoje, kaj sidiĝinte li komencis fiksrigardi la lunon.

Mia edzo estas saĝa. Mi ne povas facile ignori liajn vortojn. El tio kion li diris, mi ekperceptas ke ekzistas ia pasanta ĉarmo koncerne la malkovrita karno de tiuj fremdaj virinoj. Aŭdante liajn vortojn mi maltrankviliĝas. Tio memorigas min pri la brilantaj okuloj kaj la ridado de mia patro kaj lia favorita konkubino. Mi tremetas, tamen mi ne povas deturni mian penson al alia afero.

Mi tial cerbumis. Estas vere, ke mia frato estas viro. Aldone, lia daŭra silento estas malbona antaŭsigno. Jam en sia infanaĝo, li plifortigis sian decidon per silento. Kiel infaneto, kiam patrino malpermesis al li ion, Ŭang Da Ma diris, ke li subite fariĝis silenta kaj ekprenis la aĵon des pli malcedeme.

Mi metis la harpon en ĝia lakita ujo kun suspiro. La luno estis tute cedinta al la nuboj, kaj leĝera pluvo ekfalis. La etoso de la nokto ŝanĝiĝis; ni eniris la domon. Mi malbone dormis. ◆ (*daŭrigota*)

Letereto de poeto al poeto

(pri vivo kaj arto poezia)

Blazio Vaha



Legis mi, jam legis,
estas mi leginta,
vian poemeton
trovis mi leginda.

Vi emfazas prave,
ke la suno brilas
nur, se samsekunde
ĉarma birdo trilas.

Ankaŭ pri la luno
vi asertas prave:
estas ĝi tre bela
nur se lumas brave.

En la lasta strofo
mankas al mi grilo,
kiu violonus,
ĝis la suna brilo.

INFANKANTO

Li Weilun

Pura mano,
sen malsano.
Ofta bano,
bona sano.

AŬTUNA EKSKURSO

Li Weilun

Levis sin la sun’.
Ni ek-iru nun.
Al la bela kamp’
de la fruaŭtun’.

Jaga (9)

Daŭrigante la enhavon de numero 006

Aŭtoro: *Maksim Boĉkarev*

elrusigis *Sergei Isakov*

La pasinteco revenas

La leganto verŝajne interesiĝas pri la demando: kio pri Sur? Ĉu li vere rezignis trovi Bajanan? Ve, ne! Lia animo tute ne heliĝis. Kaj post la malvenko de Alaj en la Sonora Arbaro, li ne sidis senlabore. Liaj plej bonaj leporhundoj serĉis Bajanan. Kaj Seas Sopbul persone sekvis ĉiun paŝon de Alaj. Laŭeble, kompreneble. Seas estis ruza, inteligenta, pli maljuna spirito, sed li estis tre, tre malproksima de la kapabloj de Alaj, kaj tial li alterne perdis lin el vido, pro kio li regule ricevis "frapon laŭ ĉapelo" de Sur, kies fiero ne permesis lin mem okupiĝi pri tia humiliga agado, kiel gvatado.

Sur, kiel ĉiuj granduloj, kaj li estis ĝuste la granda, malgraŭ sia mallumo de la naturo, okupiĝis pri kolektado kaj analizo de informoj. Li pensis kaj planis, kaj mi devas diri, tre sukcese. Ne ricevinte elstarajn rezultojn en la serĉo de Bajana, li decidis koncentri ĉiujn siajn klopodojn pri venĝo kontraŭ Alaj.

Li divenis, ke estaĵoj el pasintaj epokoj estas kaŝitaj en la palacoj de Alaj. Mi eĉ ne divenis, sed mi certe sciis. Kaj ĉi tio estis la perfekta fakto por lia venĝa plano. Kaj la plano estis simpla: la Plejaltulo neniam pardonos Alajon se pasintaj epokoj reviviĝos en la nuna. La puno por tio estos severa, kaj tiam Sur fariĝos la plej potenca el la Superaj Spiritoj de la Tero. Tiam Bajana ne havos tian fortan patronon, kaj li traktos la ceterajn ŝiajn propetantojn. Seas Soos Sopbul distingiĝis, kiel ĉiam. Li plurfoje raportis, ke li perdis de vido Alajon pli ofte ol kutime en la regiono de Verdaj Montoj. "Perdas vidon" - tio signifas, ke Alaj certigas, ke neniu, ĉu homo aŭ spirito, povas vidi lin. Kaj Sur pensis: kial la Verdaj Montoj? Kio tiom ofte allogas Alaj orienten?

La plej bonaj el la plej bonaj leporhundoj de Sur estis senditaj por helpi al Seas. La Verdaj Montoj kaj la tuta Orienta Regiono estis laŭvorte plenigitaj per la okuloj kaj oreloj de Sur. Ili ĉiuj atendis nur unu aferon - ke Alaj forlasos la Orienton. Kaj tiel okazis. Alaj forlasis la Verdajn Montojn kaj iris ien en la sudokcidenton, kio tuj estis raportita al Sur. Kaj li ordonis studi ĉiun angulon, ĉiun fendon en la ŝtonoj.

Seas Sopbul propre partoprenis la serĉon. Estas nur unu kapto - estas malfacile serĉi "tiun aferon, kiun vi ne scias kion." Seas estis sincere certa ke ili serĉis la knabinon kiu estis savita de Alaj en la malĝusta tempo en la Sonora Arbaro. Kaj por ĉiuj aliaj, la tasko estis laŭvorte ĉi tio: trovi tion, kion Alaj tiel protektas en ĉi tiuj lokoj.

Kaj tiel la Severa Bando, serĉinte ĉion sur la surfaco, komencis malsupreniri subtere. Ĉar ĉiuj scias, ke la Verdaj Montoj estas plenaj de terenfaloj kaj kavernoj kiuj iras profunde subtere. La sanghundoj, gviditaj de Seas, iris pli kaj pli profunden, sed trovis neniun kaj nenion. Ili eĉ ne trovis spurojn de iu ajn dum sia longa serĉado.

Mi devas diri, ke Seas havis eksterordinaran instinkton. Kaj ne nur sentemon, sed instinkton! Kun ĉiu ĉelo de lia estaĵo, li sentis, ke tre baldaŭ okazos al li io tre, tre malagrabla, sed ordono estas ordono, necesas serĉi.

Ankaŭ ĉi-foje liaj instinktoj ne perfidis. Li estis la unua el la leporhundoj se temas pri renkonti unu el la sekurecpostenoj singarde starigitaj fare de Alaj. Kaj staris ĉe tiu posteno Duka kaj Tes, la pli aĝaj spiritoj de la subteraj akvoj. Se ili estus homoj, ili estus nomitaj ĝemelaj fratoj. Ili estis kiel du pizoj en silikvo, kaj en aspekto kaj en estado. Duka kaj Tes estas inter la plej potencaj spiritoj de la Tero en batalo. Ili ankaŭ estas ege afablaj kaj tute naivaj. Ili ne estas strategiistoj aŭ inventistoj, ilia forto estas en ilia forto. Kaj ne bone iĝos por iu ajn, kiu decidas engaĝi ilin en malferma, brusto-al-brusta batalo.

Se Ceas scius, kiun li renkontos hodiaŭ, li kompreneble sendus iun alian antaŭen. Tiel estis konstruita lia malnobla naturo. Sed ĉar li volis akiri favoron ĉe la posedanto, li devis esti en la avangardo.

Duka kaj Tes, kiel mi jam diris, ne estis same ruzaj kiel Seas. Sed ili estis puraj kore kaj plenumis sian servon honeste. Ili sciis unu aferon: Alaj diris, ke neniu preterpasu ilin, kaj ili faris sian laboron konscience. Kaj mi devas diri, ke ili neniam atakis de malantaŭe. Kaj nun ili eliris antaŭ Seas malkaŝe kaj tre ĝentile petis lin foriri. Sed Seas sciis, ke tuta aro da diversaj spiritoj sekvas lin. Kaj ĉi tiuj du "stultuloj", kiel li priskribis al si la ĝemelojn, ne ŝajnis al li grava minaco.

"Foriru de mia vojo!" - Li arogante alparolis la sufiĉe ĝentilajn gardistojn. Post tiuj ĉi vortoj, li longe ne povis paroli. Kaj post tio, kiam li rekonsciiĝis, li tre ĝojis, ke pluvivis kaj ne iris al la juĝo de la Plejaltulo. La fratoj Duka kaj Tes, vidante, ke la neinvititaj gastoj ne eliros el la domo, faris tion, kion ili devis fari. Ilia unua bato simple forblovis ĉiujn, kiuj kaptis ilian atenton. La leona parto de la "regalo" venis al Seas, kompreneble.

La batalo estis mallonga. Alaj sciis la kiu konfidi gardon. Ĉiuj la leporhundoj de Sur estis repuŝitaj. Kaj ne nur forĵetitaj, sed senkapabligita por longa, longa tempo. Estis nur unu afero, kiun la saĝa Alaj ne konsideris - la ĝemeloj, kiuj tro longe senlaboris, tre brue "laboras". Ili estis tiel lacaj de la batalo, ke ili ne kalkulis sian forton. Kaj la muĝado kaj tondro de la batalo disiĝis malproksimen ĉirkaŭ tiuj lokoj. Kaj ne nur...

Tuj kiam la batalo finiĝis, kaj la kontentaj fratoj reciproke gratulis sin pro la venko, terura muĝado aŭdiĝis en la profundo de la kaverno sub la monto. Estis silento, kaj la muĝado denove ripetiĝis. La fratoj rigardis unu la alian kaj rapidis laŭ la sekretaj trairejoj kaj vojetoj. Ili sciis kio okazis, sed ili ne volis kredi tion. La reptilio, kies dormon ili gardis dum multaj jarmiloj, vekiĝis. Alaj ankaŭ sentis tion, sed li estis malproksime oriente. Kaj liaj propraj sorĉoj, kiujn li ĵetis sur la vintrolokojn de reptilioj kaj aliaj estaĵoj el pasintaj epokoj, ne permesis al li trovi sin tie tuj. Li malŝparis altvaloran tempon. La reptilio ne perdis tempon. Ĝi vekiĝis kaj malsatis. Ne estas ŝerco dormi tiel longe kun malplena stomako. Kaj ĝi marŝis laŭ la kurbiĝema fluejo de sekiĝinta subtera rivero. Ĝi provis plurfoje ekflugi, sed ne estis sufiĉe da loko por ĝia enverguro.

Duka kaj Tes rapide atingis la vekitan reptilion. Ili havis nur unu demandon: kion fari? Alaj strikte malpermesis mortigi la reptilion dum ĝi estis en lia posedo. Damaĝo povus esti kaŭzita al ĝi nur se ĝi provus eskapi al la supro. Kaj ili iris: la rampulo estis antaŭe, kaj ĝiaj du gardistoj estis malantaŭ ĝi. Ho, se la ĝemeloj scius, kiel ĉio finiĝos, ili malobeus la malpermeson kaj tuj atakus la reptilion. Sed ili estis vere afablaj, kaj eĉ ĉi tiu grandega terura estaĵo ne vekis en ili deziron mortigi. La fratoj perfekte rememoris la epokon, kiam la tero estis loĝata de tiaj reptilioj, kaj vidis en sia kvartalo nur memoron pri pasintaj tagoj.

La reptilio ne spertis tiajn sentojn. Ĝi estis malsata kaj graveda. Kiam ĝi venis ĉi tien, serĉante azilon, ĝi jam estis preta demeti ovojn. Sed ĝi malsukcesis ĉar Alaj sorĉis ĝin, kaj ĝi ekdormis. Ŝajne, ĝiaj idoj en la utero ankaŭ falis sub ĉi tiun sorĉon kaj frostiĝis en sia dormo kune kun sia patrino. Nun, kiam ĝi vekiĝis, vekiĝis ankaŭ la estontaj idoj, kaj ili elrapidis. La reptilio latente komprenis, ke ĝia idaro estas kondamnita ĉi tie kaj ke ĝi devas serĉi elirejon al la surfaco, kie estas suno kaj manĝaĵo. La fratoj gardantaj la reptilion, kaj Alaj mem, tute ne sciis, ke ĝi estas preta meti ovojn, kaj tio ne ludis en ilia favoro. Ĉar estas nenio pli forta sur la Tero ol la patrina instinkto. Estis ĝi, kiu pelis la reptilion supren. Kaj kiam la fratoj komprenis, ke ĝi memoras la vojon, laŭ kiu ĝi venis ĉi tien antaŭ sennombraj jaroj, ili decidis haltigi ĝin. Sed, mi ripetas denove, ili ne konsideris la potencon de la patrina instinkto. La reptilio elspiris venenan gason kun tia forto kaj rapideco, ke Duka kaj Tes simple ne havis tempon por fari ion ajn. Kaj nur ilia granda forto ne permesis al ili fini sian surteran vojaĝon, sed ili estis senakceptaj dum tre longa tempo.

La reptilio rampis kaj rampis supren, kaj al ĝi fariĝis ĉiam pli malfacile spiri. Dum ĝi dormis, la aero sur la planedo ŝanĝiĝis. Ĝi komprenis, ke ĝi ne povos spiri ĝin sufiĉe longe kaj ankaŭ ne povos produkti venenajn vaporojn, do ĝi rapidis per ĉiuj fortoj. Kaj tiel ĝi eliris. La suno blindigis ĝin. Ĝi etendis siajn grandegajn membranecajn flugilojn, faris plurajn eksperimentajn klapojn kaj brue ŝvebis supren. La ombro de ĝiaj flugiloj kovris la teron, kiu delonge ne vidis ion similan. La reptilio estis en malespero. Estis malfacile por ĝi spiri, kaj ĝi timis, ke ankaŭ ĝiaj idoj ne povos digesti la nunan atmosferon. Sed aliflanke, en kavernoj ĝi estas kondamnita al malsato. Kaj ĝi komencis serĉi lokon por ovumi.

Ĝi faris la unuan ovodemetadon relative proksime al la Verdaj Montoj kaj du pliajn okcidente de ili, kiom ĝi povis. Ne plu restis io por kontentigi ĝian malsaton kaj batali por la vivo, kaj ĝi falis ien meze de la senfinaj verdaj stepoj. Ĝia flugo finiĝis por ĉiam. Sed ĝiaj idoj ankoraŭ prezentos "surprizojn" al homoj kaj fariĝos parto de epopeoj kaj legendoj, kiuj pluvivis ĝis hodiaŭ, sed, kompreneble, en iom plibeligita formo. Kaj inter la homaj triboj aperos tuta galaksio da militistoj-herooj, kiuj ankaŭ estos inkluzivitaj en la epopeoj, sed kiel mi ŝatas diri, pli pri tio iom poste... ◆

LA ĜOJA MEMORO...

Vullnet Mato

Tradukis:
Bardhyl Adem Selimi

Kiam ajn mi memoras vin el malproksime,
via ĉarmo ree min ebriigas.
Mi sentas en la spiro aromon de zambako,
la koro, kiel birdo, ekbatas!

Vi venas subite, kun la iamaj memoroj,
kaj vivtenas min la ĉiamaj sonĝoj,
alportas al mi en menson la sekretajn renkontojn,
kiam vi estis mia gaja rideto!

Vi estis la kanto, kiu restis ĉe mia orelo,
estis la najtingalo, kiu kantis en la arbaroj,
estis la stelo, kiun mi ofte serĉis per la okuloj,
kiel sub ĉielo kun miliardoj da steloj.

Vi estis mia zambako, interne de la animo,
kiu malvarmigis mian koron por amo!...
Mi venis kiel la suno en tagoj de vintro,
dolĉigis la lipojn per la nektaro, kiun gutigis vi.

Mi jam direktis la okulojn al ĉiu beleco tra epokoj,
sed ĉe vi mi lernis ami.
Mi prenis kuraĝon el tiu via koro,
por teni viva la pasintan tempon...

Por vi, la sopiro ankoraŭ min tenas veka,
kaj vagadas tra tiuj junecaj imagoj,
kiam mi evitis la spionajn okulojn,
por ke ne malhelpus vian virgan belecon.

Se la pasintaj jaroj denove min vokos,
antaŭ ĉio mi certe venos al vi!
Por kisi forte tiujn flamiĝintajn lipojn,
kaj trinki ĉe vi gluton da amo!...

Mi venos denove, kun tiuj paŝoj de espero,
mi venos, kiel mi venadis, tute ridetante,
por sorbi tiujn lipojn kun gutetoj de ŝvito,
kiuj tremis de la kaŝita deziro!...

Vi estis bela, feino, kun soifo brulanta,
kun okuloj rekte al la koro por sagi.
Vi estis pli ol la sepa miraklo,
sed por mi, vi ne estis skribita sorto!

Vi ....

Lilaketo

Sunas,

sed vi, kara, neniam vidas la sunlumon.

Pluvas,

sed vian haŭton neniam tuŝas la pluvo.

Ventas,

sed kun viaj haroj la vent' neniam ludas.

Neĝas,

sed la blankon viaj okuloj neniam vidas.

Mi amas vin,

kaj timas, mian koron vi neniam tuŝas.



Forpasis...

Lilaketo

Vojrande abio maljuna staris,
kvazaŭ en neĝa tempo klaris,
kaj du paruetoj, helaj kaj mildaj,
jen,proksime unu al la aliaj.

La vento ludis silente kun ili, kaj vespero ĉirkaŭbrakumis nin.
Donacoj ne estis por nia domo,
Nur blanka silento en nia koro.

Malvasta la vintro, sed koro kreskas,
se du etaj birdoj ja kunekas,
La hela pasintec' kanteton donis,
eĉ la malriĉulo miron ekkonis.

Ombroj sur la strato ridetis pri ni,
Amo kapablas ĉion travivi...
Kvardek jarojn poste nur restas en mi:
Sur la branĉo du varme tremantaj bird' ...

Mi staris kun infana koro tie
trans la fenestro io vokis ien
Ankaŭ la abio kliniĝis al mi,
paruetoj feliĉon povis montri.

Ne estis miraklo pakita bele,
nur du koretoj, muzike, dolĉe
kaj tiam mi sciis: riĉa mi estas,
se tian donacon mi ekricevas.

Jes, ankoraŭ mi vidas fermokule,
la tiaman nokton kristnaskan mute,
Sub la lun' kanto de du paruetoj
tiel ridetis al mi la momento.

Ne estas trezor' pli kara kaj vera,
tion gardis la memoro hela,
el vintro naskiĝis varma mesaĝo:
ploretanta espero en mia kor'.

Decembra nokto

Jadranka Miric

Lumigitan fenestron en ĉi malfrua hor'
desegne ornamas vintro.
La ĉielo kiel Kristnaska arbo
tremante brilas en senfina for.
Tremas brila stelar'
kvazaŭ atakis ilin
sennombra ĉiela abelar'
dum luno kurbiĝinta salutas nin.
En urbo forta bruado aŭdiĝas
nur la birdaro kvietiĝas.
Luno antaŭ tagiĝo sekrete kisas
la plej brilan stelon honte kaj foriras.

Naskiĝis Amo!

Stanislao M Esposito

En la nokto plej silentiĝa
milda spiro ŝanĝis la mondon.
Ne estis loko, sed ĉielo atendis —
kaj la Lumo trovis hejmon.

Infaneto kuŝas en tempo,
en la manoj de patrino humbla.
Kaj en la ploro, kiu vivon malfermas,
ekbrilas l'etern' senfina.

Naskiĝis Amo, naskiĝis por ni!
Gloro en ĉieloj, paco laŭkor!
Naskiĝis Amo, lumo ĉe ni —
Dio fariĝas kanto en ni!

Mi vidis nokton fariĝi tago,
la ombrojn fali for de l'koro.
Ĉiu timo dissolviĝas en rideto —
Dio spiras ene de mia nomo.

Kaj stelo super la silento
nin revenigas al vero:
ke Amo naskiĝas kie doniĝas,
kie iu scias pardoni.

Kaj la tero kantas "jen mi!",
la nokto cediĝas al tago.
Tuta vivo revenas al Li —
la Vorto fariĝas Amo eterna.

Naskiĝis Amo, lumo de mondo,
paco senfina en tagoj de l'homo.

KRISTNASKA BENO

Elena Popova

Steloj brilas forte - por Kristnasko kantas.
Dian amon portas, Dian vojon montras.
Kristnasko ja venas kaj Dio nin benas!
Kun la cerva sledo aĝul' donacojn portas,
de radi' sanktigitaj, de Dio benitaj.
Sonoras la sledo - ni al Dio kredu!

KRISTNASKAJ RENKONTIĜOJ

Elena Popova

Dum ĉi tiuj antaŭferiaj tagoj, la vetero estas malvarmeta, sed agrabla. La stratoj estas plejparte plenaj de maljunuloj, kiuj iris serĉi donacojn aŭ aĉeti ion por la venonta Kristnasko kaj Novjaro. En ĝardeno, mi vidis tiun strangan maljunulon kun blanka barbo kaj ruĝaj vestaĵoj – Avo Kristnasko. Infanoj fotiĝis kun li kiel suveniro. Mi ne ridetis, en mia malriĉa infanaĝo Avo Kristnasko ne venis por alporti donacojn...

Mi renkontis mian iaman koleginon kaj ni komencis babili. Nadja diris al mi kun rideto:

- Ĉu vi vidis la avon Kristnasko?

- Jes! Estas normale, restas kelkaj tagoj ĝis la ferio, mi respondis.

- Mi volas rakonti al vi pri renkontiĝo antaŭ kelkaj jaroj, kiu impresis min. Mi konas artiston, kiu estas tre serioza kaj kutime ne ridetas, sed tiam lia vizaĝo brilis. Mi demandis al li, kio okazis, kaj jen kion mi aŭdis.

- "Nadja, vi ne kredos, kio okazis al mi,"- li komencis kun rideto."La vetero estis bela kaj mi iris al la parko por pentri. Subite, avo Kristnasko, kiun mi ne rimarkis, alproksimiĝis al mi.

- Kian belan pentraĵon vi komencis!... Vojo, la rado de la vivo...
  Kaj li ekparolis, kvazaŭ li legis mian animon. Mi rigardis lin surprizite - juna vizaĝo, sed tiom da saĝo...

- Sed io mankas en la pentraĵo - la spirito de la bona maljunulo mankas. Bonvolu desegni lin tie, ĉe la fino, kiel Kredo!

- Sed la pentraĵo ne estas por Kristnasko, mi respondis kun iom da tristeco en mia voĉo. - Ĝi estas la Vojo, kiun ni devas iri en niaj vivoj. Prefere, mi devas desegni krucon, ĉar nia vivo estas malfacila...

- Se vi daŭre pensas pri malfacilaĵoj, la estonteco estos tia...
  Vi scias, kion ni baldaŭ festos, ĉu ne?"- li rigardis min per siaj profundaj, brilaj okuloj. - La naskiĝo de la Savanto de la homaro, Tiu, Kiu alportis la Amon.

- Sed kion li rilatas al Avo Kristnasko?

- Sendepende de la celo, por kiu ĉi tiu bildo estis kreita, li portas la Spiriton de espero por la Bono, kiu certe venos. Li alportas ĝojon al infanoj…

Subite li staris apud mi, elprenis sian telefonon kaj diris: - Ridetu!" Kaj - klakis… Mi vidis min en la foto, ridante per mia tuta koro. – Jes, ĉiam ridetu! La rideto estas ponto al aliaj. Vi estas bona homo, via animo estas plena de beleco, kiun vi fordonas…

Kaj same nerimarkite kiel ĉi tiu mirinda maljunulo venis, li malaperis. De tiam mi ĉiam ridetis - al la tago, al la memoro, al la suno aŭ la neĝo, al la homoj… Kaj ŝajnas, ke mia vivo fariĝis pli facila.

- De tiam mi ankaŭ ĉiam ridetis… - diris Nadja. – Ĉu vi rimarkis, ke la tago estas pli bela, kiam vi ridetas al la beleco ĉirkaŭ vi? Venu, ni iru al tiu avo Kristnasko kaj fotu nin, kun espero pri la Bono, kiu atendas nin!

- Kaj ĉu vi scias, kiu estas la prototipo de Li?

- Ne!

- Sankta Nikolao de Mira, la Miraklisto, kiu helpis homojn. Kaj multe pli poste li fariĝis nia konata portanto de donacoj kaj bonaĵoj...

- Dankon!

Ni foriris, du maljunulinoj, plenaj de espero!

Gajan Kristnaskon! Estu la Nova Jaro hela kaj plena de Bonfaroj! ◆

La memoro de la lumo

Stanislao M Esposito

Mi vidis maron dormi en la vitroj,
kaj laca anĝel’ haltis ĉe la trinkejo.
La urboj kantis malalte sian preĝon
sen altaro, perdite en la nokto.
Mi aŭdis spiron de somera vento,
la sablo skribis nomojn por forviŝi.
En miaj okuloj restas viva spuro
de tio, kion mi ne povas forgesi.

Kaj revenas la memoro de la lumo,
ĝi falas trankvile ĝis en mian koron.
Nenio perdas sin: ĉio ŝanĝiĝas,
kiel reflekt’ sub akvo flu’ foriras.

Inter la ruinoj de miaj pensaj tomboj
mi trovis floron, kiu ridas pri si.
La sonoriloj batis strange inverse,
kvazaŭ la tempo turnus sin malantaŭen.
La scienco serĉadis altajn stelojn,
kaj fido plugis en la kor-silentojn.
Mi mem serĉadis unu solan vorton,
kiu spiras, restinte en la plena mondo.

Kaj revenas la memoro de la lumo,
ĝi vekas min, kaj poste igas flugi.
Tra ĉiu ombro, tra ĉielaj hejmoj
leviĝas kanto, kiu scias preĝi.

Distanco ne ekzistas inter pensoj,
nur vibroj, kiuj serĉas unu la alian.
La lumo ne memoras plu la nokton:
ĝi milde ŝanĝas ĝin al pura koloro.

Kaj revenas la memoro de la lumo,
trans via menso, en eternan trankvilon.
La animo ridas dum la karno ĉesas,
kaj en sia paco ĉio pleniĝos.

La Suno Brilas

Christopher Lee Scoville

La homaro estas kiel arbo sur prerio. Antaŭ jaroj, ni vidis nian ombron per la sunleviĝo, vekiĝante ni ambaŭ el longa dormo. Dum la natura moviĝo de la suno, nia ombro ŝrumpis ĝis tagmezo, kiam ĝi esence malaperis. Ni ne povis vidi la melhelan flankon de nia ekzisto. Sed nun, per la daŭra moviĝo de la sama sankta suno, ni denove komencas vidi nian ombron, kaj ĉiutage ĝi kreskas. Fidu, kaj kredu ĝin, Popolo, ĉiuj pridubos siajn kredojn. La tago daŭras, la sunmoviĝo daŭras, kaj kvankam nia ombro nun kreskas, ni estas la sama arbo ankoraŭ, eble iomete pli grandaj per nia kreskiĝo, sed la sama arbo tamen. La aferoj rapide ŝanĝiĝas, Popolo. Ĉiuj pridubos siajn kredojn. Vekiĝu! La suno brilas! ◆

S117 STRATO–
LUNDO HORARO

Su Fidler Cowling

Laŭ la klaĉado, ĉi tiu dombloko de S117 Strato taŭgis por murdoj. Neniu loĝis ĉi tie, almenaŭ neniu respektinda. La butikoj, neniam rendimentaj, estis delonge malplenaj, eĉ la cigaro/bierejo. Kelkaj fenestroj montris kuglo-truojn, kiel etaj steloj en la malpura vitrino. Rubo amasis en la stratkanaleto. Ratoj. Elpafita stratlampo.

Laŭ klaĉado, Flava Hundo estis la stratestro. Flava Hundo estis, nu, granda flava hundo kiu--post rabi vespermanĝon malantaŭ la S116 taverno--ofte revenis al S117 por dormi en la sojlo de la malplena perukejo. Li kaj la ratoj konsentis malkonsenti civile. Simile, tiun lundan nokton, la hundo malatentis la malpaciencan viron kiu staris apud la forlasita ilo-kaj-boto vendejo.

La viro staris apud la pordo, sed ne apogis al tiu, pro la malpureco, la deskvamiĝa verniso, kaj la nur-dio-scias makuloj sur la pordo. Li atendis tie kun manoj en la poŝoj de la kaki-pantalono, fiksrigardante trans la strato. Kelkfoje li rigardis lian brakhorloĝon. Li surhavis boata-ŝuojn, puran helbluan ti-ĉemizon, laŭmodan hartondon, rondajn okulvitrojn. Verŝajne li nomiĝis Malkom. Oni ne certis, ĉu Malkom atendis ian viktimon por murdi, aŭ ĉu li atendis lian propran murdon.

Dume, super li sur la tegmento de tiu konstruaĵo, kuŝis Kvieta Ken. Li kuŝis surventre kun fusilo metita tra truo de la brika fasado, celante laŭ la strato. KK kapablis spioni tra la truo laŭ la strato, sed li ne kapablis vidi rekte malsupren, sekve li ne povis vidi Malkom suben en la vendeja sojlo. Ĉiuokaze, la silento kaj la malpleneco de la strato malkvietigis lin. Li momente demetis okulojn de la strato por ke serĉis maĉgumon en la fusila valiso.

Flava Hundo sciis la kuŝlokon de tiu ulo, sed ne ĝenis sin rimarki lin.

Trans la strato en forlasita apartamento en la dua etaĝo, kaŝis juna virino kun okulfrape verda hararo. Kejt. Malgraŭ hararo, Kejt surhavis nigran vestaĵon, de kolo al piedfingroj. Malgrasa kaj pala, trankvila pro jogo plus manko de timo aŭ konscienco, ŝi ne spionis la straton. Ŝi kuŝis surdorse, fiksrigardante la plafonon, pripensante pikilojn. Ŝi estis lerta faristino de bomboj, tamen lastatempe ŝin interesis la nocio de blova sago.

Finfine, de la oriento de la dombloko, alvenis ia ordinara avino. Ŝi estis malalta kaj korpulenta, blanka hararo en harnodo, prudentaj ŝuoj, flora antaŭtuko. Ŝi haltis ĉe Flava Hundo kaj karesis lian kapon, gratis lian orelon. De butikuma sako ŝi elmetis iom freŝbakitajn kuketojn, kiujn ŝi metis apud li. Poste, ŝi daŭris marŝi laŭ la strato.

"Saluton, ĉiuj!", ŝi alvokis, dum ŝi direktis sin al la sojlo de la kaŭcia ofico. "Pardonu mian malfruecon, karaj!" Ŝi ridetis, skuis la kapon, serĉis en la sako la aŭdilon. Ankaŭ en la sako ŝi portis la etan Derringer-pistolon, la plenfortan ŝoki-pistolon, kaj la stileton. Tamen, ĉi-momente ili ne necesis. Ŝi enigis la aŭdilon en la orelon. Finfine ŝi al vokis, "Ho, jes, karaj! Pardonu la malfruecon kaj ankaŭ la laŭtvoĉon, ĉu ne? Ho ve, kia tago, ĉu?"

"Ahem," diris Malkom en la aŭdilo.

"Avinjo," diris KK en sia aŭdilo, "vi malfruos por la propra murdo, ĉu?"

"Ĉu?" Kejt diris en sia propra aŭdilo, "Ĉu? Iu aranĝis murdon al Avinjo? Kia? Veneno? Mi lernis pri veneno kun gusto de ĉokolado. Oni povus ...."

"Ahem," diris Malkom. "Bonvolu. Ni komencu la kunvenon." Li elpoŝigis paperon, kaj alĝustigis la okulvitrojn.

"Ahem. Nu, ni havas du aferojn en la tagordo. Ho, kaj memoru, ne registru la procedojn. Nu ...."

Avinjo interrompis. "Kara Malkom, mi ne trovis mian pagadon en la bankkonto. Ĉu vi jam sendis?"

KK diris, "Avinjo, kontrolu la sekretan 'Moriarto-konton'. Mi diris al vi centfojojn, la sekretan konton, kiel diable."

"Ahem. Nu, unue ... Ni havas la temon de Hadeso Haroldo. Li petis alligi la grupon. Memoru ke li estas konfidulo de politikistoj, por bono aŭ malbono. Kaj li estras la Unio de Tombofosistoj. Ĉu ni pretas voĉdoni?"

KK diris, per aŭdilo de la tegmento, "Mi ne fidas tiun ulon. Li fanfaronas. Li saĝumas ĉar li parolas kvin lingvojn. Al diablo lin."

Avinjo diris, aŭdile de la kaŭcia sojlo, "Mi konis lian patrinon. Ŝi estis aĉulino, sed ŝi bakis mirindajn kukojn por la preĝa vespermanĝo. Tiu Haroldo neniam ĉeestis, li neniam eĉ helpis al la panjo porti la kukojn kaj fazeolojn. Maldankema ulo, kaj la tuton kion tiu panjo faris por li! Krom fakte mi ne ŝatis tiujn fazeolojn kun tro da ajlo."

Kejt diris, aŭdile, ankoraŭ fiksrigardante la plafonon, kaj tordante verdan buklon, "Se ni enlasus viron, ni devus ankaŭ enlasi ian inon. Pro la egaleco de la grupo."

Oni povis aŭdi la furzon de KK, kvazaŭ eksplodo en la aŭdiloj. Fakte, okazis samtempe reala eksplodo en S113 Strato, sed tiu ne estis la zorgo de la hodiaŭa grupo. La nazo de Flava Hundo tikis pro la fumo, sed la homoj ne atentis. Oni ofte aŭdis eksplodojn ĉi-flanken de la urbo, kaj kompreneble oni ofte aŭdis KK-ajn furzojn.

Malkom, rimarkante la brakhorloĝon. "Ahem. Do. Tiu pri Haroldo, ni neas. Ni daŭrigas jene: Pasintfoje oni levis proponon pri investado en dronoj kaj memveturi aŭto. Ni konsideru unue la dronoj. Kiu opinias?"

Kejt ĝemis. Ŝi rulumis kaj, tra truo en la fenestro, ŝajnigis celi ŝian hejmfaritan blovpafilon suben al Malkom. Ŝi diris en la aŭdilo, "Ulo, mi jam voĉdonis ne. Mi havas veran lertecon, ĉu? Mi ne bezonas ludojn, ĉu? Mi ne volas pagi por ke Malkom povas ludi per teleregila aviadilo. Ankaŭ, mi jam diris ke tia teleregila, nepersona murdo estas maljustaĵo. Oni havas onian fierecon, ĉu?"

KK diris, de la tegmento, "Mi havis teleregilan boaton infanaĝe. Subeniris unua tage."

Avinjo kriis, "Neniam funkcios! Estos kapricaĵo!"

Malkom, "Avinjo, ne necesas krii. Ni povas aŭdi normalan parolvoĉon per la aŭdiloj. Do, kaj pri la memveturi-aŭto. Oni povus uzi tian aparaton liveri bombon, aŭ redoni ostaĝon, aŭ kiel foriru-aŭto, ktp. Ĉu opinioj?"

Avinjo diris, "Kie oni parkumis? Ĉu vi scias kiom kostas parkumejo nuntempe? Antaŭ jaroj, en mia tago, oni parkumis antaŭ la domo, ĉu? Nuntempe, oni ne povas pagi eĉ por domo, oni devas loĝi kune kun la maldiligenta bofilino kaj tiuj buboj."

KK diris, "Mi ne fidas tiajn damnitajn aferojn. Kial oni ĉiam volas ŝanĝi aferojn? Sekve oni proponos ke ni liveru mortvundon per telepatio. Aŭ trenitaj mortigaj abeloj "

Kejt intermetis,"Mi konas bonan eskapan stirantan inon. Ŝi eĉ havas propran aŭton. Ĝi iras rapide, sed odoras je hundo."

Ambulanca sireno aŭdiĝis malproksime. Ie pli proksime, ia grumblo. La odoro de haŝiŝo. Subite aperis, sur piedoj, de la okcidenta limo de la strato, sola policisto.

Flava Hundo bojis kaj minace leviĝis.

Nu, Se ĉi tiu estus regula bona krimrakonto, okazos la sekvanta:

La policisto diris ian stultaĵon kiel, "Bona hundo. Sidu, sidu, hundo, lasu, bastardo!"

Flava Hundo graŭlis. Ne sidis. Ne lasis. Li nudigas la dentojn kaj kuris direkte al la policisto, kvazaŭ atakante. La policisto etendis treman manon al lia ŝokpafilon, sed ĝin faligis. Li atingis lian realan pafilon. Flava Hundo estis nun tiel proksima ke la viro preskaŭ flaris ĝian malsekan merdan spiron. Li pafis. La hundo nek ĝemis nek kriis, sed subite falis sur la strato, mortigita.

KK kriis "Neee!" Kvankam esence katulo, li sekrete admiris, eĉ enviis, la aplombon de tiu damnita hundo. Kiam la korpo alteriĝis silente en la defluigo, jam mankante animon, KK sentis ke lia propra sango ekmalvarmiĝis, lia racia cerbo malŝaltiĝis. Li ekstariĝis, kriante, "Neeee! Al infero, vi!" Li komencis pafi freneze.

La policisto radiovokis por helpo, kaj dume zigzage kuris laŭ la strato serĉante ŝirmon.

Kejt spektis la agadon de la apartamento, kaj maltrankvile kalkulis opciojn. Fakte, facila decido. Kejt generale malaprobis hazardan perfortaĵon. Kontraŭis militon. Estis pacisto politike. Ŝi eliris la apartamento ŝtelirante el la malantaŭa flanko kaj tiel aperis sur S115, kie ŝi atendis en kafejo ĝis la fumo estingis.

Dume, la policisto trovis ŝirmon, fakte, en la sojlo de la forlasita kaŭcia oficejo kie staris Avinjo. Ŝi movis flanke por fari spacon por li, kaj diris, "Ho, saluton, filo. Ĉu vi bonstatas?"

Li diris, "Kiel diable, panjo! Kion vi faris ĉi tie? Onklino telefonis de la preĝo, ŝi scivolis, kie vi estas!"

Avinjo frapetis lian brakon. "Survoje, filo, mi estas survoje al la preĝo. Ne maltrankvilu, filo."

Kiam KK aŭdis la sirenojn de la alvenantaj policaj aŭtoj, li praktike decidis vivi por batali alian tagon. Li malsupreniĝis de la tegmento per fajroŝtuparo kaj malaperis en kelon sur S111 Strato kie li konservis iom da pafiloj kaj frostigitajn buritojn. Koleriĝi ĉiam malsatigis lin.

La alvenintaj policistoj trovis nenian malkonvenan sur la strato krom alia policisto kaj lia patrino. Kiam finfine li kaj sia kolegoj eliris, Malkom malkaŝiĝis el sia kaŝejo. Li glatigis sian hararon, diris, "Ahem." Li alproksimiĝis al la sojlo de Avinjo, singarde paŝante ĉirkaŭ la mortigita hundo. Li diris al Avinjo,"Do, sinjorino, ĉu vi bonstatas? Ho, kia sperto, ĉu?"

"Ho, certe, kara. Kia sperto," ŝi diris, ridetante, dum ŝi trarigardis en ŝia sako. Naztuko, maĉgumo, ero de oni-ne-scias, kaj ho, jes, la murdaj iloj.

Avinjo ŝokis Malkom ĝis li falis tikante kaj mirante. Poste ŝi metis la stileton tra liaj ripoj kaj en la koron.

Avinjo diris, rigardante dum li agoniis, "Nefidinda boatŝuoj-portante elitisma avara ŝaŭmo. Mi ne havas sekretan Moriarto-konton."

Tamen, tiaj aferoj ne okazis. Ĉi tiu ne estis bona krimrakonto, anstataŭe nur ordinara protokolo de grupa renkontiĝo.

Do, kiam la policisto aperis piede ĉe la okcidenta limo de la strato, Flava Hundo bojis kaj leviĝis, kvazaŭ minacante. La policisto diris, "Nu nu, bona knabo, bona knabo," kaj karesis al ĝi momenton. Li diris, "Sidu." Flava Hundo ĝentile sidis. La policisto donacis fritkukon al la hundo, kiu portis ĝin al ŝatata kaŝejo.

Sekve, la policisto laŭtvokis al la generala strato, "Finiĝis la tempo, murdistoj! La malamikoj de la urbestro atendas ilian vicon!"◆

Antaŭ la spegulo

Angel Arquillos



Antaŭ la spegulo staras
mi kun ege granda plendo
pro mia vizaĝo plena
kaj de faltoj kaj malbelo.

Mia spegulo reflektas
tristan realan sintenon
kun la vizaĝo malgaja
kaj kunŝovita glabelo.

Mian karegan spegulon,
mi nun kovras per kurteno
nigra kiel la malĝojo
por forigi mian revon.



aŭtorino, *Muriel Spark*
(Skotlando)

LA BURĜONAĜO DE FRAŬLINO JOHANA BRODI DE MURIEL SPARK (1)

elangligis *Detlef Karthaus*
(Kanado)

Ĉapitro 1

La knaboj, dum ili parolis al la knabinoj de la Lernejo Marcia Blaine, staris ĉe la fora flanko de siaj bicikloj, tenantaj firme la stirilojn, kiuj provizis protektan biciklan barilon inter la seksoj, kaj donis la impreson, ke je ajna momento la knaboj povus forveturi. La knabinoj ne rajtis demeti siajn panama-ĉapelojn, ĉar ili troviĝis ne malproksime de la lernejaj pordegoj, kaj senĉapeleco estis delikto. Certajn devojigojn de la ĝusta maniero surkapigi la ĉapelon oni preteratentis, kiam temis pri knabinoj el la kvara klaso kaj tiuj pli aĝaj, provize ke neniu portis sian ĉapelon malrekte. Tamen ekzistis aliaj subtilaj variaĵoj de la normala regulo, kiu kondiĉis ke la malantaŭa rando estu kurbinta supren, kaj la antaŭa rando malsupren. La kvin knabinoj starantaj tre proksimaj unu al la alia pro la knaboj, portis siajn ĉapelojn, ĉiu kun certa diferenco.

Ĉi tiuj knabinoj estis parto de la Brodiaro. Tiel oni nomis ilin eĉ antaŭ la lernejestrino moke donis al ili tiun nomon, kiam ili iris de la Elementa al la Progresinta Lernejo je la aĝo de dek du. Tiutempe ili estis tuj rekoneblaj kiel la lernantoj de f-ino Brodi, pro tio ke ili estis vaste informitaj pri multaj temoj senrilataj al la aprobita instruplano, laŭ la lernejestrino, kaj senutilaj al la lernejo kiel lernejo. Oni malkovris, ke la knabinoj aŭdis pri Buchman-anoj[1], kaj Mussolini[2], la italaj pentristoj de la renesanco, kaj la avantaĝo por la haŭto de puriga kremo kaj hamamelido prefere al honesta sapo kaj akvo, kaj ili konis la vorton ‘menarĥo’[3]; oni priskribis al ili la dekoraĵojn de la Londona domo de la verkisto de *Winnie la Pu*, kaj ankaŭ la amrilatojn de Charlotte Brontë kaj de f-ino Brodi mem. Ili konsciis pri la ekzisto de Einstein kaj la argumentoj de tiuj, kiuj konsideris ke la Biblio malveras. Ili konis la rudimentojn de astrologio, sed ne la daton de la batalo de Flodden[4], aŭ la ĉefurbon de Finlando. La tuta Brodiaro, krom unu, nombris per la fingroj, kiel faris f-ino Brodi mem, kun akurataj rezultoj plimalpli.

Post kiam ili fariĝis deksesjaraĝaj kaj atingis la kvaran klason, ili neniofarante staris preter la pordego post la lecionoj, jam adaptiĝinte al la ortodoksa reĝimo, ili tamen restis sendube Brodiece, kaj ili estis ĉiuj famkonataj en la lernejo, kio signifas ke oni taksis ilin suspektindaj kaj malŝatindaj. Ili havis nenian teamspiriton kaj malmultajn komunajn interesojn krom ilia daŭra amikeco kun Johana Brodi. Ŝi ankoraŭ instruis en la junula sekcio. Oni taksis ŝin tre suspektinda.

———————————————————

1 Kristana grupo, plej populara en la jaroj 1920-1930, fondita de usonano D-ro Frank Buchman.
2 Benito Mussolini 1883-1945 regis Italion kiel diktatoro de 1922-1943.
3 Menarĥo — la unua menstrua ciklo aŭ sangelfluo dum pubereco. Vikipedio
4 La batalo de Flodden Field, 9-a de septembro 1513, estis decidiga venko por la angloj kontraŭ la skotoj.

La Lernejo Marcia Blaine Por Knabinoj estis taglernejo, kiu estis parte subvenciita en la mezo de la deknaŭa jarcento de la riĉa vidvino de Edinburga librobindisto. Ŝi estis admiranto de Garibaldi[5] antaŭ ol ŝi mortis. Ŝia vireca portreto pendis en la granda salono, kaj estis ĉiam honorita je la Tago de la Fondanto pere de fortikaj floroj kiel krizantemoj aŭ dalioj. Tiuj estis metitaj en vazo sub la portreto, sur legopupitron, sur kiu ankaŭ kuŝis malfermita Biblio kun jena teksto substrekita per ruĝa inko,'Ho kie mi trovos virtan virinon, ĉar ŝia valoro estas pli granda ol rubenoj.' [6]

La knabinoj kiuj neniofarante staradis sub la arbo, ŝultro kontraŭ ŝultro, tre proksime unu al la alia pro la knaboj, estis ĉiuj famkonataj por io. Nun, je la aĝo de dek ses, Monika Douglas estis nomita klasreprezentanto, kaj famis pleje por mensa kalkulado kaj por ŝia kolero, kiu, kiam ĝi estis sufiĉe vigla, pelis ŝin al frapoj dekstren kaj maldekstren. Ŝi havis tre ruĝan nazon vintre kaj somere, kaj longan malhelan harplektaĵon, kaj krurojn kiel ŝtipoj. Atinginte dek ses jarojn, Monika portis sian Panama-ĉapelon iomete pli alte sur la kapo ol kutime, metita kvazaŭ ĝi estus tro malgranda kaj kvazaŭ ŝi scius ke ŝi aspektas groteska ĉiuokaze.

Roza Stanley estis fama por sekso. Ŝia ĉapelo estis metita tre diskrete sur ŝian blondan, mallongan hararon, sed ŝi metis kavaĵon ambaŭflanke en la ĉapelverto.

Eŭnike Gardiner, malgranda, ordema, kaj fama por sia viglega gimnastiko kaj prestiĝa
naĝado, portis sian ĉapelon kun la rando kurbinta supren je la antaŭo kaj malsupren je la malantaŭo.

Sandra Stranger portis la sian kurbinta supren tute ĉirkaŭe kaj laŭeble plej malantaŭe sur la kapo; por faciligi tion ŝi aldonis al la ĉapelo kaŭĉukan bendon kiu iris sub ŝia mentono. Kelkfoje Sandra maĉis tiun kaŭĉukan bendon kaj kiam ĝi estis tute difektita ŝi alkudris novan pecon. Ŝi estis nur fifama por siaj etaj preskaŭ neekzistantaj okuloj, sed ŝi estis fama por siaj vokalsonoj, kiuj antaŭ longa, longa tempo, en la Elementa Lernejo, ravis f-inon Brodi. 'Nu, venu kaj deklamu por ni, ĉar hodiaŭ estis laciga tago.'

'Ŝi lasis la teksaĵon,
la teksilon ŝi forlasis.
Kaj tra la salono,
tri paŝojn ŝi paŝis.
Ŝi vidis burĝoni
La akvolilion.
Ŝi vidis la kaskon,
kaj vidis la plumon,
rigardante suben
al Kameloto.' [7]

'Tio inspiras onin,' f-ino Brodi kutime diris kun tiu gesto en kiu la mano moviĝis de ŝia mamo al la klaso de dekjaraĝaj knabinoj, kiuj aŭskulte atendis la sonorilon, kiu liberigus ilin. 'Kie ne estas vizio,' f-ino Brodi certigis ilin, 'la popolo pereas. Eŭnike, venu kaj saltu transkapiĝe, tiel ke ni havu iom da komika malpeziĝo.'

———————————————————

5 Giuseppe Garibaldi 1807-1882 estis batalanto, heroo kaj simbolo de la itala unuiĝo.

6 Sankta Biblio: Sentencoj de Salomono 31:10 tradukita el la angla. La citaĵo el la Esperanta biblio: "Se iu trovis kapablan edzinon, ŝia valoro estas pli granda ol perloj."

7 Strofo el poemo de Lord Alfred Tennyson 1809-1892 "*The Lady of Shallot*"

Sed nun, la knaboj kun siaj bicikloj ĝoje insultis Ĵenja Gray pro ŝia parolmaniero, kiun ŝi akiris de siaj lecionoj pri parolarto. Ŝi intencis fariĝi aktorino. Ŝi estis la plej bona amiko de Sandra. Ŝi portis sian ĉapelon kun la antaŭa rando turnita akre malsupren; ŝi estis la plej beleta kaj plej gracia knabino el la grupo, kaj ĉi tio estis ŝia famo. 'Ne estu fibubo, Andreo,' ŝi diris per sia arogante altklasa tono. Estis tri Andreoj inter la kvin knaboj, kaj ĉi tiuj tri Andreoj nun komencis simii je Ĵenja: 'Ne estu fibubo Andreo,' dum la knabinoj ridis sub la spasmecaj movoj de siaj Panama-ĉapeloj.

Alvenis Mary Macgregor, la lasta membro de la aro, kies famo restis sur la fakto, ke ŝi estis silenta plumpulino, sensignifulo, kiun ĉiu povus kulpigi. Akompanante ŝin estis eksterulo, Joyce[8] Emily Hammond, la tre riĉa knabino, ilia deliktulino, kiu antaŭnelonge estis sendita al Blaine kiel lasta espero, ĉar neniu lernejo, neniu guvernistino, povus regi ŝin. Ŝi ankoraŭ portis la verdan uniformon de sia antaŭa lernejo. La aliaj portis malhelan violan. Ĝis nun ŝi ne faris ion pli grava ol ĵeti paperbuletojn de tempo al tempo al la muzikinstruisto. Ŝi insistis pri la uzo de siaj ambaŭ nomoj, Joyce Emily. Ĉi tiu Joyce Emily vere klopodis esti akceptita en la famkonatan Brodiaron, kaj ŝi pensis ke la du nomoj helpus instali ŝin, sed estis nenia ebleco kaj ŝi ne komprenis kial.

Joyce Emily diris: 'Jen elvenas instruisto,' kaj kapgestis al la pordegoj.

Du el la Andreoj puŝis siajn biciklojn al la strato kaj forveturis. La tri aliaj knaboj spite restis, sed rigardis en alia direkto kvazaŭ ili haltus por admiri la nubojn sur la Montetoj Pentland.[9] La knabinoj amasiĝis kune kvazaŭ en konversacio. 'Bonan tagon,' diris f-ino Brodi kiam ŝi alproksimiĝis al la grupo. 'Mi ne vidis vin dum kelkaj tagoj. Mi opinias, ke ni ne detenu ĉi tiujn junajn virojn kaj iliajn biciklojn. Bonan tagon, knaboj.' La famkonata aro foriris kun ŝi, kaj Joyce, la nova deliktulino sekvis. 'Mi kredas, ke mi ankoraŭ ne renkontis tiun novan knabinon,' diris f-ino Brodi, de proksime rigardante al Joyce. Kaj post la prezentado ŝi diris: 'Nu, ni devas nun iri, kara.'

Sandra retrorigardis kiel Joyce Emily marŝis kaj tiam saltis, longkrure kaj nekontrolite por ŝia aĝo, en la mala direkto, kaj tiam la Brodiaro estis lasita al ilia sekreta vivo same kiel antaŭ ses jaroj dum ilia infanaĝo.

'Mi metas maljunajn kapojn sur viajn junajn ŝultrojn,' f-ino Brodi tiam diris al ili, 'kaj ĉiuj miaj lernantoj estas *la crème de la crème*.'[10]

Sandra, per siaj etaj duonfermitaj okuloj, rigardis supren al la ruĝega nazo de Monika kaj memoris ĉi tiun diraĵon dum ŝi sekvis en la trenstrio de f-ino Brodi.

'Mi deziras, ke vi knabinoj venu morgaŭ por vespermanĝi.' diris f-ino Brodi. 'Certigu ke vi estos liberaj.'

———————————————————

8 Prononcu: Ĝojs

9 Pentland Hills —montetaro sude de Edinburgo

10 la crème de la crème — franca esprimo ankaŭ uzata en la angla = la plej bona persono aŭ aĵo en sia kategorio.

‘La Teatra Societo …’ murmuris Ĵenja.

‘Sendu senkulpigon,’ diris f-ino Brodi. ‘Mi devas konsulti vin, ĉar oni preparas novan intrigon por devigi min demisii. Ne necesas diri, ke mi ne forlasos mian postenon.’ Ŝi parolis kviete, kiel ŝi ĉiam faris malgraŭ ŝiaj fortaj vortoj.

F-ino Brodi neniam diskutis siajn aferojn kun aliaj membroj de la instruistaro, sed nur kun tiuj ekslernantoj, kiujn ŝi estis trejninta al konfidenculoj. Jam antaŭe ekzistis intrigoj por forigi ŝin de Blaine, kiuj estis malhelpitaj.

‘Oni refoje sugestis, ke mi proponu min por posteno ĉe unu el la progresemaj lernejoj,[11] kie miaj metodoj estus pli konvenaj al la sistemo ol ili estas ĉe Blaine. Sed mi ne aspiros al posteno ĉe lernejaĉo. Mi restos en ĉi tiu fabriko de edukado. Necesas iom da fermentaĵo en la maso. Donu al mi knabinon je impresebla aĝo, kaj ŝi dumvive apartenos al mi.’

La Brodiaro ridetis pro iliaj diversaj komprenoj.

F-ino Brodi penis briligi siajn brunajn okulojn kiel signifa akompano al ŝia mallaŭta voĉo. Ŝi aspektis kiel fortega virino kun sia malhela romiana profilo kontraŭ la suno. La Brodiaro ne dubis dum momento, ke ŝi venkos. Estus pli verŝajne ke Julio Cezaro postenpetus ĉe lernejaĉo ol f-ino Brodi. Ŝi neniam eksiĝus. Se la aŭtoritatuloj volus senigi sin de ŝi, ili devus atenci ŝin.

‘Kiu estas la kontraŭularo ĉi foje?’ diris Roza, kiu famis pro seksallogo.

‘Ni diskutos morgaŭ vespere la personojn, kiuj oponas min,’ diris f-ino Brodi. ‘Sed estu certa ke tiuj personoj ne sukcesos.’

‘Ne,’ diris ĉiuj. ‘Ne, certe ne.’

‘Ne dum mi estas en mia burĝonaĝo,’ ŝi diris. ‘Ĉi tiuj jaroj estas ankoraŭ miaj burĝonjaroj. Gravas rekoni siajn burĝonjarojn, ĉiam memoru tion. Jen mia tramo. Mi probable ne kaptos seĝon. Nun estas mil naŭcent tridek ses. La epoko de kavaliraĵo jam estas pasinta.’

Ses jarojn antaŭe, f-ino Brodi kondukis sian novan klason en la ĝardenon por historia leciono sub la granda ulmo. Laŭvoje tra la lernejaj koridoroj ili preterpasis la kabineton de la lernejestrino. La pordo estis larĝe malferma, la ĉambro estis malplena.

———————————————————

11 Progresema edukado — movado en la malfrua 19-a jarcento kaj ekzistas diversforme ĝis nun. Ĝi anstataŭas la tradician lernprogramon bazita je klasikaj lingvoj per pli praktikaj lernobjektoj kaj metodoj pli utilaj en la ĉiutaga vivo.

‘Knabinetoj,’ diris f-ino Brodi, ‘venu kaj vidu tion.’

Ili grupiĝis ĉirkaŭ la malferma pordo dum ŝi fingromontris la grandan afiŝon fiksitan per premnajletoj sur la kontraŭa muro en la ĉambro. Ĝi montris grandan viran vizaĝon. Sube estis la vortoj 'Sekureco Unue'.

‘Ĉi tiu estas Stanley Baldwin[12], kiu fariĝis ĉefministro kaj postnelonge fariĝis eksĉefministro,’ diris f-ino Brodi. ‘F-ino Mackay konservas lin sur la muro, ĉar ŝi kredas je tiu slogano “Sekureco Unue.” Sed Sekureco ne estas unue. Bono, Vero, kaj Belo venas unue. Sekvu min.’

Tio estis la unua indiko al la knabinoj de opinidiferenco inter f-ino Brodi kaj la cetera instruistaro. Fakte, al iuj el ili, tio estis la unua fojo, ke ili konsciis, ke homoj plenkreskaj, kunlaborantaj, konsistantaj el aŭtoritatuloj povus ja havi malsamajn opiniojn. Ili mense notis tion kun la vigliga sento esti flarinta flagrontan konflikton, sen mem esti endanĝerigitaj, ili sekvis la danĝeran f-inon Brodi en la sekuran ombron de la ulmo.

Ofte, dum tiu sunplena aŭtuno, kiam la vetero permesis, la etaj knabinoj ricevis siajn lecionojn, sidantaj sur tri benkoj, aranĝitaj ĉe la ulmo.

‘Tenu supren viajn librojn,’ ofte diris f-ino Brodi tiun aŭtunon, ‘tenu ilin alte en viaj manoj, en okazo de entruduloj. Se venos entruduloj, ni faras nian lecionon pri historio … pri poezio ….angla gramatiko.’

La etaj knabinoj tenis alte siajn librojn, kun la okuloj fiksitaj ne sur la libroj, sed sur f-ino Brodi.

‘Dume mi rakontos pri miaj pasintaj somerferiojn en Egiptujo ...mi rakontos al vi pri haŭt- kaj manflego … pri la franco kiun mi renkontis en la trajno al Biarritz[13], kaj mi devas rakonti al vi pri la italaj pentraĵoj, kiujn mi vidis. Kiu estas la plej granda itala pentristo?’

‘Leonardo da Vinci,[14] f-ino Brodi.’

‘Tio malpravas. La ĝusta respondo estas Giotto[15]; li estas mia plej ŝatata.’

En iuj tagoj, ŝajnis al Sandra, ke la brusto de f-ino Brodi estis ebena, sen ajna ŝvelaĵo,

———————————————————

12 Stanley Baldwin 1867-1947 brita konservativa politikisto, trifoje ĉefministro inter la du mondmilitoj.

13 Biarritz — unu el la plej prestiĝaj banlokaj urboj de la franca atlantika bordo proksime al la hispana landlimo.

14 Leonardo da Vinci 1452-1519 estis itala pentristo, skulptisto, inventisto, arkitekto, anatomiisto, botanikisto, muzikisto, verkisto, inĝeniero kaj sciencisto de la alta renesanco.

15 Giotto [prononcu: Ĝoto] 1266-1337, itala pentristo kaj arkitekto konsiderata la unua en longa linio de grandaj artistoj kiuj kontribuis al la renesanco.

sed rekta kiel ŝia dorso. Dum aliaj tagoj ŝia brusto estis mamforma kaj granda, tre notebla, kaj Sandra povis sidi kaj rigardadi tion tra siaj etaj okuloj dum f-ino Brodi, kiam la lecionoj okazis en klasĉambro, staris rekta, kun ŝia bruna kapo tenita alte, kaj rigardante el la fenestro kiel Johana de Arko[16] dum ŝi parolis.

'Mi ofte diris al vi, kaj la ĵus pasintaj ferioj konvinkis min, ke miaj burĝonjaroj nun vere komenciĝis. Malfacilas percepti sian burĝonaĝon. Vi knabinetoj, kiam vi plenkreskas, vi devas esti atentega por rekoni vian burĝontempon, kiam ajn en via vivo ĝi okazus. Tiam vi devas plene ekkapti kaj ĝui ĝin. Mary, kion vi havas sub via skribotablo, kion vi rigardas?'

Mary sidis kiel bulo kaj estis tro stulta inventi ion. Ŝi estis eĉ tro stulta iam mensogi, ŝi ne sciis kiel agi kaŝeme.

'Komikson, f-ino Brodi,' ŝi diris.

'Ĉu vi signifas komediiston, drolulon?'

Ĉiuj kaŝridis.

'Bildrakonton,' diris Mary.

'Bildrakonton, ho ve. Kiom aĝa vi estas?'

'Dek, fraŭlino.'

'Vi, je dek, estas tro aĝa por bildrakontoj. Donu ĝin al mi.' F-ino Brodi rigardis la kolorajn paĝojn. '*Tigro Tim*[17], ho ve,' ŝi diris, kaj ĵetis ĝin en la paperkorbon. Perceptante ĉiujn okulojn sur ĝi, ŝi elprenis ĝin el la korbo, disŝiris ĝin al nesavebleco, kaj remetis ĝin.

'Atentu min, knabinoj. La burĝontempo estas la momento por kiu ni naskiĝis. Nun, ke mia burĝonaĝo komenciĝis – Sandra via atento ne estas fokusita. Pri kio mi parolis?'

'Pri via burĝonaĝo, f-ino Brodi.'

'Se iu alvenos,' diris f-ino Brodi 'dum la sekvanta leciono, memoru, ke nun estas la horo por angla gramatiko. Dumtempe mi rakontos al vi iomete pri mia vivo kiam mi estis pli juna ol mi estas nun, kvankam mi havis ses jarojn pli ol la priparolota viro.'

Ŝi apogis sin kontraŭ la ulmo. Estis unu el la lastaj aŭtunaj tagoj, kiam la folioj falis pro etaj ekblovoj. Ili falis sur la infanojn, kiuj estis dankemaj pro tiu preteksto tordetiĝi, kaj pro la permesataj movoj kiam ili forbrosis la foliojn de la haroj kaj sinoj.

———————————————————

16 Johana de Arko 1412-1431 kromnomata "Pucelo de Orleano" estas nacia heroo de Francujo kaj sanktulino de la Romkatolika Eklezio.

17 En la angla "*Tiger Tim's*" estis famkonata brita bildstrio kreita de Julius Stafford Baker 1869-1961.

‘Sezono de nebuletoj kaj matura fruktado. Mi estis fianĉino de juna viro je la komenco de la milito, sed li falis sur la batalkampo en Flandrujo,’ diris f-ino Brodi. ‘Ĉu vi preparas vin, Sandra, por la tagan lavadon?’

‘Ne, f-ino Brodi.’

‘Ĉar viaj manikoj estas rulitaj supren, kaj mi evitas knabinojn, kiuj suprenrulas la manikojn de iliaj bluzoj, kia ajn bela estu la vetero. Rulu ilin tuj malsupren; ni estas civilizitaj estaĵoj. Li falis la semajnon antaŭ deklaro de la armistico. Li falis kiel aŭtuna folio, kvankam li aĝis nur dudek du jarojn. Kiam ni iros enen, ni rigardos kaj vidos Flandrujon sur la mapo, kaj la lokon kie mia amanto estis entombigita antaŭ via naskiĝo. Li estis malriĉa. Li venis de Ayrshire; li estis kamparano, sed tre laborema kaj lerta klerulo. Kiam li petis min edzigi lin, li diris: "Ni devos trinki akvon kaj marŝi malrapide." Tio estis la kamparana maniero de Hugo esprimi ke ni vivos kviete. Ni trinkos akvon kaj marŝos malrapide. Kion tio esprimo signifas, Roza?’

‘Ke vi vivos kviete, f-ino Brodi,’ diris Roza Stanley, kiu post ses jaroj havis grandan reputacion por sekso.

La rakonto pri la falinta fianĉo de f-ino Brodi jam bone progresis kiam oni ekvidis la lernejestrinon f-ino Mackay alproksimiĝi trans la herbotapiŝo. Larmoj jam ekfalis de la etaj porksimilaj okuloj de Sandra, kaj la larmoj de ĉi tiu nun afektis ŝian amikinon Ĵenja – poste famkonata en la lernejo por ŝia beleco – kiu plorĝemis kaj palpis la pantalon-krurumon por ŝia naztuko.’Hugo estis mortigita,’ diris f-ino Brodi, ‘unu semajnon antaŭ armistico. Post tio okazis ĝenerala balotado kaj homoj diris, “Pendumu la germanan imperiestron!” Hugo estis unu el la floroj de la arbaroj, kuŝanta en sia tombejo.’ Roza Stanley nun estis ekploranta.

Sandra movis siajn malsekajn okulojn flanken, rigardante la alvenon de f-ino Mackay, kiu marŝis trans la razeno kun la kapo kaj ŝultroj klinitaj antaŭen.

‘Mi venis por saluti vin kaj diri, ke mi devas foriri,’ ŝi diris. ‘Kial vi etaj knabinoj ploras?’

‘Ili estas kortuŝita per historio, kiun mi rakontis al ili. Ni havas lecionon pri historio,’ diris f-ino Brodi arte kaptante falantan folion en sia mano dum ŝi parolis. ‘Plori pri rakonto je la aĝo de dek!’ diris f-ino Mackay al la knabinoj kiuj iom post iom leviĝis de la benkoj, kaj ankoraŭ sensobtuzaj pro Hugo la militisto. ‘Mi nur venis por saluti vin, kaj mi nun devas iri. Nu, knabinoj, la nova trimestro komenciĝis. Mi esperas, ke vi ĉiuj ĝuis agrablajn somerferiojn kaj mi antaŭĝuas vidi viajn belegajn eseojn pri kiel vi pasigis ilin. Vi ne devus priplori historion je la aĝo de dek jaroj. Ho ĉielo!’

Kiam f-ino Mackay estis for, f-ino Brodi diris, ‘Vi tre bone elturniĝis per ne respondi al la demando, kiun oni starigis al vi. Spertante malfacilaĵojn, estas saĝe diri ne eĉ unu vorton, nek nigran, nek blankan. *Parolo estas arĝento, oron similas silento.*[18] Mary ĉu vi aŭskultas? Kion mi estis diranta?’

Mary Macgregor, plumpa, kun nur du okuloj, nazo kaj buŝo kiel neĝhomo, kiu poste famiĝis pro sia stulteco kaj ĉiam estis la kulpulino, kiu je la aĝo de dudek tri perdis la vivon en hotel-incendio, respondis: ‘Oron.’

‘Kion mi diris, kio similas oron?’

La okuloj de Mary serĉis ĉirkaŭe kaj supere. Sandra flustris,’La falantaj folioj.’

‘La falantaj folioj,’ diris Mary.

‘Evidente,’ diris f-ino Brodi, ‘vi ne aŭskultis min. Se vi knabinetoj nur aŭskultus, mi farus el vi *la crème de la crème*.’

◆ (*daŭrigota*)

———————————————————

18 Zamenhofa proverbo #1868

La Preĝejeto

Verkis: *Claude PROUVOST* Trad. *Roland Platteau*

Ankoraŭ kelkajn paŝojn kaj mi vidos ĝin, bunte kolorigita de lastaj radioj de l'subiranta suno, kviete sidanta sur sia teraltaĵo : kelkajn paŝojn plu, atendas la okulo tiun humilan tureton, tiujn volbojn malheligitajn de tiom da pasintaj jaroj.

Unu paŝon plu por atingi la pezan pordon, kaj poste puŝi ties unuan klapegon, eniri. Iomete atendi, ke la okuloj alkutimiĝu, tuŝeti en la sanktakvujo. Iomete paŝi, milde, sur la ŝtona planko, aŭskulti al bruoj sonorantaj sub tiu silenta volbo, sin mergi en la lumo, apenaŭ sugestita, kiel obtuze.

En tiu preĝejeto oni iras nenien, oni ĉeestas ; oni ne vizitas, oni haltas, tio estas iela respekto por la loko, tio estas maniero provi preĝi, ĉar neeblas ĉi tie ne senti. Tempo, historio, kaj ia mistero, miksiĝas, la statuoj ne estas tute senmovaj, pensoj venas, kaj la vizitanto iras fronte la muron de siaj malkapabloj, je la limo foje, transigi la pordon de kompreno.

La silento estas la ombro, la flagroj de l'sakralaj kandeloj estas flustroj, ĵuroj, esperoj. Ĉiuj la manoj, kiuj bruligis tiujn flamojn, lumigis la plenan pacon, la plenan suferon de la mondo, la okuloj, kiuj ilin rigardis, vidis en ili senfinaĵojn, la koroj, kiuj akompanis ilin, eldiris ĉiujn la vortojn de l'mondo. Piede de tiu altaro milflama oni eniras en la fandujon de la tagoj, sed oni ne povas kompreni la energion – senliman – sidanta tie antaŭ oni, tiu eta parto de nekomprenebleco redonita senkonscie pere de la religiemo kaj amo.

La silento estas la ombro, ĉar ĉie estas vortoj, mutaj aŭ murmuretaj ; ili estis sed ili restas, metitaj sur la lumetoj kiel floretoj sur la malespero, ĉiuj oferdonaj. Koroj sindonacis ĉi tie, sen artifikoj, kun grando kaj foje kun la naivo de kulpa amaro, kiu perfidas la grandon de preĝo.

Ĉirkaŭ l'statuoj rojas aliaj vortoj, malfacilas resti sensenta antaŭ ilia ĉieesto, foje sufera, foje feliĉa. La pensoj, kiuj naskiĝis en ĉi loko estas ia olibano. La parfumo de la nevero, milde faletas sur vi, kaj vi komprenas, ke ĉio eblas, eble. Trembriloj invadas vin, pasemaj bildoj kun foraj sonoj kvazaŭ obtuzaj, spasmaj, voĉbruadoj, krioj jen el malamo jen el ĝojo. Vi ekkomprenas la sentempecon, vi ekakceptas la ekkreiĝon, sed vi ne scios, ĉar senutilas tio.

Se vi estas kredanto, liberigos vi viajn vortojn laŭ l'bezonoj laŭ l'emoj de l'momento. Foje malfacilas, foje malpezigas, ĉiam esencas. Se kredanto vi ne estas, vi provu konduki vian menson preter la belo, vi provu identigi tion, kio, perturbas ĉi tie ŝajnan trankvilecon ; provu ne esti inteligenta sed malfermita, akceptema.

La preĝejeto ne estas templo, ĝi estas haveno : oni kunportas elirante tion kion oni alportis, sed transformita foje transfigurita. Ĝi ne estas loko kie, oni venas peti, ĝi estas loko kien oni venas atesti, aserti, dubi. Tio ne estas loko, kien oni iras, tio estas loko kien oni reiras, forgesante la demandojn, por dueli kontraŭ la racio – minaca – por mergiĝi en la mondon de l'sakrala, fundamenta, sed konstruita sur sablo.

Vin rigardas la vitraloj, juĝas vin ili. Al la lumo ili donas formon ne por vin mirigi sed por heligi sen hojli, igi vin tiri viajn rigardojn al la ĉielo tra ili. Se via rigardo – kiu estas via lumo - revenos al vi, vi neniam plu estos la sama.

Reeliri endus nun, sed retenas vin io, tio estas via venko kontraŭ la efektiva kaj la tuja, tio donas al vi iaspecan grandon. vi ne plu deziras scii, ĉar vi perceptas, kaj la spirito ne zorgas analizi, ĝi emociiĝas, ĝi flaras sian meman parfumon.

Nokto nun falis sur la preĝejeto, kaj malheligas ĝian figuron sur griza ĉiela fono, sed oni vidas lumetojn danci tra la vitraloj. Niaj paŝoj nin distancigas de tiu ĉi loko, sed ni ne plu estas vere sola nun.

Tiom da vortojn aŭdis la preĝejeto, ke ĝi - nur ĝi – povas kompreni la verajn sekretojn, sen respondi : nur ĝi konsistigas la ejon, la azilon, de nia sincereco. ◆

Claude PROUVOST – en « *Bouts de chandelles* » Eld. *Flammes vives*

(nun ĉi tiu asocio ne plu ekzistas, la aŭtoro eble mortinta. La libroj de ili eldonitaj ne plu vendataj...)

Malĝoja Kristnasko

Erika Godó

En la Kristnaska nokto,
la neĝo falas en silento.
La domo estas malplena,
ĉiu ĉambro estas serena.
Lumo de kandeloj estas malforte,
rememoroj doloras pli forte.
Miaj amatoj estas malproksime,
mia koro sopiras al ili proksime.

En Kristnasko ne estas rido,
nur la vortoj de soleca fido.
Mi vagas inter rememoroj,
malbonaj malnovaj doloroj.
Nun restas nur la foresto,
kaj la dolora dum la festo.
En la kristnaska horo,
malĝojo en silenta koro.



Rudina Muharremi Beja

Neĝas

Tradukis: *Bardhyl Adem Selimi*

En mia animo vekiĝas dorminta malforteco,
nostalgio kiu levas la sangon en la piedojn,
kvazaŭ volus memori al mi
ke la tempo fluas eĉ kiam ni haltas.
Mi ne satiĝas rigardante de la fenestro
kiel la naturo ŝanĝas siajn vizaĝojn,
kiel ĉiu memoro blankiĝas,
kiel ĝi invitas min akcepti, ke alia jaro foriras
sen peti permeson.
Tiam malĝojo nebuligas miajn okulojn,
kaj larmo trovas sian vojeton
kiel neĝero kiu liberigas la ĉielon de pezo.
Mi havas la angoron de patrino:
la tagoj forgratas ŝiajn jarojn,
kaj ŝi malaperas iom post iom
antaŭ miaj senpovaj okuloj.
La filino kreskas, kaj en ŝia kresko
mi samtempe sonĝas kaj tremas,
ĉar eble iam ŝi forglitos de mi
kiel papilio serĉanta sian propran lumon.
Sed la vivo estas magia rondo,
ĝi ligas nin kaj malligas per nevideblaj fadenoj,

ĝi tenas nin kaptitaj inter belo kaj perdo
en la sama paŝo.
Neĝas ĉi tie.
Kaj la tuta malforteco de mia animo
iĝas unu kun la senkulpaj neĝeroj
kiuj falas silente sur la teron,
por poste esti paŝitaj
de la rapidaj paŝoj de preterpasantoj
kaj la ludemaj piedoj de hundoj
sekvantaj siajn mastrojn.
Neĝas…
Kaj mi bezonas paron da flugiloj,
por leviĝi milde super la blankeco,
ne vundante eĉ unu neĝeron
falantan kiel la spiro de anĝeloj,
almenaŭ ĝis ĝi mem firmiĝos,
prenos la kuraĝon de sia propra lumo,
kaj ne plu sentos la pezon
de niaj pezaj paŝoj.

La tago kiun mi malkovris ke Paĉjo Kristnasko estis vera

Karlo Germany

Kiam mi estis knabeto, mi ĉiam ĝojis pri la alveno de la kristnaska sezono. Mi ĉiam ĝuas de la donacoj, kiujn mi ricevus. Mia familia tradicio estis la jena. Je kristnaska vespero mia familio ĉiam malfermis la donacojn, kiujn ni donacis unu al la aliaj. Poste je la mateno de Kristnasko, kiam ni vekiĝis, ni ricevus la malvolvitajn donacojn de Paĉjo Kristnasko. Mi apenaŭ povis dormi pensante, kion mi ricevis de li. Sed mi estis knabeto, kaj eventuale mi perdis la lukton kontraŭ la dormo kaj pasigis la nokton revante pri la donacoj, kiujn mi ricevus de Kristnaskpaĉjo speciale la ludilon, kiun mi petis de li.

Finfine, kiam mi ekestis iom pli maljuna, mi komencis dubi la veran ekziston de Paĉjo Kristnasko, kaj mi eksuspektis, ke miaj gepatroj estis la veraj homoj, kiuj lasis la donacojn . Mi vere volis koni la veron. Kiel mi povis trovi la pruvon de la veraj portantoj? Tiam okazis al mi granda ideo por ekscii la veron. Mi povus kaŝi porteblan sendricevilon proksime de la arbo por aŭskulti la momenton, kiam la donacoj estis metitaj tien! Tiel mi povas iri kaj vidi sekrete la veran homon aŭ verajn homojn, kiuj lasis la donacojn sub la arbo.

Kristnaskvespere post malfermado de la donacoj kaj antaŭ ol kuŝigi min mi kaŝis mian sendricevilon apud la kristnaska arbo. Mi kuŝis aŭskultante mian alian sendricevilon, pensante pri la donaco, kiun mi petas tiun jaron de Paĉjo Kristnasko- la Kanonoj de la Navarona Insulo (usona ludilo kiu havis soldatetojn,kaj kanonojn ĉe klifojn) el la samnoma filmo, “The Guns of Navarone,” angle. Mi atendis multe da tempo sen aŭdi bruon. Mi apenaŭ povis teni malfermitaj la okulojn kaj ekdormis, kiam mi aŭdis bruon el mia sendricevilo, kiu vekis min. Mi rigardis mian sendricevilon. Miaj okuloj grande malfermiĝis, kiam mi aŭdis mallaŭtan “Ĥo, Ĥo, Ĥo!!!”, kaj mi kuris silente al la ĉambro, kiu enhavis mian Kristnaskan arbon.

Mi ne povis kredi miajn okulojn, kiam mi vidis dikan viron vestitan en ruĝo kaj blanko. Estis Paĉjo Kristnasko!!!!! Mi kaŝe kaj zorge rigardadis lin, dum li metis la donacojn sub la arbon. Mi ricevis, kion mi volis - la Kanonojn de la Navarona Insulo!!!! Tiam li prenis la kukojn kaj lakton, kiujn ni lasis al li kaj goje kaj zorge konsumis ilin. (Ni ĉiam lasis la nomatajn “Vorgesitaj Kukoj”, kion faris mi panjo, kiu faris ilin pere de forgesado de ili en la forno.) Subite li konstatis, ke li ne estis sola en la ĉambro. Tiam li rigardis min kaŝita malantaŭ seĝo. Li komencis paroli kun mi, kaj tio estas la lasta afero, kiun mi memoras, ekde mi vekas la sekvan matenon.

Kiam mi vekis Kristnaskan tagon, mi havas sencon de strangaj sonĝoj . Ĉu povus esti vera, mi hieraŭnokte vidis Paĉjon Kristnasko? Mi frotetas miajn okulojn, rapide levas min de la lito kaj kuras al la Kristnaska arbo. Tie mi trovis la petitan ludilon, kiun mi vidis hieraŭ. Kaj la kukoj kaj lakto jam ne troviĝas. Mi estis feliĉega. En tiu momento mi flustras al mi mem, “Mi pardonpetegas, Paĉjo Kristnasko! Mi neniam dubos vin denove. Mi ĉiam promesos kredi je via ekzisto!”

Ekde tiam, mi edziniĝis kaj havis familion. Nun dum niaj kristnaskaj festenoj,miaj filinoj ĉiam petadis, ke mi rakontu tiun historion al ili ĉiujare. Kiam mi alvenos al la fino, ni ĉiam ripetas kune, kion mi diris kiam mi finfine malkovris ke Paĉjo Kristnasko estis vera.

Nun ili estas plenkreskulinoj, kaj neniam ĉesis kredi je Paĉjo Kristnasko. ◆

Kristnasko

Elizabeta Tuboly

Kristnaskaj briloj
ĉion banas plena lum’-
kaj nigraj koroj
*
dormetas esper’
en varma kandellumo –
paca nigra nokt’
*
anĝela danco
falantaj neĝfloketoj
sur verda pino
kristnasko ĝojofesto
familio kandellum’
*
kristnaska nokto
falas grandaj neĝflokoj
diamantbrilo
sur la stratoj malpuraj
mola blanka neĝkovril’
*
kristnaskofesto
varma hejmo kandellum’
ĝojas infanoj
*
kristnaska lumo
grizĉiele pala lun’ –
por multaj homoj
*

NOVONTOLOGISMO

Akrila Lordo

Pri la Ciklo

Mi dediĉas ĉi tiun ciklon al la proksima estonteco
– al epoko, kiu jam alproksimiĝas.
Mi atendas kun senpacienco, kiam ĝi frapos ĉe novaj koroj — tiel same, kiel iam ĉe mia.
Kaj mi esperas, ke ĉi tiuj poemoj helpos al ĝi trovi siajn adresojn.
La versoj kondukas nin laŭ la vojo de la lirika heroo,
kiu konsciis sin en la malnova mondo,
sed nur komencas sian moviĝon al la nova.
Tio estas konfeso de animo rompita en la postmoderno,
kiu decidis sin rekolekti el fragmentoj en nova epoko —
la epoko de Novontologismo.
Bonan vojaĝon al vi!

AKTO I

Ŝablono de epoko
La tempo min transpasas,
Ignorante mian senmovecon.
Marŝante, ĝi la pezon forĵetas
Kaj la kompateman iluzion.
Mi estas fragmento, ombro –
Vivas, por grandan arton krei…
Ne: unu afero vokas – doloro.
Kaj ĝin mi lernis lerte simuli.
Kreinto, kreaĵo aŭ simulakro?
Nomi – la privilegio de Adamo.
Skribado (ne) bezonas stimulilon.
Bruo. Por ili ne ekzistas normo.
Tia estas via sensenca spuro:
Kalejdoskopo preter ĉiu vero.

Mantra ciklo
Tempo pasos kaj ĉio malaperos.
Tempo pasos – kaj ne revenos.
Mi asertas: ĉio ne estos kiel estis.
Animo ne plu doloras. Nur ĝis…

AKTO II

Sentoj pri Ŝi
Mi ne skribos leterojn –
Por igi mian koron suferi.
Vi ne ricevos la vortojn,
Nun ili devas malaperi.
Vi ŝtelis miajn pensojn
Kaj volis ilin domini.
Redonu miajn signifojn,
Vi, kiu ne volas ilin teni!

Kreu, Kreinto
Amo ne aplaŭdos per flatoj. Ve.
Tial ĝi por tiu neatingebla estas,
Kiu volas kaŭzi diskuton, vere
Kaj la eternan prestiĝon soifas.
Artisto ne povas esti amata,
Alie lia muzo malĝoje malaperas.
Ĉi tiu pinto estas nevenkebla
Por tiu, kiu la famon avidas.
Kie do oni povas trovi fuelon,
Kiam la animo devas bruli?
Mi devas tiam ŝiri miajn ripojn:
Ho, esperas karikaturon eviti!
Ŝi ja pardonos, ŝi ja ne akuzos,
Ŝi volos nur esti kun vi, ĉiam.
Ho ve. Ĉu tia afero vin naŭzas?
Artisto, aŭskultu kaj estu vi mem!
Vi ne bezonas tiun repaciĝon.
Vi deziras sub la steloj krei.
Forĵetu la revojn kaj flugilojn,
Kaj daŭrigu, kun plezuro suferi.

Kio poste
Kaj kio okazas poste?.. Kiel daŭrigi?
Nun mi jam ne volas kredi je mensogo.
Kiel povas mensogo la mondon plenigi?
Diru al mi, kiel ĝi penetris en la mondo?
Detektivlibroj serĉas hommurdinton,
Trovi la murdinton de signifoj mi volas.
Kion donis al ni la mortigo de Dion?
Kulp' sur dikan lipharon meti ne povas.
Ĉu iu povas kaj ĉu oni devas kulpigi?
Ĉu ĝi estis granda krimo aŭ heroeco?
Sufiĉe da demandoj, bonvolu, ĉesu ĝeni.
Kelkfoje respondoj aperas en faŝismo.
Mi ne scias kie kuŝas vero – mi serĉas.
Lasu min krei! Kun larmoj mi petegas.

Malplena
Neniu kaj nenio celon servas.
Ĉirkaŭe nur farso kaj stulteco.
Mallumo brilas, lumo englutas…
Ĉio estas kaŝludo, anstataŭigo.

AKTO III

Blindeco
Ĉu vi kredas je venko, sukceso?
Vi devas – alie, kiu vi estas…
Ĉu vi atendas lumon post ŝtormo,
Je amo post kverelo – ĉu kredas?
Mi devas por la regno batali:
Mi ne kredas je malsukceso.
Mi eltenos, mi humiligos min –
Por ludi en ĉi tiu karnavalo.
Kaj tamen batali mi devas,
Eĉ se renkontos malsukceson.
Mi ne vidas sencon; kialon vidas
Kaj al ĝi mi min tute donos.

Vizio sen nomo
Mi aŭdas eĥon, vidas sparkojn;
Mi volas respondi al la voko.
Mi malfermas fajrajn flugilojn,
Provas eniri kaj flugi en la aero.
Tiam mi eltiras mian plumon
Kaj trempas la pinton en inko.
Susuro de folioj, mi trinkas teon –
Mi komencas rigardi en la vizio.
Kaj la papero sorbas signifojn,
Sed ili la vortojn – transcendas.
Kaj komenciĝas pensoflugoj,
Kiuj al nekonataj lokoj kondukas.
Do, mi prepariĝas preta esti:
Kredas, ke nekonataĵo eblas.
Mi atendas, kio valoras atendi,
Kaj mi ne dormas, sed sonĝas.

Kredoj
Ĉu eĉ eblas la ekzisto de amo?
Eblas. Ne rimarki ĝin malfacilas,
Se levi brovon kun pensemo.
Respondo – jes, sendube estas.
Tio ne estos subjektiva vorto,
Kiam vi demandas la demandon.

Racio ne kuŝas en eterna dubo,
Sed en la povo solvi paradokson.
Ni ne estas kalkulilo; ni estas pinto
De la kapablo juĝi, kredi, konservi.
Ni ne estas programita maŝino!
Nur la kredanto, li kapablas vivi.
Jen la aranĝo de l’ ontologio.
Mi pensas, tial mi je tio kapablas,
Kaj tiel la nervoj kreas konsilion:
Tiam mi al la Aŭtoro similas.
Mi havas devon kaj privilegion:
Elekti kaj konsekvencojn akcepti.
Mi ne rezignos je tiu kriterio
De amo, kiu ne naskiĝas el envi.
Do vera, la Amo estas El Ŝaddaj,
Homo estas argilo kun Lia Spirito.
Unue ĝin kun alia animo – dividu;
Ne reen atendu, estu mem la fonto.

Poznano, Pollando, 06.11.2025 – La nova komenco.
Kiryl Shukh

Vintro

Jadranka Miric

Alvenis vintro subite.
Falis prujno sur la grundo.
“ La surtuton ĉe la hundo!” — paĉjo konstatis mirigite.
Milda pasera ĥoruso,
kaŝita en arbustoj ĉe la frosta voj’,
tamen pro frosto kune fuĝas kato kaj muso.
Alte super branĉar’,
oraj dukatoj tremetas,
dume sur senfina ĉiel’
la luno ekiras vagadi, salutante la fidelan stelaron.
Sur la marbordaj herbejoj prujno blankiĝis,
la odoro de cidonio aloge vastiĝis
en la apudvoja varma dometo.
Estu milda vintro! Jen mia peto.

Sen kunulo mi

Elizabeta Tuboly

Advento

– Sonetfaris *Yi Qiao*

Venas jam unua la Advento,
plene de etoso festa ĉie.
L'abiego staras en freŝvento,
buntaj pilkoj brilas lumradie.

Oni viglas sur Kristnaskbazaro,
himnoj sonas ĝoje kaj solene.
Kultaranĝo gloras ĉe altaro,
mi flamigas la kandelon bene.

Jar' post jaro pasis tempo fore,
ĉi Kristnaskon mi bonŝance festas.
Sed konatoj kelkaj karaj kore
jam por ĉiam en-memore restas.

En Edeno ili reaperas,
kun rideto al ni plenesperas.

MI TIMAS...

de *anonimulo*

Vi diras, ke vi amas pluvon,

sed vi malfermas vian ombrelon kiam pluvas.

Vi diras, ke vi amas la sunon,

sed vi trovas ombritan lokon kiam la suno brilas.

Vi diras, ke vi amas la venton,

sed vi fermas viajn fenestrojn kiam vento blovas.

Tial mi timas,

vi diras, ke vi ankaŭ amas min.

Noto de tradukanto: Oni diras, ke ĉi tiu poemo estis verkita de turka poeto kaj poste tradukita en la anglan, nun ĝi fariĝis tre populara en literatura medio.Surbaze de ĉi tiu angla traduko, aperis multaj ĉinlingvaj tradukoj, inkluzive de liberversaj poemoj, kiuj estas plejparte laŭvortaj tradukoj. En Ĉinio ankaŭ aperis multaj tradukoj laŭ diversaj metrikaj formoj, kiuj kun fiksitaj metrikoj kaj rimaranĝoj, plene uzas la unikajn metrikajn formojn de tradicia ĉina poezio. Ĉi tio montras, ke la eblaj tradukoj de ĉi tiu poemo estas neelĉerpeblaj. La ĉina tradukkritikisto Feng Quangong kredas, ke ĉi tio reflektas la generan naturon de literatura traduko — la novan fenomenon, ke unuopa verko povas generi multajn tradukojn.

Ardo tradukis el la angla lingvo

Rakonto de la urbeto

Verkis: *Zhuang Nu*

Trad.: *Trezoro Huang Yinbao*

En mia urbet',
plenas gajo kaj ĝoj'.
Se vi venas al la urbo,
akiros multegon.

Ŝajnas bela bild',
kaj gaja kant'.
Vero, bono kaj belego,
plenas en la urbeto.

Bela rakont' kaj onidir'
cirkulas tra la urbet'.
Bonvolu kun via amik'
gasti en la urbet'.

Bela rakont' kaj onidir'
cirkulas tra la urbet'.
Bonvolu kun via amik'
gasti en la urbet'.

Propagandisto Hongo

Ĉielismo

Antaŭ unu tago de la vojaĝo al Esperanto-simpozio okazonta en Uhano mi ricevis informon ke samideano Hongo sekretario de Dejan-a Esperanto-Asocio ankaŭ vojaĝos al Uhano por partopreni la simpozion, veturonte per sama vagonaro, kiun mi prenos. Ĉe mi ĉiam estas ĝojinde renkontiĝi kun al esperantistoj. Mi tuj respondis kun mia vagona informo.

Sekvan tagon vespere mi komencis mian vojaĝon trajni de nia urbo Siano al Ĉonĉino. Nokte la vagonaro veturis 500km en la montaro inter la du provincoj Ŝensi kaj Siĉuan. Dume mi dormis profunde en la vagono. Kiam mi malfermis miajn okulojn matene, la vagonaro jam trapasis la urbon Dejan. Ne gravas, ĉar mi ne konas samideanon Hongo, ankaŭ ni ambaŭ ne promesis renkonti unu la alian en la vagonaro. Kiel kutime mi komencis prepari mian matenmanĝon, tamen tiam en la vagono disaŭdiĝas la radio: Radia homserĉo. Radia homserĉo. La pasaĝero sro Ĉielismo sekretario de Siana Esperanto-Asocio, via samideano Hongo atendas vin en la vagona restoracio, via samideano Hongo atendas vin en la vagona restoracio. Bonvenon al la vagona restoracio! Aŭdinte la radian disaŭdigon, mi tuj lasis la preparon por mia matenmanĝo, kaj rapide iras al la vagona restoracio.

En la vagona restoracio mi vidis samideanon Hongo. Li estas mezaĝa sinjoro alta, bela kaj aktiva kunportante Esperanto-signon sur sia brusto. Mi invitas lin veni al mia vagono. Antaŭ ol nia foriro li sincere dankis al juna kaj bela parolistino en la disaŭdigĉambro ĉe la vagona restoracio. Okaze li ankaŭ konatigis al la juna parolistino mian esperantistecon ŝajne grava kiel granda persono, ankaŭ ke ni ambaŭ partoprenos iun gravan simpozion por evoluigi Esperanton… Ŝajne la juna parolistino ne komprenas valorecon de Esperanto, tamen ŝi estas feliĉe sentanta sian kontribuon por la valora afero.

Reveninte la vagonon, mi jam estas konata de aliaj pasaĝeroj, eĉ kelkaj ekkonsultis de ni Esperanton. Unue Hongo prezentis al interesantoj sian Esp-asocian karton, indikante ĝian oficialecon kun stampa sigelo de Dejana Esperanto-Asocio ankaŭ Civila administracio de la Dejana Registaro. Tio mirigis min, ĉar kutime la civila administracio ne stampas sian sigelon sur la neregistaran asocion. Okaze ĉiuj kredas ke Hongo estas oficiala kaj aŭtoritata je Esperanto. Post la krediga prezentado Hongo komencis sian rakonton pri Esperanto. Li parolas nehaste sed interese kaj memfide. Ja lia rakonto allogis ĉiujn pasaĝerojn ankaŭ min. Surloke kelkaj esprimis sian lernemon, kaj Hongo notis ilian adreson. Mi sentis ke la vagona vojaĝo ekde Dejano ĝis Ĉonĉino estis tre plezura kaj rikolta por Esperanto-propagando.

Ĉonĉino situas ĉe Janzi-rivero, kaj en ĝia malsupra parto situas alia ĉerivera urbo Uhano. Ni trajnis ĝis Ĉonĉino cele por ŝipi al Uhano. Post kiam ni eniris pasaĝeran ŝipon, ni vidis plenan kajuton da homoj. Trovinte nian litlokon, Hongo eliris la kajuton ŝajne por serĉi ion. Kion li volas serĉi, mi ne scias. Mi estas iom laca post la taga veturado sur la fervojo. Mi kuŝas sur mia lito legante libron. Kaj tiam en la kajuto disaŭdigas la radio: Radia homserĉo. Radia homserĉo. Pasaĝero Hongo serĉas samideanojn, kiuj ŝipvojaĝas al Uhano por partopreni la gravan simpozion por akceli disvastigon de Esperanto en Ĉinio… Via samideano Hongo kunportanta verdstelan flagon de Esperanto atendas vin en la ŝipa restoracio, via samideano Hongo kunportanta verdstelan flagon de Esperanto atendas vin en la ŝipa restoracio. Bonvenon al la ŝipa restoracio! Aŭdinte la radian disaŭdigon, mi forlasis mian liton, kaj ne rapide iras al la restoracio troviĝanta sur la ŝipa ferdeko, ĉar mi jam konscias, kion volas fari Hongo nome de Radia homserĉo.

Fakte kiam mi eniris la ŝiprestoracion, multe da pasaĝeroj jam sidas ĉirkaŭ Hongo, aŭskultante lian rakonton pri Esperanto, certe jam leginte lian Esp-asocian karton kun la du oficialaj sigeloj. Mi estas parolema en Esperanto kaj salutas Esperante al samideano Hongo. Post salutaj frazoj Hongo faris demandon al iu knabino, ĉu Esperanto estas belsona? La knabino estas hontema respondinte al li ke jes. Okaze Hongo fariĝis pli aktiva, eĉ komencis instrui facilajn frazojn de Esperanto. Por ne ĝeni lian instruadon, mi promenis al la ŝipnazo. Tiam vesperiĝas kaj la pasaĝera ŝipo navigas kuraĝe inter krutaj montvaloj. Spektante la krutajn montpintojn ambaŭ de Janzi-rivero kaj malluman torenton sub la ŝipo mi konscias malfacilan vojon de Esperanto. Malgraŭ tio mi alte aprezas la saĝan agadon de Hongo utiligi publikan radioservon senpagan por allogi la pasaĝerojn. Kiam mi turnis mian rigardon, mi vidis lian figuron ankoraŭ instruanta en la ŝiprestoracio. Mi kredas ke ĉinokte ni ambaŭ havos kontentan dormon en la ŝipvojaĝo…

Sekvan matenon nia ŝipo atingis la riverhavenan urbon Uhano, kie tradicie aktivas entuziasmaj esperantistoj. Sed poste kelkajn tagojn en la simpozio Hongo estis silente aŭskultanta tiom da pasiaj paroladoj kaj strategiaj ideoj por pli rapide akceli disvastigon de Esperanto tra la vasta lando Ĉinio. Je la fino de la simpozio mi demandis al li, kio estas via propono por la ĉina E-movado? Hongo ne respondas silentanta kontraŭ mia demando. Mi komprenas lian silenton ke li ne ŝatas tiom da pasiaj paroloj kaj strategiaj ideoj por Esperanto, sed li ne volas kontraŭdiri al tiel entuziasmaj samideanoj, kiuj ŝatas propagandi ĉine al ĉinaj esperantistoj Esperanton, sed ne havas kuraĝon propagandi al siaj familianoj kaj socia publiko. Por forigi la silenton mi demandis, kiam li revenos hejmen? Ĉu ankoraŭ per ŝipo? Hongo respondis ke jes. Mi diris al li, ke mi jam mendis flugbileton de Uhano al mia hejmurbo Siano. Mi deziras al li bonan revenan vojaĝon, kaj esperas ke li vizitos nian urbon Siano, ĉar la lasta kunvojaĝo kaj nuna kongreso jam donis al ni ambaŭ intiman amikecon.

Sekvan tagon post la kongreso, kiam mi eniris la homplenan salonegon de Uhana flughaveno, mi sentas ion mankanta, kvankam tie ne mankas homoj eĉ amasas multoblaj pasaĝeroj ol en la vagonaro kaj ŝipo. Okaze mi cerbumas, kio mankas al mi?

Aĥ, al mi mankas propagandema kunvojaĝanto Hongo. Sed tiam en la homplena salonego disaŭdigas la radio: Radia homserĉo. Radia homserĉo. La pasaĝero sro Ĉielismo sekretario de Siana Esperanto-Asocio, unu sinjoro atendas vin en la salona servocentro por sciigi gravan aferon pri Esperanto, unu sinjoro atendas vin en la salona servocentro por sciigi gravan aferon pri Esperanto. Bonvenon al la salona servocentro! Aŭdinte la radian disaŭdigon, multaj pasaĝeroj ĉesis momenton, ŝajne cerbuminte la vorton Esperanto kaj kio estas Esperanto? Mi jam divenis, kio okazos al mi. Mi tuj tenante mian valizon rapide iras al la salona servocentro. Tie mi vidis la divenitan amikon Hongo. Li refariĝas aktiva kaj memfida samideano. Mi demandas al li, kion gravan pri Esperanto vi volas sciigi al mi? Li diris ke la ĉina movado ne bezonas tiom da strategiuloj, sed multe da konkretaj agantoj. Mi prenas kaj premas lian manon, dirante: Mi konsentas kun vi. Mi jam vidas viajn agadojn konkretajn per publikaj radioj en la vagono kaj ŝipo eĉ nuntempe en la flughavena salono! ◆

*Hongo kiel origina modelo de ĉi tiu novelo venis de sro You Honggang(游洪刚) en la urbo Deyang de Sichuan-Provinco, Ĉinio

*Ĉielismo skribis la 15an de Decembro 2025 en Siano, Ĉinio

Laborkanto

Verkis: *anonimulo*

Trad.: *John Huang*

Sen aŭto, sen hejmo,
sen ŝparo, sen geedziĝo.
Prezoj konstante supren,
salajroj falas sen kompenso.

Malfacila estas migra laboro,
tage kaj nokte sen ripozo.
Mono malmulta en la mano,
ŝvito fluas sen paŭzo.

Se la ĉielo donus ŝancon,
mi lernus per tuta forto.
Mi enirus faman kampuson,
kaj laborus en oficejo kun komforto.

D-ro L.L. Zamenhof

Verkis:

Miguelángel Bueno Ávila





-Interesaj atestoj de la lastaj tagoj kaj funebra ceremonio de D-ro L.L. Zamenhof. En la centjariĝo de lia morto, 1917- 2017-

" Estas konate, ke Edmond Privat, kiu en la fino de 1916 vizitis en Varsovio la kreinton de Esperanto, vidante lian malsanan aspekton, baldaŭ forlasis lin kaj al la tutmonda esperantistaro faris la meditigan proponon, la sekvontan kongreson aranĝi en la ĉefurbo de Polujo, por evitigi al D-ro Zamenhof longan vojaĝon. Jam pli frue travojaĝintoj rakontis pri malbona farto de la Majstro.

Ĉar...lia kormalsano komencis disvolviĝi tuj post la eksplodo de la milito“, D-ro Leono Zamenhof (frato de Ludoviko) skribas. „La atakoj de la brusta angino, komence maloftaj, en la monato majo de la pasinta jaro fariĝis tiel oftaj, ke ili tute malebligis al li ne nur metiajn okupojn, sed ankaŭ lian plej amatan laboron por Esperanto. Tiuj atakoj ofte aperadis, kelkfoje tage kaj nokte forpeladis de li kvietan dormon.

„La doloriga stato de lia sano malĝojige influis lian psikon. Ĉiam egalanima, kvieta, la mortinto en la lasta tempo pro deviga senlaboreco estis tre nervekscitita. De oktobro ĝis februaro d-ro L.L. Zamenhof sin sentis relative pli bone, kvankam la atakoj ne forlasis lin tute, aperante nun pli malofte kaj malpli dolorige.

En tiu pli hela intertempo de lia malsano la E-kreinto regajnadis esperon por nova laboro kaj revis pri la progreso de siaj ideoj post la milito.

En tiu tempo li ekhavis la ideon, verki ampleksan Esperantan vortaron. Esperante, ke li povos preni sur sin tiun grandan laboron, li kelkfoje pri tiu temo korespondis kun s-ino M. Hankel en Dresden. La lasta letero, kiu devis esti sendata al s-ino H., ne finita restis inter la forlasitaj de li manuskriptoj.“◆

(Unua parto. *Daŭrigota*.)

Henriel Fidilalao

Ho, nia kara Zamenhof

Feliĉan naskiĝtagon al vi, kara Zamenhof!
Vi al ni postlasis mirindan ilon,
Por amika babilad' kun nekonato,
Aŭ kun alilandano mejlojn for de ni.
Ĉar Esperanto pontas inter koroj.

Sed vi kreis ĝin ne nur tiucele ---
Via lingvo ja faras pli ol tio:
Ĝi forigas timon pri nia speci'
Kaj finfine komprenigas al ni,
Kiom valoras interhoma rilato.
---- Do, feliĉan datrevenon, kara!



Ario de juneco

Yin Jiaxin

Daŭrigante la enhavon de numero 006

Ĉapitro 8　Gen Men rakontas

Iuj teamanoj de la scienca esploro pri Antarkto venis al nia urbo por doni prelegojn. Mi ricevis du biletojn por la prelego okazonta je la 8:30 dimanĉon matene. Kiun mi invitos al la prelego? Mi ekmemoris pri He Lei. Ŝi interesiĝas amplekse. Sed mi informiĝis, ke sabaton noktomeze ŝi iros kun siaj gepatroj al la fervoja stacio por renkonti sian fratinon kaj bofraton, kiuj laboras en alia urbo kaj ĵus geedziĝis. Certe ŝi estis dormonta ĝis malfrue. Tial mi decidis iri sola al la prelego.

La prelego estis okazonta en Donsan-teatro. Kiam mi atingis tien, estis la 7:40. Mi decidis promeni iom. Vidinte telefonbudeton, mi denove pensis pri He Lei kaj volis telefoni al ŝi. Sed ĉu ŝi jam vekiĝis? Ĉu ŝi volus veni? Kion oni pensus pri tio, ke junulino kaj junulo sidas kune en la teatro? Nu, lasu, lasu! Telefonvoku. Ŝi ricevis la vokon.

"Saluton, ĉu vi estas He Lei? Mi estas Gen Men. Pardonon! vi ankoraŭ ne ellitiĝis, ĉu?"

"Mi neniam dormas ĝis malfrue. Kio okazas?"

"Iuj teamanoj de la scienca esploro pri Antarkto donos prelegon je la 8:30 hodiaŭ matene en Donsan-teatro. Mi havas du biletojn..."

"Bonege! Atendu, mi tuj iros."

"Bone, mi atendos vin ĉe la enirejo."

Ŝi baldaŭ alvenis per biciklo kiel birdeto. Ŝi transpasis la straton ĝuste antaŭ ruliĝanta aŭto. Kiel danĝere!

"Vi estas tro riskema, la transiro estis vere danĝera," mi riproĉetis ŝin.

"Ne gravas, mi havas bonan sorton." Ŝi tute ne zorgis.

"Kial vi ne portas okulvitrojn?" mi demandis zorgeme.

"Ĉu mi aspektas bone kun okulvitroj?" respondis ŝi per demando.

"Jes. Tre belaspekta, kiel klerulino kun ili."

Ŝi diris nenion kaj eniris la teatron kune kun mi. Ekde tiu tago ŝi konservis la kutimon porti okulvitrojn.

La vetero estis sufoke varmega kaj ŝajnis, ke pluvos. Mi kiel antaŭe biciklis al Sijana Kultura Palaco por doni Esperantan lecionon. Ĉe la enirejo, mi vidis He Lei ĵus alvenintan. Renkontinte min, ŝi ekscitiĝis kaj demandis: "Divenu, kien mi iris hodiaŭ?"

"Kiel mi povus diveni?" Mi tiumomente rimarkis, ke ŝi aspektis iom laca kaj polvokovrita.

"Provu diveni," ŝi insistis.

"Bedaŭrinde, mi ne kapablas."

"La montego Vudan. Mi akompanis mian fratinon kaj bofraton tien. Mi rekte venis sen banado."

"Se karmemora Zamenhof scius, ke vi havas tian entuziasmon por lerni Esperanton, li certe ĝojus ĝis morti la duafojan morton."

"Hmm—" Ŝi kuntiris la nazon kaj faris grimacon.

“Vi certe ne portis sunĉapelon dum la vojaĝo. Rigardu, vi preskaŭ fariĝis nigra knabino,” mi ŝercis.

“La koloro de mia haŭto estas ĉiam tia. Ĝi estas sana haŭtkoloro, mi fieras pri ĝi.” Ŝi denove faris grimacon.

Apenaŭ mia leciono finiĝis, ekpluvegis. Do, mi kaj la kursanoj kun biciklo restis kaptitaj en la vestiblo de la Kultura Palaco. Kiam la pluvo iompostiom malpliĝis, la kursanoj foriris per biciklo. Ĉar mia lernejo ne estis malproksime, mi decidis atendi ĝis la pluvo plimoderiĝos. He Lei restis kune kun mi. Tiam mi rimarkis, ke ŝi ŝanĝis siajn okulvitrojn.

“Ŭa! ĉu vi ŝanĝis okulvitrojn?”

“Jes, kiel ĝi aspektas?”

“Belaj.”

“Dankon !” ŝi diris en Esperanto.

“Nedankinde!” mi diris ankaŭ en Esperanto.

Ni ridetis interkomprene.

“Miaj gepatroj planas vojaĝi al Beijing dum la somera libertempo.”

“Ĉu vi ankaŭ iros?”

“Ankoraŭ ne decidis.”

“Kial?”

“Mi volas plibonigi miajn Esperanton kaj anglan lingvon gvidota de vi.”

“Do, ne iru. Vi havos ŝancon viziti Beijing en la estonteco,” mi sugestis.

“Bone, mi ne iros.” Ŝi paŭzis kaj daŭrigis: “Proksimiĝas la finaj ekzamenoj, eble mi ne povos ĉeesti la venontan Esperanto-kurson, mi revenos la 14-an de julio."

“Bedaŭrinde!” mi diris en Esperanto.

“Jes.” Eĥinte en Esperanto, ŝi ridetis kun komprena mieno.

La pluvo daŭris, kvankam estis somero, tamen la nokta vento estis iom malvarma.

“Ĉu vi malvarmiĝas?” ŝi demandis kaj ektenis miajn manoj. “Ĉu ni dancu? Ni iom dancos kaj varmigos nin. Venu, unu — du — tri — kvar, unu — du — tri — kvar, unu...”

En la malvarma nokta vento dancis du varmaj koroj, sub la malforta lumo brilis paro da helaj okuloj antaŭ mi.

La pluvo ĉesis kaj la nokto jam profundis. Mi akompanis ŝin ĝis la enirejo de la Medicina Universitato.

“Dankon. Mi devus inviti vin al nia hejmo, sed estas jam malfrue.”

“Hĉum!” Mi ekternis.

“Ha ha... vi malvarmumiĝis!” Ŝi intence mokis.

“Ne.” Fakte mi ja sentis min malvarma.

“Reirinte, ŝanĝu la malsekajn vestojn, trinku tason da varma akvo kaj kovru vin varme.”

“Ne gravas, kiel mi povus tiel facile malvarmumiĝi? Vi kuracistoj ĉiam tro zorgas, mia korpo estas forta.”

“Mi ne kredas.” Ŝi paŭtis.

La strato, kiu estis vivoplenaj dum la tago, tiumomente estis kvieta. Sur la strato sin trovis neniu krom mi. La mondo apartenus al mi!

Proksimiĝante la loĝejo, mi aŭdis, ke iu ludas sur elektronika orgoneto la lamentan kanton teksitan de Guo Moruo. Certe estis instruistino Hu, mia najbarino. Ŝi ofte ludis la kanton, kies melodio plaĉas al mi. Iam mi kantis la kanton laŭ la de ŝi ludita melodion. “La larmoj preskaŭ elĉerpiĝis, amato, kial vi ankoraŭ ne revenas? Ni, pro li, preskaŭ elĉerpis la larmojn; niaj koroj, pro li, preskaŭ rompiĝis...” Estis jam malfrue, kaj la sola maljunulino ankoraŭ ne ripozis, ludante la lamentan kanton. Verŝajne ŝi denove pensis pri siaj karuloj.

“Instruisto Hu, ĉu vi ankoraŭ ne ripozas?” Vidante, ke ŝia pordo estas malfermita, mi laŭte salutis.

La muziko ĉesis.

“Vi finfine revenis!” Instruistino Hu rapide eliris el la ĉambro kaj diris: “Mi pensis, ke la pluvo vin kaptis. Mi portis al vi ombrelon, sed la pluvo ĉesis kiam mi estis duonvoje. Mi intencis maldormi ĝis vi revenis."

Ho, kiel amema maljunulino! Kia amo estas ĉi tio, patrina amo.

Kiel diris He Lei, mi estis trafita de malvarmumo serioze. Sed mia laboro devis persisti, kaj la Esperanto-leciono devis esti prelegita laŭ la horaro. Senenergie! Mi maltrankvilis, ĉu la tiuvespera leciono sukcesos? Kial mi senias min senforta? Ĉu pro la malsano, aŭ pro foresto de He Lei? Ho, kio okazis al mi? Kial mi havis tiajn pensojn? Vere diabla!

Puŝmalferminte la pordon de la klasĉambro, mi kiel kutime diris en esperanto: “Saluton, kamaradoj!”

“Saluton!” respondis la kursanoj kune.

Ah, kiun mi vidis? Ĉu ne estis He Lei? Ŝi sidis sur sia sidloko, vestita per ruĝa striita robo, tiel vigla kiel ĉarma. Mi kapbalancis al ŝi kaj komencis la lecionon. Kun rideto sur la vizaĝo ŝi rigardis min kvazaŭ dirante: “Jes, mi venis.”

Kvankam mia voĉo estis raŭka, tamen la leciono sukcesis, eĉ pli bone ol mi esperis. Post la leciono, la kursanoj ĉirkaŭis min, demandante pri mia sano kaj sugestante, ke mi konsultu kuraciston en hospitalo.

Kiam mi eniris la oficejon por lavi la manojn, He Wei sekvis min enen.

“Ĉu vi ne diris, ke vi ne venos hodiaŭ?” mi scivole demandis ŝin.

“Mi volas veni, tio estas mia libero.” Dirinte kun obstina mieno, ŝi donis al mi botelon de rapidagaj kapsuloj kontraŭ malvarmumo.

“Nu. Mi sciis, ke vi malvarmumiĝos,” ŝi diris kun ŝajna triumfo.

“Ah! Ne estas mirinde, ke mi malvarmumiĝis, ĉar vi sekrete malbenis min,” mi ŝercis intence,

“Mi tute ne malbenis vin.” Ŝi ŝajnis kolereti.

Preninte la medikamenton, mi esprimis dankon al ŝi.

“Ne dankinde,” ŝi ridete diris en Esperanto.

Apenaŭ enirinte mian ĉambron, instruistino Hu alportis tason da varma kaĉo.

“Ve! Kun tiel serioza malsano, vi insistis doni la leciono. Vi ĝuste preferas monon al vivon,” ŝi malaŭdis.

“Mi donis Esperantajn lecionojn senpage,” mi klarigis.

“Ho?” Ŝi estis iom surprizita.

“La kursanoj pagis la lernokotizon, parton por la Kultura Palaco kiel luon, kaj la ceteron por la Esperanto-asocio. Mi ne prenis eĉ unu cendon.”

“Mi ne sciis, ke estas tiel. Sed malgraŭe vi devas atenti vian sanon. Vi estas okupita de mateno ĝis nokto.” Ŝia tono estis tenera.

Mi frapetis al mi la bruston kaj memfide diris: “Ne gravas. Mia korpo estas forta.”

“Ne estu tro neglektema. La sano gravas. Ne okupiĝu en kaj ekster la lernejo, spite tiel severan malsanon,” ŝi diris kun riproĉeta tono.

“Simpla malvarmumo, ne grava.” Efektive mi neniam konsideris malvarmumon kiel malsanon.

“Ve, kion mi povas diri al vi, junulo? Mi pensas, ke vi devus konsideri edziĝon, por ke la edzino prizorgu vin. Ĉu vi havas koramikinon?”

“Ne.”

“Ne?” ŝajnis, ke li ne kredas. “Ofte venas multaj knabinoj al vi, ĉu vi ne elektis iun el ili?”

“Mi ne volas konsideri tian aferon portempe,”

“La malgrasa fraŭino frekventas vin. Mi pensis, ke ŝi estas via koramikino.”

“Ne, ne.” Mi komprenis, ke ŝi indikis pri He Lei. Mia koro ekbatis rapide.

“Vi havas dudek tri jarojn, vi devus konsideri tian aferon. Mi komprenas, ke vi estas dediĉita al via laboro, sed vi ne povas ignori la aman aferon.”

Iun tagon instruistino Hu vokis min al sia ĉambro, fermis la pordon kaj diris kun rideto: “Diru al mi la veron, ĉu vi vere ne havas amikinon?”

“Ne,” mi respondis firme.

“Ĉu vere ne?”

“Ne.”

“Kian knabinon vi volas serĉi? Kiaj estas viaj kriterioj por koramikino?”

“Kriterioj? Kun la diplomo de kolegio kaj estante malriĉa instruisto, kiajn altajn kriteriojn mi povus havi?” mi diris kun iom da memsarkasmo.

“Parolu serioze kun mi, kiuj estas viaj postuloj por koramikino?”

Ŝajnas, ke ŝi devigis min listi la kriteriojn. Jes, estis tempo por mi konsideri la aman aferon. Ĝenerale oni postulis, ke la knabino estu bela, havu konsiderindan enspezon kaj bonan laboron. Kian knabinon mi volis serĉi? Mi pensis, ke la ordinara aspekto sufiĉe taŭgas, ŝia enspezo kaj kvalito de la laboro estas malpli gravaj, ĉefe la kanbino devas esti bonkora kaj subteni min je la afero.

“Kion vi celas per subteno de via afero? Ĉu vi volas, ke la knabino helpu vin en la vivo aŭ en la studo? Alivorte, ĉu vi volas serĉi kapablulon de dommastrumado aŭ entreprenemulon?”

“Kian ajn taŭgas. Mi ne estas postulema.”

“Ĉu mi povas svati knabinon por vi?” Ŝajnis, ke ŝ estis bone preparita.

“Koran dankon!” Tio estas miaj sinceraj vortoj.

Ŝi al mi prezentis: “Ĉi tiu knabino aspektas... kiel diri? Sufiĉe indas je vi. Ŝi havas abiturientan diplomon kaj laboras en la komerca buroo de la urbo Ŝan. Ŝia salajro plus aliaj enspezoj estas pli ol la via. Ĉefe, la knabino estas simpatia kaj kompatema. Ŝi estas kapablulo de dommastrumado kaj povas helpi vin multe je ĉiutaga vivo. Ŝi havas la saman aĝon kiel vi, ankaŭ naskiĝis en la jaro de la drako. Se vi volas konatiĝi kun ŝi, mi informos ŝin. Kompreneble, geedziĝo ne devas esti devigita, vi devas konsideri ĝin zorgeme antaŭ ol repondi mi.”

Kiun prezentis instruistino Hu? Eble estis ŝian nepinon, kiun mi renkontis du aŭ tri fojojn. Ŝi impresis min per belaspketo kaj laboremo.

“Bone, mi donos al vi respondon la 15-an de julio.”

Kial mi elektis la 15-an de julio? He Lei estis vizitonta min je la 14-a de julio. Diable! Kia rilato troviĝas inter mia respondo al instruistino Hu kaj la alveno de He Lei? Ĉu mi enamiĝis al ŝi? Ĉu mi indis ami ŝin? Ŝi estis filino de fama profesoro, talenta universitata studento kun superaj kondiĉoj en ĉiuj aspektoj. Ĉu mi indis? Ĉu mi indis?

La urbo Ŝan, antikva, moderna kaj prospera urbo sed sen Esperanto-organizo. La urbo Sijan, juna urbo kun la aktiva Esperanto-asocio, kaj... kio pliaj? Ho, ne pensu pri ĝin. Tamen, kiam ŝtono estas ĵetita en la lageton, neeviteblas ondetoj. Mia cerbo estis konfuza.

Oni frapis la pordon. Kiu estis? Estis He Lei!

“Ĉu vi ne diris, ke vi venos morgaŭ al la leciono?”

“Kio? Ĉu mi ne estas bonvena?” Ŝia tono estis petolema.

“Kiu aŭdacas ne bonvenigi vin?” Mia koro ekbatis rapide.

“Ni havis la lastan ekzamenon hodiaŭ posttagmeze. Vespermanĝinte mi tuj venis.”

“Kiel estis la resulto? Certe bona, ĉu? Vi denove ricevos la stipendion la venontan semestron.”

“Kompreneble, kial demandi? Ni kvinajaruloj devos fari praktikon en la venonta semestro.”

“En kiu sekcio?”

“Sinsekve en ĉiu sekcio. Mi unue iros al la sekcio de interna medicino.”

Ŝi petis, ke mi helpu ŝin fari legoplanon de la anglalingvo kaj Esperanto, mi elektis por ŝi kelkajn legaĵojn. Poste ni babiladis ĝoje dum mia koro batis pli kaj pli rapide. Mi volis verŝi la vortojn jam longe preparitajn, sed ne. Kiam ŝi hejmeniris, kiel kutime mi akompanis ŝin tra la tunelo. Survoje mi finfine ne plu detenis min: “He Lei, pri unu afero mi ne povas decidi, mi volas konsulti vin.”

“Kio estas?” Ŝi surpriziĝis iomete.

“Oni demandis, ĉu mi volas transposteniĝi al la urbo Ŝan. Ĉu vi opinias, ke mi iru aŭ ne?”

Mi esperis, ke ŝi faru negativan respondon, sed ŝi ne. Ŝi silentis iomete kaj diris: “La urbo Ŝan kompreneble estas pli bona ol ĉi tie.”

“Ĉu vi opinias, ke mi iru?”

“Jes.” Dirinte, ŝi ĵetis al mi rideton.

Ho! Mi desapontiĝis. Kial? Mi ne sciis. La koro ne plu batis tiom rapide kiel ĵuse, male iĝis mirinde trankvila.

Pluvis vespere de la 14an de julio kiam la leciono finiĝis. Ĉe la busohaltejo mi kuraĝiĝis kaj flustris al He Lei: “Ni ne prenu la buson, iru piede, ĉu bone? Mi volas babili iom kun vi.”

Ŝi kapjesis kaj sekvis min silente.

En mia poŝo estis letero al ŝi. Mi volis doni ĝin al ŝi. Sed en tiu momento mia kuraĝo estis forlavita de la pluvo kaj forblovita de la nokta vento.

Ŝi rigardis min kun demandaj okuloj. Sinĝena kaj maltrankvila, mi ne elprenis la leteron: “Hieraŭ mi menciis, ke iu petis min transposteniĝi al la urbo Ŝan, mi ne informis al vi la detalojn. Por la transposteniĝo necesas kondiĉo.”

“Kia kondiĉo?”

“Ŝi postulas, ke mi estigu koramikan rilaton kun knabino en la urbo Ŝan.”

“Kompreneble estas bone transposteniĝi al la urbo Ŝan. Sed aldoni tian kondiĉon...” Ŝi ne finis la vortojn.

Ni ambaŭ tenis ombrelon respektive. Mi ne povis vidi ŝian mienon.

Post malonga paŭzo ŝi demandis: “Ĉu vi ne havas koramikinon? Ĉu vi ne renkontis ŝatatan knabinon?”

“Ne. Ĉiutage krom la laboro en la lernejo, mi ankaŭ devas okupiĝi por Esperanto-asocio, pri verkado kaj tradukado. Mi pensas, ke vera viro devas establi sian sukcesan aferon antaŭ ol edziĝi.”

Ŝi laŭdis: “Via kariero iras bone. Publikitaj estas viaj kelkaj rakontoj kaj tradukaĵoj. Cetere vi akiris atingojn en la laboro de Esperanto-asocio.”

“Jes, mi jam kreis favoran situacion en tiu ĉi urbo, do mi iom bedaŭras forlason.”

“Do, kial vi volas foriri?”

“Ĉu ne foriri?” Espero emerĝis en mia koro.

Ŝi silentis kaj senĉese turnis la ruĝan ombrelon sur sia ŝultro.

Pri kio ŝi pensis? Kial ŝi silentis? Ĉu mi amis ŝin? Ĉu mi indis je ŝi? Ĉu mi indis?

La mano en la poŝo forte tenis la leteron, sed mi ne havis kuraĝon elpreni ĝin.

Ni paŝis silente. Regis silento. Renkontinte akvan flakon, ni kune trairis ĝin intence, ankoraŭ senvorte. Mi ne povis elteni la embarasan silenton, do mi etendis mian manon ekster la ombrelo.

“Ho, la pluvo ĉesis.” Mi volis rompi la silenton.

Ŝi levis la kapon kaj rigardis la noktan ĉielon. Ŝia bruna vizaĝo aspektis ĉarma sub la ruĝa ombrelo. Ĉu tia estus la malhelhaŭta virino priskribita en la sonetaro de Shakespeare?

“La aero estas tiel freŝa!” Mi trovis alian frazon.

“Jes,” ŝi indiferente eĥis.

“Pri kio vi pensas?” mi volis altiri ŝiajn vortojn.

Ŝi turnis sian vizaĝon al mi kaj ridetis milde, dirante: “Pri nenio.”

La mano ankoraŭ forte tenis la leteron. Kion fari, se ŝi rifuzos mian esprimon de amo? La pasinteco estis bela kaj la amikeco valora. Mi ne sciis, kion ŝi pensas, nek volis detrui nian amikecon pro momenta maltimo.

La malbenita nokto, malbenita vojo!

Ĉe la pordego de la medicina kolegio ni haltis kaj reciproke diris adiaŭ en Esperanto.

“Ĝis revido!”

“Ĝis revido!”

Sed mi ne ekpaŝis kaj nek ŝi. Kion ŝi atendis? Sentoj, racio, sentoj, racio... Kio okazis al mi? mi ne povis. Mi ne indis je ŝi. Lasu, lasu. Mi diris: “Mi foriras.”

“Bone.”

Ŝi eniris la pordegon kiel birdeto.

Facileco, kontraŭdiro, dolĉeco, bedaŭro, liberigo, doloro... Mi tute ne povis ordigi la pensojn. Lasu, lasu. Forgesu ĝin, ne pensu plu! ◆

daŭrigota

Flegistino kaj almozulo

Yin Jiaxin

En iu vespero de aŭtunomezo la lastaj radioj de la suno karesis la urbajn stratojn kiel adiaŭa kiseto. Ŝi rapide englutis la lastan buŝon da sia manĝaĵo kaj elkuris el la hejmo, dum ŝia trijara filino kriadis “Panjo, ne foriru...”. Tiun tagon ŝi, flegistino, devis fari deĵoron de la sepa vespere ĝis la sesa matene de la sekva tago.

Ĵus ekbrulis la stratlampoj, kiam ŝi ekvidis maljunulon en malpuraj blua jako kaj nigra pantalono sidantan ĉe la rando de la vojo. Verŝajne li estis almozulo. Li severe tremis kun la grizhara kapo trempita de ŝvito. Profesia instinkto haltigis ŝiajn paŝojn.

“Sinjoro, kio okazas?” ŝi demandis la almozulon. Tiu levis la okulojn, en kiuj la vivo ŝajnis estingiĝi. “Malsatas... mi tre malsatas,” li murmuris per malforta voĉo.

Ŝi ekkaŭris por observi lin kaj siatempe vidis, ke sur lia dekstra frunto estas granda cikatro. “Pala vizaĝo, tremantaj manoj, multaj ŝvitoj. Tio ŝajne estas simptomo de hipoglikemio,” ŝi pensis.

“Atendu momenton!” Ŝi kuris al la stratangula manĝovendejo. “Unu botelon da oranĝsuko kaj ses viandajn baŭziojn (vaporumita farĉita pastobulo)!”

Reveninte al la almozulo, ŝi malŝraŭbis la botelon kaj etendis ĝin al li: “Trinku malrapide.” Vidante, ke li avide glutis plenan buŝon da suko, ŝi transdonis la baŭziojn. La almozulo tremante akceptis ilin, kaj post la unua mordo, larmoj ekaperis en liaj malhelaj okuloj.

Ŝi ekrigardis sian brakhorloĝon: 18:42.

“Sinjoro, mi devas iri. Ĝis!” Ŝi sin turnis kaj sin ĵetis en la urban krepuskon. En la zefiro flirtis la baskoj de ŝia blanka ventomantelo.

Kiam ŝi atingis la sekcio, restis nur tri minutoj ĝis la deĵorŝanĝo. Ŝi spirante surmetis sian flegistinan uniformon. Kolego ŝerce demandis: “Ĉu la infano denove obsedis vin?”

Ŝi nur ridetis kaj fiksis sian buŝomaskon. Lastatempe la vetero malvarmiĝis, kaj abrupte kreskis la nombro de pacientoj kun kardio-vaskula afekcio. Ŝi, ekde transpreno de sia deĵoro, senĉese okupiĝis pri prizorgado de pacientoj.

En la noktomezo, ekpluvis ekstere. Subite ŝi memoris pri tiu almozulo: ĉu li jam trovis rifuĝejon kontraŭ la pluvo?

En la dua duono de la nokto, oni alpuŝis rul-liton el la akceptejo por urĝaj malsanoj, kun akompano de du policanoj. Sur la rullito estis maljunulo en komata stato, kun oksigena masko kovranta la vizaĝon. Li suferis hemoragion kaj devis tuj ricevi operacion.

Post kiam la paciento estis enportita en operaciejon, en la sekcio regis provizora kvieteco. Nur tiam ŝi lacega povis sidi por ripozi iomete en la flegistina stacio.

Dum la siesto, ŝi sentis ke iu venis. Malferminte la okulojn, ŝi ekvidis ĉe la pordo maljunulon en blua jako kaj nigra pantalono, kun granda cikatro klare videbla sur la dektra frunto. Evidente tiu estis la almozulo. Ŝi miregis, kial li aperis ĉi tie en tia horo. “Sinjoro, kio okazas?” ŝi demandis konfuzite.

La almozulo respekte riverencis ŝin antaŭ ol diri: “Sinjorino, koran dankon al vi pro viaj trinkaĵo kaj baŭzioj.” Ŝi apenaŭ havis tempon por ion diri, li jam turnis sin kaj foriris.

Sur la seĝo ŝi restis muta de mirkonsterno, kiam eniris la deĵoranta kuracisto, ordonante: “La paciento ekmortis dum la operacio. Prenu blankan tukon kaj kovru lin. Poste transportu la kadavron al la mortintejo.”

Ŝi abrupte vekiĝis, komprenante ke ŝi ĵus ekdormetis, sonĝante. Sed la sonĝo estis tre reala, la bildo de la almozulo kliniĝanta dankeme estis ankoraŭ antaŭ ŝiaj okuloj. Ŝi skuis la kapon, provante forigi tiun strangan senton.

Kiam ŝi prenis la puran tukon kaj alproksimiĝis al la lito, sur kiu kuŝas ĵus-mortinta homon, ŝi surprize vidis, ke la mortinto surhavas bluan jakon kaj nigran pantalonon, kun granda cikatro sur la dekstra frunto. Tiu estis la almozulo! Teruro kiel glacia serpento subite ĉirkaŭpremis ŝin firme.

Ŝi kun la du policanoj silente puŝis la rulliton al la speciala lifto kondukanta al la subtera mortintejo. La lumoj en la koridoro brilis obskure kaj malforte. Ĝuste kiam ili alvenis antaŭ la lifton, ĝia pordo malfermiĝis. Ene estis nur unu homo. Estis tiu sama almozulo en blua jako kaj nigra pantalono! Li staris tie vivanta kaj vigla, senesprime barante la enirejon, kaj diris per seka voĉo: “La lifto estas plena. Bonvolu uzi la apudan lifton.”

Ŝi sentis, ke sango en ŝia tuta korpo frostiĝis. Ŝi fariĝis tro terurita por eligi eĉ sonon. La juna policano, sulkigante la brovojn, enrigardis en la malplenan kabinon kaj disputis: “Ĉu vi ne eraras? Ĉu ne estas nur vi ene?”

“Pardonon!” La almozulo ignoris ĉiujn ĉeestantojn, profunde ĵetis sian rigardon al ŝi kaj premas la butonon por fermi la pordon. La metalaj pordoj fermiĝis, forbarante lian vizaĝon kun cikatro.

“Kiel stranga ulo!” “ Kiel absurda!” la du policanoj kolere murmuris, kaj devis puŝi la kadavron al la apuda lifto atende.

Ĝuste en la momento kiam ili premis la alvokan butonon, terura eksono aŭdiĝis apude — frap! Sekvis la akra sono de metalo tordiĝanta kaj ŝnuroj rompiĝantaj. La tuta koridoro ŝajne ektremis. Ili konsternite returnis sin, kaj vidis, ke jam nigriĝis la indikilo de la antaŭa lifto, kaj tute malaperis la numero montranta la etaĝon.

Efektive, tiu lifto, sen iu antaŭa averto, suferis severan misfunkcion kaj rekte defalis ĝis la fundo!

Ŝi rigidiĝis surloke, kun la vizaĝo blanka kiel papero, en sia menso nur restis la profunda riverenco de la almozulo kaj liaj ĵusaj vortoj “La lifto estas plena.” Ŝi apogiĝis al malvarma muro, apenaŭ kapabante ne kolapsi. La du policanoj ĉesis insultadi, interrigardante. Iliaj vizaĝoj pleniĝis de posta surprizo kaj timo. En la obskura koridoro nur aŭdiĝis la malforta zumado de la alia lifto alproksimiĝante. ◆

PAPERFLOROJ

de *Yohanes Manhitu*

Beleco troviĝas en ĉiu loko,
troviĝas ankaŭ en paperfloroj
faritaj per ambaŭ manoj
imitante naturajn florojn.

Beleco ankaŭ troviĝas en falsaĵoj.
Se ni malkonas kio estas originala,
hodiaŭ aŭ iam en la estonteco,
malvero aspektos nature.

AI-FUNAN PAPÉL

Furak ema hetan iha fatin hotu,
hetan mós iha ai-funan papél,
ne'ebé ema halo ho liman rua,
lika-tuir ai-funan be naturál.

Furak mós ita hetan iha sasán falsu.
Se ita la hatene ne'ebé mak orijinál,
iha loron ohin ka aban-bainrua
buat-falsu sei parese naturál.

Tradukita de la aŭtoro mem el sia tetumlingva poemo "AI-FUNAN PAPÉL" (Jogjakarto, 2009);
Ungaran, Centra Javo, 6an de januaro 2023

Notoj:

1) La originala poemo ("AI-FUNAN PAPÉL") estis verkita en la tetuma (tetume: *lia-tetun*; indonezie: *bahasa Tetun*; angle*: the Tetum language*), la unua oficiala lingvo (sekvata de la portugala) kaj la unua nacia lingvo (inter la naciaj lingvoj) de la Demokrata Respubliko de Orienta Timoro (tetume: *República Demokrátika Timór-Leste*; portugale*: República Democrática de Timor-Leste*).
2) La originala poemo estis antaŭe publikigita en *Jornál Semanál "Matadalan"*, tetumlingva semajnagazeto iam aktiva en Dili, Orienta Timoro (N-ro 21, 18–24 nov. 2013) kaj en la libro *LIRIK SANTALUM: Kumpulan Puisi Dawan dan Tetun dengan Terjemahan Indonesia* (Jogjakarto: Diandra Kreatif, 2019). Esperante, "SANTALUM-KANTAĴOJ: Kolekto de poemoj en la davana kaj la tetuma lingvoj kun indonezia traduko", verkis kaj tradukis Yohanes Manhitu. La Esperanta versio de ĉi tiu poemo estis disvastigita en sociaj retoj, precipe *Facebook.* Baldaŭ, vi trovos tiun ĉi dulingvan poemon en nova libro titolita *OCEANO DE VORTOJ*, kolekto de esperantigitaj poemoj kune kun la originaloj en ok lingvoj. Esperantigis ilin la aŭtoro mem.◆

La Sorto de Aina

Ranja Zafinifotsy

Daŭrigante la enhavon de numero 006

Ni veturis ĉirkaŭ kvaronhoron. Ekstere pluvis. Ni devis iomete halti kaj atendi, ke la pluvo iomete trankviliĝu, ĉar la aŭto havis problemojn moviĝi, kaj la ŝoforo havis problemojn vidi la vojon.
Mi silentis en tiu ĉi luksa aŭto. Mia menso iris aliloke, transiris unu riveron, poste alian, naĝis laŭ la vasta maro, fine venis al la mezo de bela ĝardeno. La ĝardeno de miaj revoj. Subite mi pensis pri panjo, Valisoa kaj Tendry; ili certe atendis min nun. Mi imagis panjon kun ŝiaj magraj vangoj preskaŭ ostosimilaj; ŝi devis esti ĉe la sojlo, legante malnovan ŝiritan libron aŭ rigardante bildojn de sia forpasinta edzo.
Ho mia patrino, mi amas ŝin tutkore.
“Pri kio vi pensas?”, Fitia demandis.
Mi ektimis, ĉar mi ankoraŭ estis perdita en miaj pensoj.
“Kion vi diris?”
“Mi demandis: pri kio vi pensas?”
“Pri vivo kaj mizero.”
“Alian tagon, vi rakontos al mi iom pri via vivo, se vi volas, kompreneble.”
“Jes!”
“Ni alvenis. Atendu, la ŝoforo malfermos la pordojn por ni.”
“En kiu domo loĝas via patrino?”
“Ĉu vi vidas la flavgrizan? Tie ŝi loĝas.”
Ŝi montris al luksa domo kun granda florĝardeno. Du aŭtoj estis parkitaj meze. Tri ferocaj hundoj ligitaj en kaĝoj komencis boji, kiam ni alvenis. Purigistino, ĉirkaŭ kvindekjara, venis por bonvenigi nin. Ŝi estis aparte afabla. Ŝi eĉ helpis min demeti mian malsekan jakon.
Ni atendis en la salono, Fitia kaj mi. La purigistino ofertis al ni varman kafon, ĉar ni tremis pro la malvarmo, pli precize mi. Fitia ne povis atendi pli longe. Ŝi ekstaris por iri rigardi, kiam subite malfermiĝis iu pordo.
Elegante vestita sinjorino eliris el malluma ĉambro. Ŝi aspektis malĝoja, ŝiaj okuloj estis ŝvelintaj kaj ruĝaj; ŝi portis neĝblankan robon, longan por kaŝi siajn piedojn. Kiel mi povus priskribi ŝin? Tiel bela ŝi estis, kaj anĝela! Eĉ juna novedzino ne povis konkuri kun ŝi. Fitia similis al ŝi kiel du akvogutoj.
“Panjo!”, kriis Fitia.
“Mia filino! Fitia. Venu, lasu min kisi vin kaj tuŝi vin.”
Sed stranga afero okazis: la sinjorino, la patrino de Fitia, ne povis marŝi sola. Viro tenis ŝin, dirante al ŝi, kien ŝi metu siajn piedojn. Nur post kelkaj sekundoj mi rimarkis, ke ŝi estas blinda. Kial Fitia ne diris tion al mi? Kial tiel agrabla persono ne havas la ŝancon vidi sian propran belecon?
La vivo estas kruela kelkfoje.
“Sed kio okazis, panjo?”, Fitia miris.
“Vi celas miajn okulojn?”
“Jes... Vi eĉ havas kuglospuron sur via frunto. Sed kiu faris tion al vi?”
“Estis via patro, kara.”

“Kion vi celas? Ĉu mia patro sendis al vi siajn gardistojn?”
“Ĝuste!”
“Sed kion faris viaj gardistoj? Ĉu ili ne protektis vin?”
“Fakte la gardistoj de via patro venis dum la meso. Ili atendis ekstere, kaj kiam mi eliris el la preĝejo, ili pafis. Miaj gardistoj nenion povis fari.”
“Kaj mi sciis nenion pri tio. Mi bedaŭras, panjo.”
“Ne zorgu. Mi vivas, nur tio gravas. Kaj tion ĉi ni dankas al Dio, ĉar estas preskaŭ neeble postvivi kuglon, kiu trapikas la frunton por eliri malantaŭ la kapo.”
“Jes, dankon, vi scias, ke mi ne povis elteni la penson perdi vin.”
“Kial Fifaliana ne venas kaj kisas min?”
Fitia larĝe malfermis la okulojn; ŝi verŝajne scivolis, kial ŝia patrino faris ĉi tiun demandon.
“Fifaliana?”, balbutis Fitia. “Sed panjo, ĉu vi ne sciis tion?”
“Kion... kion?”
“Ke Fifaliana mortis.”
La aminda sinjorino metis siajn manojn al sia buŝo. Ŝi estis en ŝoko. Ŝiaj blindaj okuloj denove ruĝiĝis. Grandaj larmoj ruliĝis laŭ ŝiaj vangoj. Ŝi eĉ ne havis la vortojn por esprimi sian doloron. Ŝiaj lipoj tremis. Ŝia vizaĝo pli kaj pli malheliĝis.
Eĉ mi preskaŭ ploris. Mi povus imagi ŝian suferon; patrino, kiu ne scias pri la morto de sia filino, kiu ne ĉeestas ŝian entombigon kaj kiu eĉ ne povis adiaŭi ŝin, nek kisi lastan fojon ŝian senvivan korpon. Tio estas la plej terura torturo, kiun oni povas fari al patrino.
Krom mia patrino, mia biologia patrino. Ŝi neniam amis min de kiam mi naskiĝis, do scii aŭ ne scii, ke mi mortis, ne influus ŝin. Mi certas, ke ŝi ŝatus vidi min mortinta post mia eliro el ŝia utero. Sed ĉar mi estis bela kaj tre vivanta, nenion ŝi povis fari krom lasi min inter la fetora rubo por sufoki la odorojn.
“Kial vi ne diris al mi?”, ŝi demandis post kelkaj minutoj.
“Mi pensis, ke paĉjo alvokis vin. Li promesis tion al mi.”
“Kaj vi ankoraŭ kredas je la mensogo de via patro?”
“Mi tiom ĉagreniĝis pro la morto de Fifaliana, ke mi ne povis ĝuste pensi.”
“Kiel ŝi mortis? Ĉu ŝi suferis?”
“Ne, normale mi devus morti, ĉar la veneno estis destinita por mi.”
“Kio? Kia veneno?”
“La nuna edzino de paĉjo ne amas min. Ŝi pensas, ke mi estas obstaklo, ĉar ŝi volas havi la posedaĵojn de paĉjo por si kaj siaj infanoj. Do ŝi faris venenan manĝon por mi, sed bedaŭrinde mi ne malsatis tiun tagon, kaj Fifaliana manĝis ĝin.”
“Ho mia Dio! Kia terura virino. Mia eta Fifaliana, mia knabineto, ŝi, kiu faris nenion malbonan.”
“Pardonu panjo, mi tre maltrankviliĝas, ĉu vi scias?”
“Ne estas via kulpo, ke ŝi mortis. Sed la sola eraro, kiun vi faris, estis fidi vian paĉjon kaj forgesi telefoni al mi, almenaŭ sciigi min.”
“Panjo, pardonu min, mi petas vin. Mi scias, kiom multe vi suferas nun.”
“Kion mi faris por meriti tiun ĉi senfinan doloron? Unue ili deprenis vin de miaj brakoj, kaj elpelis min kun Fifaliana. Tiam Fifaliana denove estis forprenita de mi por esti mortigata. Kaj nun mia vidkapablo estas forprenita. Ho Sinjoro! Tio estas neeltenebla.”
“Iutage ili pagos ĉion, kion ili faris.”
“Certe. Mia venĝo estos terura, vi povas kredi min.”
“Kaj la sango, kiun ili verŝos, turnos sin kontraŭ ilin.”
“Ĉu vi povos montri al mi la tombon de mia filino?”
“Jes, kompreneble.”

La pluvo fine ĉesis; mi devis ĉesigi ilian konversacion por diri al ili, ke venis la tempo por foriri al mia eta kabano.

Ili saltis, kiam mi tusis por purigi mian gorĝon; ŝajne ili tute forgesis min.
La patrino ne volis, ke mi foriru, ĝis ŝi donos al mi vestaĵojn, manĝaĵojn kaj aliajn aĵojn, pri kiuj mi eĉ ne konis la nomon. La vestaĵoj apartenis al Fifaliana; mi hezitis akcepti ilin, sed Fitia konvinkis min. Finfine, tiu ĉi Fifaliana ŝajne estis afabla knabino, kiam ŝi vivis, do ŝi ne havus problemon, kiam mi kaj Valisoa portos ŝiajn vestojn.
La ŝoforo ellasis min ĉe mia domo. La pakaĵoj estis pezaj; mi eĉ ne povis levi la valizon.

Kiel la antaŭan tagon, estis preskaŭ mallume, kiam mi revenis hejmen. La lumo de la kandeleto brilis tra la lignaj muroj de nia domo, kaj mi povis vidi la longajn harojn de panjo en la kuirejo. Tendry kaj Valisoa studis kune en angulo, dum panjo kuiris. Ŝi ŝajnis feliĉa kaj en bonega stato; ŝi eĉ kantis, dum la bongusta manĝo boletis en la poto.
La domo estis bonorda kaj pura. Eĉ niaj polvaj malnovaj fotoj ŝajnis reakiri sian brilon. La fotoj de paĉjo, kiuj kutime montriĝis sur la muroj de ĉiuj ĉambroj, estis forigitaj.
Panjo alkuris al mi tuj kiam mi malfermis la pordon. Ŝi observis min per aspekto tiel dolĉa kiel mielo, kun kontenta rideto sur ŝiaj malgrandaj lipoj.
Ni restis en tiu ama silento dum momento. Mia frato kaj mia fratineto rigardis nin sen diri eĉ unu vorton; ankaŭ ili nur feliĉis.
“Kia belega panjo ŝi estas hodiaŭ, malgraŭ ŝia aĝo kaj malsano”, mi pensis. La sulkoj malaperis de ŝia frunto; restis nur natura beleco.
Pasis kelkaj minutoj; tiam ŝi brakumis min kaj kovris min per kisoj. Mi ne komprenis la kialon de ĉio ĉi, sed mi ne kuraĝis demandi. Mi nur ĝuis la momenton, ĉi tiun momenton tiel agrablan, tiel specialan kaj ĉefe nekutiman.
Cetere ŝajnis, ke panjo venkis sian malsanon; ne plu estis spuro de paleco sur ŝia vizaĝo, eĉ ŝiaj antaŭaj fortoj revenis al ŝi; nur ŝia maldikeco restis evidenta.
Sed kio okazis? Aŭ ĉu nur miraklo falis de la ĉielo?
Mi ne havis la respondon en tiu preciza sekundo. Eble poste, mi pensis al mi.
Kiel bonaj estis tiuj patrinaj brakumoj; ŝiaj karesoj valoris pli ol miliono da mono, kaj ŝiaj vortoj “Mi amas vin” sufiĉis por ke mi travivu jarcentojn.
Estis feliĉo! Fine mi sentis, kio estas vera feliĉo. Mi ne devis morti por koni veran feliĉon; mi nur devis havi mian panjon forte brakumitan. Ankaŭ mi ne bezonis multan monon sub la kuseno; mi nur bezonis meti mian kapon sur la ŝultrojn de panjo, aŭskultante ŝiajn amajn vortojn.
Fitia pravis: ŝi diris al mi hodiaŭ posttagmeze, ke ne valoras havi ĉiujn riĉaĵojn en la mondo, se oni ne estas feliĉa. Pli bone vivi en kabano plena de ĝojo anstataŭ en pompa loĝejo plena de sufero.
Fine, mi rompis la silenton demandante:
“Kio okazas, panjo? Kial vi estas tiel stranga hodiaŭ?”
“Ĉu vi trovas strange, ke via panjo karesas vin?”, ŝi koleris.
“Ne koleru, mia panjo. Fakte mi estas feliĉa, tre feliĉa eĉ. Mi amas vin, panjo.”
“Mi vin ankaŭ, mia filino. Tendry, Valisoa, venu por familia brakumo.”
“Jes, panjo”, ili respondis.
Ni staris delonge.
“Ni sidiĝu”, panjo diris. “Vi certe volas scii, kio okazas.”
“Jes!”, kriis Valisoa.
“Fakte, mi volis festi la naskiĝtagon de ĉiuj tri hodiaŭ. Ni neniam antaŭe havis feston, do…”
“Sed hodiaŭ estas nenies naskiĝtago”, Tendry diris iom surprizita.
Nur mi sciis, ke tio estas la dato de la morto de paĉjo. Do memore al nia paĉjo ŝi faris tion ĉi. Ŝi volis konservi pli bonan memoron pri tiu dato, ĉar eble ŝi laciĝis plori ĉiujare, kiam tiu tago alvenos.
Ŝi pravis; panjo meritis esti feliĉa.
“Mi faris iom da kuko. Tendry, iru preni ĝin; mi havas ĝin sur la tablo de Aina.”

Kuko! Mi memoris la unuan fojon, kiam mi manĝis kukon. Estis kiam mi havis kvin jarojn; estis la unua kaj la lasta fojo. Mi saltis pro ĝojo, kiam panjo diris al mi, ke estas kuko ĉe la domo de la onklino. Mi havis kremon de frunto ĝis mentono, ĉar mi ne sciis kiel manĝi ĝin. Ĉiuj ridis, kiam ili vidis min, sed mi ne zorgis; mi daŭre ĝuis mian kukon.
Valisoa havis la saman esprimon kiel mi, kiam ŝi vidis Tendry alproksimiĝi kun kuko en la mano.
“Sed panjo, ĉu vi sciis baki kukon?”, Valisoa demandis.
“Jes”, respondis panjo. “Mi povas fari multajn aferojn.”
“Dankon, panjo, vi feliĉigas nin”, mi diris.
“Mi naĝas en feliĉo, miaj infanoj. Mi tiom amas vin.”
Estis jam la 23a horo. Ni revenis al niaj ĉambroj. Ĉiuj povis ĝui ĉion, kion panjo faris. Ni nur feliĉis.
Ni eĉ ne havis tempon rigardi la donacojn, kiujn donis al mi la patrino de Fitia. Sed ne urĝis; morgaŭ estis ankoraŭ alia tago.

Tuj kiam mi kuŝiĝis sur la lito, dormo deŝiris min de la mondo. Sed mi konsterniĝis, kiam panjo vokis mian nomon. Mi kuris kvazaŭ freneza al ŝia ĉambro. Je mia surprizo, panjo kuŝis sur la planko. Ŝi spiris terure malbone. Ŝia mano, tremante, provis ekpreni la liton, sed ĝi ne povis. Mi tuj telefonis al mia frato, por ke li helpu min suprenlevi ŝin al ŝia lito. Ni metis dikan kusenon sub ŝian kapon, por ke ŝi iomete spiru. Ŝia vizaĝo, kiu antaŭe brilis, paliĝis kvazaŭ ŝi havus anemion. Ŝi multe tusis. Mi tiom timis.
“Kion vi havas?”, mi demandis.
“Mi kredas, ke venis la tempo, ke mi forlasu tiun ĉi mondon.”
“Kio? Ne parolu ion stultan, panjo”, grumblis Tendry.
“Aŭskultu, miaj infanoj, mi ne havas multan tempon, sed antaŭ ol foriri, mi devas diri al vi ion gravan.”
“Panjo”, mi diris petege, “ne rapidu, ni ankoraŭ bezonas vin.”
“Kara, vi estas jam sufiĉe granda; mi certas, ke vi povos prizorgi vian fraton kaj vian fratineton.”
“Ne, panjo, mi eĉ ne povas trovi laboron; kiel mi povus prizorgi ilin?”
“Vi venos tien; vi estas forta. Memoru preĝi; Dio ĉiam estos tie por subteni vin.”

“Panjo!”, Tendry ploris. “Ni ne povas vivi sen vi, vi scias tion. Kial do vi diras ĉion ĉi?”
“Tendry, ne senkuraĝiĝu; morto estas vojo, kiun ĉiu estaĵo devas alfronti iun tagon aŭ alian. Mia vojaĝo finiĝas tie ĉi, sed vi tri daŭrigos. Penu kune, amu unu la alian. Gardu unu la alian. Nur tion mi volas.”
“Jes, panjo.”
“Promesu al mi, ke vi ne rezignos pri vi mem, kiel ajn.”
Kaj ni promesis al ŝi, kion ajn ŝi volis. Ni faris tion ne ĉar estis necese; ni faris tion, ĉar ni vere estis ligitaj inter ni kaj amis unu la alian.
Noktomeze tre akre ŝi laste spiris. Oni diras, ke post malbona vetero venas bona vetero, sed ĉe ni estis inverse: la bona vetero antaŭis la malbonan.
Nun mi komprenis, kial okazis tiu ĉi subita ŝanĝo. Morto jam estis sur nia sojlo kaj panjo sentis ĝin. Ŝi preparis la domon kaj sin mem por sia foriro.
La naskiĝtaga manĝo estis la lasta manĝo kun ŝi. Kial ŝi ne avertis nin, ĉar ŝi certe sciis profunde, ke ŝi mortos?
En la kabano eĥis krioj de malĝojo. Rivero da larmoj fluis, malsekigante la inertan, malvarman, senvivan korpon de panjo. Nia panjo malaperis, malaperis por ĉiam. Ni neniam revidos ŝin.
Mi devis esti forta; Valisoa kaj Tendry ne povis akcepti facile la okazaĵon.
Mi ne havis elekton; mi estis la plej maljuna kaj mi devis esti forta por ili. Mi glutis mian malĝojon kaj mian suferon; mi tenis ilin en mi.
Ĉar la okuloj de panjo restis malfermitaj, kiam ŝi mortis, mi fermis ilin. Mi prenis ŝiajn ostajn manojn kaj metis ilin laŭ ŝia korpo. La sekvan matenon Tendry foriris por informi la najbarojn.

Dum la entombigo, Fitia kaj ŝia patrino venis. Ilia ĉeesto donis al ni grandan komforton. Ni ne konis ilin sufiĉe bone, sed ili estis kiel familianoj por ni; ili helpis nin finance kaj morale.
La vortoj de la pastro ege tuŝis min. Li diris:
“Aŭskultu, en la vivo estas tempo por ĉio: tempo por ami, tempo por malami; tempo por paroli, tempo por silenti; tempo por ĵeti ŝtonojn, tempo por repreni ilin; tempo por vundi, tempo por kuraci; tempo por konstrui kaj tempo por detrui; tempo por ridi, tempo por plori; tempo por naskiĝi kaj tempo por morti, kaj tempo por funebri. Do estu fortaj. Ni ĉiuj foriros iun tagon.” ◆

Daŭrigota

Propono de la maljuna majstro

Miao Hui

Antaŭ tre longa tempo budhisma majstro vivis en la montaro dezerta kaj profunda. Li estis eminenta kaj erudicia. Sennombraj homoj vizitis lin por peti lian instruon kiam ili renkontis problemojn en sia vivo. Ĉiufoje li donis al ili trafajn proponojn por solvi iliajn problemojn.

Foje, lin vizitis ege trista virino. Ŝi plendis plorante, ke ŝi ne plu povas daŭrigi la vivon kun sia edzo. Ŝia edzo estis mallaborema kaj drinkema. Li tute ne zorgis pri la familio sed ofte adultis kun eksteraj virinoj. Li ne amis ŝin kaj ofte batis ŝin ĝismorte post sia ebriiĝo. Ŝi vere ne plu kapablis toleri la torturon de sia edzo. La majstro demandis: "Kion vi volas fari kontraŭ li?" Ŝi respondis: "Mi jam pretis mortigi lin per veneno."

Aŭdinte tion, la majstro respondis frapante je la tablo: "Brave! Vere li estas mortinda! Tamen vi devas havi pli bonan penson. Ĉiuj bone scias, ke li traktas vin ege terure kaj kruele. Kiel ajn li perdos la vivon, oni certe supozos, ke li mortis pro vi. La juĝistoj faros enketon, certe kaptos kaj ekzekutos vin. Tiel ankaŭ vi ne povos daŭrigi la vivon longe. Se vi tiel agos, lia vivo fariĝos por li des pli suferiga ol morto."

"Eĉ estas pli bona metodo ol mortigo al li por min venĝi?" scivolegis la virino, "Kion mi faru? Bonvolu min instrui!" Ŝi tuj genuiĝis antaŭ la maljuna majstro kaj petegis lin.

"Unue reiru al via hejmo, kaj pretendu vin tre ami lin. Prizorgu lin atenteme pri ĉiuj aferoj, kaj ankaŭ faru ĉion eblan por plaĉi al li. Eĉ se li transversas sian malbonan humoron sur vin, eltenu pacience kaj tolereme. Kiam li vere dronos en amo al vi kaj ne plu povos pasigi tagon sen vi, vi senhezite eksiĝu de li. Tia kora doloro despli torturos lin ol morto."

"Vere trafe!" ekzaltiĝis la virino. Ŝi kulte riverencis al la majstro kaj foriris ĝojplene.

Post tri jaroj, la virino denove vizitis la majstron. Demandite, ŝi senĉese laŭdis sian edzon: "Nun li estas diligenta, zorgema kaj milda. Ni ĝuas familion bonhavan kaj harmonian. Li tre amas min kaj ne plu sekse kontaktas aliajn virinojn, kaj kiam li estas libera, li ĉiam akompanas min por amuzi min."

"Bonege! Nun estas ĝusta tempo por via eksiĝo." La majstro afekte proponis, sed la virino protestis ekster onia supozo: "Ne! Mi ne plu forlasos lin eĉ se vi mortigos min!"

La majstro ridis elkore. ◆

Malgranda Stacidomo

Verkis: *Wang Zhengyue*

Tradukis: *Miao Hui*

Portante subbrake korbon plenan de produktoj el montara regiono, li tenis saketon da juglandoj en la mano kaj proponis siajn kratagojn, juglandojn kaj sekigitajn persimonojn al la pasaĝeroj de vagonara fenestro al alia. Li aĝis nur dek tri jarojn, kaj pro malalteco li devas levi siajn kalkanojn dum komercado kun la pasaĝeroj.

Juna pasaĝero aĉetis de li saketon da kratagoj. Ĵus kiam li aldonis la kratagojn, li rimarkis, ke tiu ĉi junulo portas universitatan emblemon sur la brusto. Li do demandis kun dolĉa rideto: "Ĉu vi estas universitata studento?"

"Jes." Rigardante tiun ĉi knabon kun naive kristalaj okuloj, la junulo opiniis lin aminda, kaj respondis ankaŭ kun rideto.

"Mia frato ankaŭ lernas en universitato de la provinca ĉefurbo. Li lernas pentrarton." Li diris ĝojplene kaj fiere. "Vi studentoj ne estas bonhavaj, do mi ne postulos de vi la pagon." Kun korbo sub sia brako, li ridetante staris tie. La junulo elfenestrigis la buston, rekte etendis brakon kaj svingadis la dujŭanan monbileton en sia mano. Ĝuste kiam ili ambaŭ rifuzadis la monon, malrapide ekmoviĝis la vagonaro. La junulo eksvingis la monon, la monbileto flirte falis sub la kajon kaj flugis ĝis malproksima loko sekvante la vagonaron. La knabo haste alkuris, prenis la monon, kaj staris inter la fervojoj rigardante la forvojaĝantan vagonaron, kvazaŭ iu kolerigus lin.

La stacidomo estis malgranda, kaj la pasantaj malrapidaj vagonaroj haltis ĉi tie nur kelkajn minutojn. Ĝuste por tio li alvenis de sia montvilaĝo malproksima je tri kilometroj.

Estis malvarme tiutage. Kaj neĝetis. Tio ja estis la unua neĝo ĉijare. Alvenis alia vagonaro, sed la fenestroj estis firme fermitaj. Malofte oni malfermis la fenestron, krom nur por elĵeti pomŝelon aŭ elverŝi akvon. Antaŭ ol li iris proksimen, la fenestro jam fermiĝis denove. De antaŭa vagono subiris pasaĝero en tute nova okcidenta kostumo kaj kun leda valizo en la mano. Li estis ununura pasaĝero subirinta el tiu ĉi vagonaro. "Jen urbano." Li tuj proksimiĝis al la pasaĝero.

"Aĉetu manĝaĵon, Kamarado. Tio ja estas tre malkara." Starante antaŭ la pasaĝero, la knabo kun pia mieno etendis saketon da sekigitaj persimonoj.

La pasaĝero subite demetis sian valizon, ekkaptis liajn glacie malvarmajn manetojn kaj krietis, "Fraĉjo!"

Malfermeginte siajn okulojn pro surpriziĝo, la knabo fiksrigardis la urbanon ŝajne iom konatan. Kiam li ekvidis la universitatan emblemon sur lia brusto, li subite rekonis lin. Li sin ĵetis en la sinon de la pasaĝero kaj ekkriis ameme: "Fraĉjo!" Larmoj eltorentis, oni ne sciis, ĉu pro lia ĝojo aŭ surpriziĝo.

Palpante la okcidentan kostumon, li demandis, "Fraĉjo, ĉu viaj kunlernantoj ankoraŭ nomas vin 'Frato Kampulo'?"

Anstataŭ respondi, la pliaĝa frato demandis, "Fraĉjo, kial vi ne lernas, sed alvenas ĉi tien?"

"Panjo malsaniĝis, kapablo mankas al Paĉjo kaj vi bezonas monon. Do panjo ne plu permesis al mi lerni. Ŝi diris, ke sola vi, universitata studento, ja povas sufiĉe honori niajn praavojn."

"Fraĉjo!" Li subite ĉirkaŭprenis sian frateton en la sinon. La frateto levis sian vizaĝon. "Fraĉjo, lastfoje vi skribis por peti monon. Ĝuste tiam panjo malsaniĝis kaj por aĉeti medicinaĵon, mi elspezis ĉiujn dek kelkajn juanojn, kiujn mi enspezis. Fraĉjo, ĉu vi malpacienciĝis pro la atendado?"

La vizaĝo de la pliaĝa frato ekruĝiĝis. La larmoj senĉese sin rulis en liaj okulkavoj. "Fraĉjo, ni iru hejmen--"

Neĝis pli dense. Sur la neĝo ekaperis du linioj da piedsignoj, kiuj etendiĝas ĝis la alia flanko de la monto laŭ la zigzaga vojeto. ◆

Kunkoriĝu ni ĉe maro sub ĉielo

Verkis: *Shu Nan*

E-igo de *Lu Jixin*

Akva gut’, gutas kaj gutas gutas akva gut’,
jen kun sal’, estas fervore larma fal’.
Akva mar’, profunda tamen travidebla ja.
Super klar’, sub blu-ĉiel’ aspirar’.

Ni fandiĝu en mar’, harmonia psalm’,
Teksu revon ni per brakum’ en kristal’!
Ni fandiĝu en mar’, jada ondar’.
Kunkoriĝu ni per brakum’ en kristal’!

Arka lun’, glitas tra peca nubo peca nub’,
lumas nin, sur la vojo por ideal’.
Ronda lun’, jen alta alta sed proksima ja.
En brakum’, ni as familiar’.

Ni fandiĝu en mar’, harmonia psalm’,
Teksu revon ni per brakum’ en kristal’!
Ni fandiĝu en mar’, jada ondar’.
Kunkoriĝu ni per brakum’ en kristal’!

La lumeto

teksto k muziko de *Sub Vivoarbo*
esperantigo de *Lu Jixin (Vadant)*

Nokta long', frida vent',
pri isaj mi pensas en silent'.
Fojofoje perdita kar',
gardatas sed de luma faden'.
Promenis mi tra vaka strat',
jam grundis revo kaj real'.
tamen en tiu nokta gel',
iu sono vokas: ne sinkiĝi sen hel'!
Vi as tiu lumet' al koro de mi,
kaj naskas novan esperon pli.
kvankam gutas larmid',
pardonemas jam mi kun rid'.
El vi: Ne timu, haltos la vent'!
kaj post doloro venos amsent'!
Revivigo ne el ali',
sed el koro brakumata ja de vi.
Vi as lumet', pelas na senesper',
gvidas min iri trans na malhel'.
Dum fariĝus mond', sen son' sen hel',
ankoraŭ al kor' lumas via sincer'.
Kie estas ja vi,
nokto fariĝas for'
Kantante mi trans na angor',
de larmar' iras al aŭror'.

La graveco de la vojaĝo

— Etienne Luheka

La vojaĝo estas pli ol paŝi sur
malproksimajn vojojn
aŭ meti piedon sur nekonatajn terojn.
Ĝi estas silenta instruisto,
kiu nian kreadon instruas
kaj nin per bato transformas.

Ĝi malfermas la okulojn,
lumigas la menson
kaj faligas la murojn, kiujn timo konstruis.
Ĉiu renkontiĝo, ĉiu rideto,
ĉiu fremda voĉo estas spegulo,
kie ni spegulas nian veran animon.

La vojaĝo instruas paciencon, humilecon,
kaj kuraĝon eliri el la komforto de kutimoj.
Ĝi montras, ke la vera beleco
ne troviĝas nur en pejzaĝo,
sed en la momento,
en la gesto,
en la koro, kiun ni tuŝas.

Tiu, kiu vere vojaĝas,
neniam revenas la sama.
Li revenas pli riĉa,
ne per oro aŭ juveloj,
sed per memoroj, lecionoj
kaj nova forto, preta alfronti la vivon.

Do, la vojaĝo estas esenca.
Ĝi estas profunda,
Ĝi estas interna,
Ĝi estas liberiga.

Haŭlista Laborkanto de Jangzio

Verkis: *He Weijia*

Trad. *Batalanto*

HO-HA! HO-HA! HO-HA HO!
HE-ZA! HE-ZA! HE-ZA HA!
Tra ondoj sovaĝaj, tra rifoj minacantaj
Kuraĝo en koro ne konas la mort'!
En turnaĵ' akva, torent' tolaĵ-simila
Ŝipo sagopaf' tranĉas ondegaron!
Dancante venton, maron celante
Unu anim' stiras la senliman vojon!

[ĤORO]
JO-HE! JO-HE HEJ!
JO-HO! JO-HO HO!

Ondkant' senhalta, kanto senĉesa
Ĝojaj eĥoj flirtas en nubblank'!
Gorĝoj altaj, pejzaĝ' eterna
Boato fluganta kiel ventobird'!

[FINO]
JO-MO-JO-O...
HEJ! HEJ! HEJ!

Amindumo inter Geamantoj

(VIRINO) Januare – prunflor’ antaŭ la dom’
(VIRO) Fratinet’ stel-simila ĉe la sojlo!
(VIRINO) Rigardu la akvon, ne mian jupon!
(VIRO) Via florvatita jako kaptis mian animon!
(VIRINO) Drakfest’ – faden’ longa ventodancanta
(VIRO) Via drako sur mian boat’ falis
(VIRINO) Redonu ĝin, frato!
(VIRO) Mi scias vian printempan koron!
(VIRINO) Ĉe river’ lavanta
(VIRO) Ruĝa korsaĵo al mi flosis
(VIRINO) Kiam redonos?
(VIRO) Ĝi kronos nian geedzan boaton!
(VIRINO) Aŭtune – prujno sur kampo
(VIRO) Ĉe via sojlo ripozas mi
(VIRINO) Envenu, varman teon trinku!
(VIRO) Vi ne dormos ĉi-nokte, mi scias…
(VIRINO) Decembre – jarpaŭzo
(VIRO) Post akvobatal’ mi revenas
(VIRINO) Kurten’ malsupre, lamp’ ekbrilas
(VIRO) Pri venonta jaro ni parolos…

Verkis: *He Weijia*

Trad. *Batalanto*

Flor’ Unika, Freŝe Freŝe Brilas

Verkis: *He Weijia* Trad. *Batalanto*

(VIRO)
Flor’ unika, freŝe freŝe brilas
Sur roko alta en nebulo
Kor’ deziras, sed timas grimpi
Ĉar krutaj deklivoj min timigas!

(VIRINO)
Flor’ unika, freŝe freŝe brilas
Ĉe monta krono senkompana
Se kor’ kuraĝas, nenio haltas
Krut’ ne timindas – grimpu sen tim’!

(VIRO)
Se la floro klinus sin al mi
Mi tra danĝeraj vojoj irus
Diru, kiu koron varmigis?
Kiu fajron en vi ekbruligis?

(VIRINO)
Pino verda, rekte rekte staras
Ventego neniam ĝin klinos
Tigron kaptas, falkon trafas
Tia heroo – en mia koro brulas!

(VIRO)
Ho Aŝima, flama animo!
Vi estas mia kora flamo!
Nokte steloj milionbrilaj
Sed la plej luma – mi elektos!

(VIRINO)
Printempe floroj kovras montojn
Mi elektas la plej ruĝbrilan
Kamelio fajre flamanta
Vi estas mia flor-elektita!

(KUNE)
Inter ĉiuj Sani-fraŭlinoj
Nur vin mi amas – sen limoj!
Nur vin mi amas – sen limoj!



Birdo kaj mi

Gajo

Frumatene,
Mi malfermis la fenestron,
Alta arbo staras ekstere,
Birdeto sur la pintbranĉeto
kantas kaj ĉirkaŭrigardas.

al ĝi mi fajfetas intime kaj
alvokas per alloga fingro.
Sed ĝi iom rigardas min
kaj sin pafis, lasinte al mi
nur la arbon en vaka aero!

Fakte mi multe revas
ke ĝi alflugu al mi kaj mi
karesu al ĝi la kapon
amike per miaj fingroj
Kiel mian kateton!

Mi volontus doni panerojn
al ĝi eĉ ĉiutage regule!
Bedaŭrinde inter ni
mankas fido kaj koniĝo!

Ho ve, mi forgesis ke,
bezonas ĝi nur liberecon,
ne kareson nek nutraĵojn!

Finfine mi tion komprenas
post enpensiĝo starante
sola ĉe la fenestro.

Ho, nur libereco___
for ĉio alia!



Bovpaŝtisto kaj Teksistino

Arbsemo

Iam vivis knabo nomata Bovpaŝtisto. Liaj gepatroj mortis frue, kaj li devis vivi kun sia frato kaj bofratino. Nu, tiu bofratino! Ŝi ĉiam grumblis: "Vi nur manĝas sen labori!" Fine ŝi forpelis lin, donante nur maljunan bovon.

Do Bovpaŝtisto kaj la maljuna bovo ekloĝis en kaduka kabano ĉe montpiedo. Ĉiutage, antaŭ ol la suno leviĝis, li jam kondukis la bovon al la herbejo.

Iun nokton - jen surprizo! - la bovo subite ekparolis: "Atentu, morgaŭ okazos io mirinda! Sep feinoj venos bani sin en la lageto malantaŭ la monto. Prenu la rozkoloran veston - ties posedantino fariĝos via edzino."

Bovpaŝtisto ne povis kredi siajn orelojn, sed li faris kiel dirite. Frumatene li kaŝiĝis kaj efektive vidis sep feinojn descendi. Dum ili banis sin, li ŝtele forprenis la rozkoloran veston.

"Ve! Terido!" ekkriis la feinoj. Ses el ili rapide vestiĝis kaj forflugis. Sed la plej juna - la bela Teksistino - restis senveste kaj ekploris.

“Ne ploru,” diris Bovpaŝtisto ruĝiĝante. "Mi estas Bovpaŝtisto. Ĉu vi volas... edziniĝi al mi?"

Ŝi rigardis la honestan vizaĝon de la junulo kaj fine kapjesis. Ili geedziĝis sen granda ceremonio - nur kun floroj kaj la bovo kiel atestanto.

Post la nupto, Bovpaŝtisto kulturis agron kaj Teksistino teksis. Jaron poste ili havis paron da amindaj gefiloj. Ili feliĉe vivis kune.

Iun tagon la maljuna bovo diris kun larmoj: "Mi baldaŭ mortos. Konservu mian haŭton - ĝi helpos vin en danĝero." Kaj ĝi fermis la okulojn por ĉiam.

Baldaŭ poste, la Ĉiela Reĝpatrino malkovris ke Teksistino vivas sur la tero. Kun granda kolero, la Ĉiela Reĝpatrino sendis la ĉielan armeon por kapti Teksistinon reen al la ĉiela palaco.

Tiam Bovpaŝtisto rememoris la vortojn de la bovo! Li surmetis la bovhaŭton sur sin, metis la infanojn en korbojn kaj - Ŭos—! - ili ekflugis!

Kiam ili preskaŭ atingis Teksistinon, ZAS! - la Ĉiela Reĝpatrino desegnis larĝan riveron per sia pinglo inter la geedzoj. Jen kiel naskiĝis la Laktovojo.

Nun, ĉiujare en la sepa tago de la sepa monato laŭ la ĉina luna kalendaro, ĉiuj pigoj en la mondo kolektiĝas kaj starigas ponton por la rendevuiĝo de Bovpaŝtisto kaj Teksistino. Kaj se vi aŭskultas tre atente tiun nokton, eble vi aŭdos ilian dolĉan flustradon...

Kaj jen — vi povas vidi du brilajn stelojn ĉe la du bordoj de la Laktovojo — la stelo Bovpaŝtisto kun siaj du infanoj, kaj la stelo Teksistino. Ili avidas la ĉiujaran revidiĝon. ◆

Al la lumo tra bataloj

Kelly Muteke

Mi forvidas la lumon,
Sole ĉe mia angulo,
Mi perdas batalojn.
Fore, estas la espero.
Je la rando alvenas la fino,
de mia postvivo.
Ĉu havos mi bonan estonton?
Malpli da rajtoj,
multe da timo.
Kial tiu socia malestimo?
Antaŭ mi ĉesis la vojo,

Malantaŭ mi estas malĝojo.
Oni diras, ke la vivo estas bela.
Sed tiu beleco transformiĝis.
Tiom da konfliktoj,
Tiom da konsekvencoj,

Malpli da kompreno,
Multe da lukto.
Hodiaŭ mi komprenas, ke
ĉiu fiasko estas leciono,
Ĉiu venko estas kuraĝigo.

Mi komprenas, ke
tiel longe, kiel ni spiras,
Nenio estas kaduke

Do mi devas strebi,
Por la bona estonto
de miaj proksimuloj,
Por miaj fuŝitaj revoj,
Kaj fine por la interna trankvilo

Decembro, la lasta spiro

Jeroubbesheth Banyanga

Decembro venas, kviete, trankvile,
Kun sia malvarmo kaj pensoj milde.
La tagoj mallongiĝas, la noktoj longas,
Kaj en la koroj, la paco resonas.
La stratoj brilas per miloj da lumo,
La voĉoj moliĝas, la aero sen fumo.
Oni pensas pri la jaro pasinta,
Ĉiu promeso, ĉiu revo forglitinta.
La vento flustras memorojn forajn,
Kaj ligna fajro varmigas horojn.
Decembro instruas, sen hasto,
La valoron de tempo, la ĝojon en ĝasto.
Estas monato de bilancoj kaj espero,
Kiam oni pardonas kun sincera fervoro.
Ĉapitro fina antaŭ la komenco,
Monato de adiaŭo... kaj nova silento.

En Profunda Nokto, la Paŝoj de Flegistino

Orpaco

Viaj paŝoj estas tre, tre delikataj.

Vi, el mia sonĝo eniras en ŝian sonĝon, kiel blovo da lanta nokta venteto, kiu silente trapasas lotus-lageton sub la luno; kiel kvieta rivereto, kiu fluetas tra ĉiu lito por malsanuloj.

Kolektante kelke da ĝemoj por parolaĵoj en sonĝo, helpe de l' stellumo brilanta mi surfadenetigas tenerecon por fari unu kristalsimilan kolieron, kiun mi surmetas sur ŝian gracian bruston.

Kiom da belaj rememoroj estas en profunda nokto ! Al pacientoj ŝi faras injekton tre milde, senlace alportas boligitajn akvojn kaj parolas treege dolĉe..... La sonĝo estas tiel bela kiel poezio !

Pacienta vundo resaniĝas sub nokta konsolo kaj la malsandoloro dormas trankvile en nokta sino.

Tiu poplo ekster la fenestro ludas kun profunda sento nokturon de la steloj kaj la luno.

Nokto, estas tiel kvieta, kvieta !... ◆

Momenteto

Luo Shuigen

Daŭrigante la enhavon de numero 006

La Unua Mezlernejo de Hangĝoŭ en Ĝeĝjanga Provinco okupas areon de ĉirkaŭ 0,40 kvadrataj kilometroj, kio estas proksimume samgranda kiel la teritorio de Vatikano, la eŭropa mikronacio. La konstruareo estas ĉirkaŭ 41 874 kvadrataj metroj. Enirante la ĉefpordon, memoru, ke maldekstre troviĝas sufiĉe granda sportejo, kiun neniu elementa lernejo aŭ ordinara mezlernejo povas kompari; dekstre estas la scienca muzeo, kie studentoj faras siajn eksperimentojn, kaj en la muzeo troviĝas altmagnifaj mikroskopoj. Pli antaŭen estas tri instruadaj konstruaĵoj, nomitaj unua, dua kaj tria eniro. Memoru, ke la unua eniro estas la klasĉambroj kaj instruistaj oficejoj por la supera mezlernejo, la dua kaj tria eniroj estas klasĉambroj por la malsupera mezlernejo, la kvara ĝis sesa eniroj estas studentaj dormejoj, la sepa eniro kaj postaj estas instruistaj dormejoj, kaj plej malantaŭe estas la lerneja farmo, kiu tuŝas la Sportejan Vojon malantaŭ la farma muro. Okcidente de la instruadaj konstruaĵoj estas gimnastejo, kaj oriente estas manĝejo. Studentoj, kiuj loĝas en la lernejo kaj tiuj kun pli bonaj financaj kondiĉoj, kutime aĉetas manĝobilojn por manĝi en la manĝejo, dum studentoj kun pli malfacilaj financaj kondiĉoj kutime alportas rizon de hejmo por ke la manĝejo unuforme preparu vaporumitan rizonon, kaj ili ankaŭ alportas legomojn de hejmo. Plej ofte mi alportis salitajn legomojn, kaj foje eĉ ne havis salitajn legomojn, do aĉetis unu frititan paston sur la vojo al lernejo matene. Tiutempe fritita pasto kostis du cendojn, kaj biskvito kostis tri cendojn, la prezoj estis tre malaltaj. Tagmeze mi trempis la frititan paston en sojsaŭcon, kaj la gusto estis sufiĉe bona. Kelkaj samklasanoj estis infanoj de militistoj kaj oficistoj, kun tre strikta familia edukado. Iliaj familioj mendis manĝobilojn por ili ĉiumonate kaj kutime ne donis al ili krommonon aŭ nur tre malmultan. Tiuj samklasanoj foje interŝanĝis manĝobilojn kun mi kontraŭ mono kun rabato. La akiritajn manĝobilojn mi uzis tre ŝpareme, ĉiufoje elspezante nur du cendojn. Kvankam temis pri vegetara manĝo, la kvanto estis tre granda, multe pli bona ol fritita pasto por du cendoj.

Tiutempe en la Unua Mezlernejo de Hangĝoŭ ni en la unua jaro havis ok klasojn. Klasoj 1 ĝis 6 estis anglalingvaj klasoj, kaj klasoj 7 kaj 8 estis ruslingvaj. En la elementa lernejo mi lernis rusan dum du semestroj, kaj eble pro tio mi estis asignita al rusa klaso en la Unua Mezlernejo de Hangĝoŭ. La rusan instruis instruistino Sun Aiqing, kiu estis varma, vivema, malfermita kaj ĝentila, iam estis virina soldato kaj ĵus transiris el la armeo. Ŝia karaktero kaj aspekto tre similas al rusa knabino, kaj oni diras, ke ŝi faris eksterlandan interŝanĝlaboron en la armeo. En la unua tago de la lernjaro, mi estis nomumita matematika klasreprezentanto de instruisto Jiang Huandi. Instruisto Jiang havis rapidan penson kaj rektan karakteron, kaj ĉiam povis simpligi kompleksajn matematikajn problemojn en facile kompreneblajn. La ĉinan instruis instruisto Xu Yi, kiu ankaŭ estis nia klasĉefo. Instruisto Xu parolis same dum lecionoj kaj en ĉiutaga vivo, malrapide kaj pace, ĉiam kun rideto sur la vizaĝo. Sed liaj vortoj estis tre filozofiaj kaj amikaj, kvazaŭ li povus scii kion vi pensas. De la eniro ĝis la diplomiĝo, mi neniam vidis instruiston Xu kun malgaja vizaĝo aŭ kolera. Mi kaj instruisto Jiang estis bonaj ŝakamikoj, kaj kun instruisto Xu ni estis bonaj korbopilkaj amikoj. En nia klaso estis entute 49 samklasanoj.

Vidu la sekvan aldonan tabelon:

Listo de samklasanoj de Klaso 7, Unua Jaro, 1968-a diplomiĝinta grupo de Hangĝoŭ Unua Mezlernejo: Klasĉefo kaj ĉina instruisto: Xu Yi. Matematika instruisto: Jiang Huandi. Rusa instruisto: Sun Aiqing. Samklasanoj: He Guifa, Cao Fugen, Wang Furong, Chen Lihua, Luo Shuigen, Qiu Meijing, Cheng Shuizhen, Yuan Jingshan, Yao Huimin, Lou Kangmei, Tian Zhaoying, Dong Huizhu, Yan Ronghua, Qin Weili, Tong Lixin, Yu Qian, Zhang Huiming, Wang Shengxian, He Kaili, Li Zhijuan, Wang Yiqun, Wan Zhiwei, Shi Peiying, Ni Dingzhen, Zhao Huiwen, Huang Minghua, Chen Yongyong, Huang Jing, Cai Lingna, Chen Lingjuan, Shen Ronghe, Shi Zhenyang, Zheng Jianning, Zhou Jian, Sun Lihui, Wang Ruizhang, Zou Zhengyuan, Ni Weimin, Lai Zipeng, Wang Tuer, Lu Jun, Qian Wenjuan, Shao Yulong, Zhao Xiaoxing, Wang Xiaoying, (Wang Zhimin), (Xu Mingli), (Han Zhixiang), (Xia Luozhao). Entute 49. Noto: Enirtempo: septembro 1965, Diplomiĝotempo: julio 1968.

Ekde kiam mi ekstudis en Hangĝoŭa Unua Mezlernejo, sendepende de la sezono - ĉu somere ĉu vintre - mi estis preskaŭ ĉiam la unua alvenanto al la lernejo. Kelkfoje, kiam la tago ankoraŭ ne tagiĝis kaj la lerneja pordo estis fermita, mi ripetadis miajn lecionojn sub stratlumo, memorigante formulojn. La pordisto, rimarkinte mian fruan alvenon, kutimis frue leviĝi por malfermi flankpordon kaj permesi al mi eniri tra la pordistejo. Tiutempe mi tute ne interesigis pri eksteraj aferoj, plenokupite nur per "sanktaj" libroj. Tago post tago, kvankam monotona, mia lernada vivo fluis trankvile ĝis unu tago en 1966, kiam subite ĉi tiu trankvileco abrupte ĉesis.

Estis iom malvarma mateno. Alveninte al la lernejo, mi subite malkovris ke dum la nonto la muroj de la lerneja koridoro estis plenkovritaj per grandformaj afiŝoj, kies enhavo direktiĝis ĉefe kontraŭ la lerneja estraro kaj kelkaj instruistoj. Mi tute konfuziĝis, ne komprenante kio okazas. La vorto plej ofte aperanta en tiuj afiŝoj estis "Kultura Revolucio". Mi ne sciis kion ĝi signifas - kiu "revoluciis", kies "sorton", kaj kiel. Ĉu ne sufiĉis ke la ĉina popolo jam renversis la "tri grandajn montojn" (imperiismon, feŭdismon kaj burĝaron)? Kontraŭ kiu oni nun revolucion? Mi estis naiva, sen antaŭsento kaj eĉ postsento. La "Kultura Revolucio" disvastiĝis rapidege kiel inundo, baldaŭ atingante la tutan socion kaj fine trafante mian familion.

Iamaj naivaj kaj puraj samklasanoj subdividiĝis laŭ familia origino en "ruĝajn kvin kategoriojn" kaj "nigrajn kvin kategoriojn". Sed ĉi tiu klasifiko ne estis konstanta: gepatroj de "ruĝuloj" povis subite fariĝi kritikataj, igante iliajn infanojn "nigrulojn", dum "nigrulaj" gepatroj povis ribeli sukcese kaj akiri potencon, igante siajn infanojn "ruĝulojn". Mia patro estis klasifikita kiel sendependa laboristo, nek "ruĝa" nek "nigra". Pro mia nekompreno kaj malintereso pri la "Kultura Revolucio", mia ĉefa ĉagreno estis la ĉiam pli malregula instruado, ĝis fine tute ĉesis - oni diris ke ni "ĉesu instruadon por revolucia agado". Kvankam ne plu estis lecionoj, mi ne povis forlasi mian lernejon kaj ĉiutage vizitis ĝin antaŭ ol reiri hejmen. Foje, rigardante noktan ĉielon, mi suspiris, sentante min perdita sen ia vidaĵo al estonteco.

Kiel diras la proverbo, "al riĉulo eĉ bovino naskas bovidon". Miaj plej grandaj timoj realiĝis. Unu nokton, terura frapado subite eksonis ĉe nia pordo, kvazaŭ la tuta domo tremus. Mi vekiĝis kaj vidis miajn gepatrojn rigardantajn unu la alian kun timo, murmurente "ili venis". Malferminte la pordon, amaso de Ruĝgardistoj enfluis, gvidataj de mia iama samklasano Wei, kromnomita "Kak-ulo" - ĉi tiun malaltan kromnomon li ricevis post kiam en la dua lernojaro li senvole fekis en siajn vestojn dum leciono, plenigante la klasĉambron per akra odoro. La instruisto devis forsendi lin hejmen. Wei estis malbona lernanto kaj post bazlernejo eniris en Genshan Mezlernejon, kie dum la "Kultura Revolucio" li aliĝis al la "Flugantaj Tigroj" grupo. Poste li laboris en fabriko, sed post la revolucio estis maldungita pro ŝtelado kaj ŝtelrigardado al sinbanantaj virinoj. Poste li profitis de la reformpolitiko por establi malgrandan kompanion kaj riĉiĝis per impostofraŭdo.

Mia avo iam posedis malgrandan tinkturejon kaj havis metilernanton. Ĉi tiu lernanto, tre dolĉparola kaj ĉiam nomanta lin "majstro", estis tre ŝatata de mia avo. Dum la "Kultura Revolucio", ĉi tiu iama lernanto, pro sia "pura klasorigino" kaj sukcesa ribelo, fariĝis estro de mia ava laborejo kaj unue

gvidis grupojn da studentaj Ruĝgardistoj por traserĉi la domon de mia avo. Mia patrino, kiel plej aĝa filino, tiutage estis ĉe sia patro kaj defendis lin per kelkaj vortoj - tiel la problemo atingis nian familion samnokte. En nia domo estis nur malnovaj tabloj kaj benkoj - ni dormis sur tabuloj metitaj inter benkoj.

Trovinte nenion valoran, Wei kaj la Ruĝgardistoj devigis mian patrinon stari sur benko ĉe la pordo kaj kritikadis ŝin ĝis preskaŭ tagiĝo. Nature timema, mi kaŝiĝis dum la kritikado, sed mia dua frato Aĵao, tiam nur 12-jaraĝa, kuraĝe restis apude, plorante kaj disputante kun la Ruĝgardistoj. Lia obstineco fine lacigis ilin, kiuj rezignis pri li. Mia patrino, nek venkita de financaj malfacilaĵoj nek subpremita de la politika premo, restis la plej granda patrino en la mondo. Ŝi poste konfesis al mi ke sen ni, ŝiaj ok infanoj, ŝi jam plurfoje intencus morti.

La unua instruisto, kiu sinmortigis en Hangzhou Unua Mezlernejo, estis la tiama direktoro de studenta disciplino. Tiu disciplinestro estis iom maldikkorpa, kutime severa kaj malmulte ridema. Kiam li trovis studentojn bruantaj en la koridoro, li tuj ilin haltigis kaj kritikis. Dum la "Kultura Revolucio", tiuj samaj studentoj, kiuj ofte bruis en la lerneja koridoro, senĉese persekutis la disciplinestron - ili devigis lin porti altan paperan ĉapon, tondis lian hararon en hontiga "jinyang"-stilo, kaj paradis lin tra la stratoj. Fine lia personeco tute disfalis, kaj li ne povis plu elteni. Li saltis kapon antaŭen en puton en la lernejo, kaj lia kadavro estis trovita nur post 3-4 tagoj.

La dua mortinto en la lernejo estis terposedantino. Komence de la "Kultura Revolucio", certaj Ruĝgardistoj speciale kaptis maljunulojn en kamparaj vestoj ĉe la trajna stacio, kredante ke ili estis terposedantoj kiuj fuĝis aŭ rezistis kontraŭ la revolucio en la kamparo. Ili kaptis tiujn maljunulojn kaj gardis ilin sur la atletika kampo de Hangzhou Unua Mezlernejo. Meze de frua somero, la vetero estis varmega. Tiuj maljunaj terposedantoj, sen manĝaĵo nek trinkaĵo, simple ne povis elteni. Unu terposedantino silente falis sur la teron kaj ne reviviĝis. Eble ŝi sentis, ke morto estis liberiĝo.

La "Kultura Revolucio" kiel inundo disvastiĝis de lernejoj al la tuta socio, al fabrikoj, al ĉiu angulo de vivo. De "ĉesigi lernadon por fari revolucion" al "ĉesigi laboron por fari revolucion" - kiam fabrikoj haltis, kion la homoj manĝus? Kion ili vestus? Kion ili uzus? Tiuj, kiuj esprimis dubojn aŭ malkonsentojn pri la "Kultura Revolucio", estis persekutataj kaj atakitaj de la "ribeluloj". Mia patro, kiu ne aprobis la "Kulturan Revolucion" kaj havis reziston kontraŭ ĝi, estis persekutata de la "ribeluloj" en sia laborejo sub falsaj akuzoj. Lia klasifiko ŝanĝiĝis de "sendependa laboristo" al "posedanto", kaj eĉ tio ne sufiĉis al la "ribeluloj" - ili aldonis la vorton "reaga" antaŭ "posedanto" por pli bone kontentigi sian koleron. Labori en la fabriko fariĝis nur ŝajna laboro sub observo, kie li devis fari la plej malfacilajn kaj lacigajn taskojn. Sed dum tiuj tagoj, kiom ajn pezaj estis la ekonomia premo kaj sufoka la politika premo, miaj gepatroj silente portis la ŝarĝon, neniam lasante nin, iliajn infanojn, dividi eĉ iomete de ĝi. ◆ *Daŭrigota*

La Ĝenoj de Kabi (1)

Viktoria

Kiam venas la ferio, nia hejmo tute fariĝas regno de katoj.
Nia filo alportas du, nia filino kolektas unu virseksan sovagan kateton el la universitata kampuso, krom niaj du hejmaj "indigenaj" katinoj. Kun kvin katoj kunvenantaj sub unu tegmento, la kutime trankvila hejmo instante transformiĝas en senĉesan parkuran spektaklon. Lanecaj ombroj fulme svingiĝas antaŭ viaj okuloj – suproj de ŝrankoj, fenestrobretoj, ĉie estas ilia batalejo, sen iu momento da trankvilo.

La katoj havas diversajn personecojn. La du "princinoj" en la hejmo estas belaj, altmalvarmaj kaj vivas laŭ sia propra maniero. Al la tri "invititaj" virkatoj, ili tenas elegantan malestimon, nek humiligante sin nek fierante. Male, la virkatoj, pelataj de sia instinkto, ne povante bridi sian internan ekscitiĝon, komencas fervoran kaj mallertan persekutadon al la virinaj katoj.

Inter ĉiuj ĉi-tiuj bruado kaj agiteco, unu virkato aparte elstaras. Li nomiĝas Kabi, kiun venigis mia filo - estas brita nigra oraĉila shorthair-kato. Li havas paron da rondegaj kaj grandaj okuloj, kaj ties rigardo - jes, povas esti priskribita nur per "ĝentila". Eble estas iom tro uzi ĉi tiun vorton por priskribi virkaton, sed Kabi ja estas tia. Kiam li rigardas homojn, liaj okuloj estas malseketaj kaj puraj kiel fonto, eĉ lia voko estas dolĉa kaj afektema, kun tuŝo de naiva ĉarmo. Plej ofte li ŝatas kruci siajn antaŭajn piedojn elegante, kiel sinretenema eta ĝentlemano, kaj ĉi tiu pozo igas lin ŝajni eĉ pli ĉarma.

Tamen, ĝuste ĉi tiu kato ŝajne sen "aŭtoriteta impono" lastatempe spertis "kreskodolorojn". La pariĝa sezono alvenis, kaj la testosterono igis liajn vangojn iomete ŝveli, aldonante iom da necesa majesteco. Li kuraĝiĝis provi alproksimiĝi al la du altmalvarmaj "princinoj", sed ricevis nur senkompatajn "katbatojn" kaj siblajn sputojn. Kabi ne rezignis, ripete provis, sed ĉiu fojo estis decideme forpuŝita kaj forpelita.

Ne povante alproksimiĝi al la laŭdataj inoj, Kabi iĝis iom melankolia. Post la taga bruado, nokte li ĉiam ŝatis resti sola sur la balkono. Sub la lunlumo, li foje levis la kapon al la stelplena ĉielo, kvazaŭ demandante iun; foje li milde moviĝis inter

la potaj floroj kaj herboj, kvazaŭ forpelante sian neelteneblan energion; foje longe li rigardadis la straton sub la stratlumo, kie noktaj pasantoj rapidis, kaj foje aŭdiĝis unu aŭ du sovaĝaj krioj de feral katoj, venantaj de malproksime. Eble, en tiuj fremdaj alvokoj, Kabi povas flari eton de la amo kiun li avidas sed ne povas atingi?

Ĉi tiu melankolio kaj avido tage transformiĝas en ribelan konduton. Li komencis marki ĉie en la domo, kaj ŝajne ĉiu angulo de ĉiu ĉambro restigis spurojn de lia intense "individa" odoro. En la aero disvastiĝas ia "ĉarma" aromaĵo, kiu igas onin suspiri kaj skui la kapon.

"Kion fari? Kion fari?" Ni ĉiuj kuntiris la brovojn. Ĉu riproĉi ĝin? Ĉu krii al ĝi? Eĉ ekvolis doni al ĝi mildan baton por instrui lecionon? Sed ĉiun fojon, Kabi tiam kaŭriĝis kaj fiksrigardis vin per siaj nekredeble puraj, senmakulaj okuloj, kun esprimo tiom ĉarma kaj senkulpa. Nia ĵus leviĝinta kolero, en unu momento, kvazaŭ pikitaj per pinglo, eliĝis kaj transformiĝis en fadenetojn de rezigno kaj plenan indulgon.



Ni komencis provi kompreni lin – kompreni lian fiziologian suferon, kompreni lian plej purajn sopiron kaj deziron pri amo!

Fine, en vespero denove envolvita de la "katurina" odoro, ni kunvokis familia kunveno. La temo estis klara: kiel helpi Kabion. La decido estis farita: la tuta familio ekagu por serĉi amon por Kabi! ◆

Rezultoj de la 15-a literatura konkurso

je 14a de Decembro 2025 en eldonaĵoj, literaturo

Protokolo el kunsido de la konkursa komisiono konsistanta el:

Beata Zadykowicz – prezidanto, reprezentanto de Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko,
Magdalena Sołowiej – reprezentanto de Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko,
Tomasz Chmielik – membro, reprezentanto de Bjalistoka Esperanto-Societo,
Pavol Petrik – członek, membro, reprezentanto de Bjalistoka Esperanto-Societo
fondita por taksi verkojn alsenditajn al la literatura konkurso „Esperanto ligas homojn” – la 15-a eldono sub la titolo „Perditaj en la reto”.

La komisiono konstatis jenon:

Ĝis la limdato difinita en la konkursa regularo, la 31-a de aŭgusto 2025, venis 37 verkoj, kiuj respondis al la laŭregularaj postuloj.

Jen la verkoj en la pola kategorio:

Tadeusz Charmuszko: W matni
Anna Ciesielska Gadré: Zagubieni w sieci
Kaja Fujawa: Fotografia
Aneta Gizińska-Hwozdyk (Araneus): Siedzi w sieci
Karolina Karczewska: Zagubieni w sieci, czyli apel AI do białkowców
Jan Czesław Kozakowski: Zagubieni w sieci
Andrzej Liczmonik: Poranek w sieci
Henryk Liszkiewicz: Koziołkiewicz w sieci
Daria Marzec: Hydeware 2.0
Janusz Nitkiewicz: Czy mnie słyszysz
Patrycja Paliczka: Może w końcu ktoś Cię doceni, skoro sama tego nie potrafisz!
Aleksandra Paprota: Połączeni siecią
Agata Pieniążek: Akwarysta
Wacław Rekowski: Powrót
Iga Rzeszutek: W labiryncie
Arkadiusz Stosur: Miejsce na ziemi
Piotr Szewczyk: Niech zostanie jak jest
Elżbieta Toepler: Obcy
Jerzy Trzciński: Oddaj mi Magdę
Grażyna Kulesza-Szypulska: Babcia w sieci
Oliwia Zarzycka: Sam

En la esperanta kategorio:

Ivan Budinov: Pensoj pri teknologio, homoj kaj aliaj aferoj
Rumiana Budinova: Mi en nuntempeco
Steven Cybulski: Malmultvorteco
Thierry Grandjean (Tjero Johanego): Joĉjo: novelo
Ognian Kabranov: Fejsbuko kaj la maljuneco
Karolina Karczewska: Perditaj en la reto – alvoko de AI…
Janusz Nitkiewicz: Ĉu vi aŭdas min?
Jorge Rafael Nogueras: Sango kaj honoro
Jorge Rafael Nogueras: Neresponditaj retpoŝtmesaĝoj
Jorge Rafael Nogueras: Serĉatoj
Miklós Cseszneky: La reto ne forviŝas
Arnošt Fischer Oldřich: Kiel mi perdis mian feliĉon
Stanisław Polanowski: Dronejo
Rekowski Wacław: Reveno
Arkadiusz Stosur: Loko sur la tero
Viviana Stanislawa (Piccinini): Inter la fadenoj de Biebrza
La komisiono premiis jenajn verkojn en la pola kategorio:

1-2 premio – Grażyna Kulesza-Szypulska: Babcia w sieci
2-a (egala) premio – Janusz Nitkiewicz: Czy mnie słyszysz?
2-a (egala) premio – Patrycja Paliczka: Może w końcu ktoś Cię doceni, skoro sama tego nie potrafisz!
3-a premio – Daria Marzec: Hydeware 2.0
Oni distingis:
Iga Rzeszutek: W labiryncie

Oni premiis jenajn verkojn en Esperanto:

1-a premio – Miklós Cseszneky: La reto ne forviŝas
2-a premio – Ognian Kabranov: Fejsbuko kaj la maljunulo
3-a premio– Arkadiusz Stosur: Loko sur la tero

Oni distingis:

Steven Cybulski: Malmultvorteco
Janusz Nitkiewicz: Ĉu vi aŭdas min?

Beata Zadykowicz, Tomasz Chmielik,
Magdalena Sołowiej, Pavol Petrik

Kadre de la 26-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj la 12-an de decembro 2025 okazis prezento de la rezultoj, enmanigo de la premioj kaj anonco de la temo de la venontjara konkurso: Frostigitaj en la tempo. ◆

Rakonto de Georgo

John Huang

-La “Revenĝo” de Georgo...Aŭ Io Tia

Taglibro de Pipi

Pipi

14a, novembro, 2025

Kiam mi hieraŭ vidis la bildon prilaboritan de s-ro John Huang (Huang Xiaolong), miaj okuloj iom malsekiĝis. La virino en la bildo tre similas mian patrinon. La bildo trafe reprezentis la scenon pri la maizoŝtelado fare de mia patrino.

En la tomba mallumo de la nokto, la pluvo torentis, kaj du ekbriloj de fulmo trakuris tra la malhela ĉielo. Kun plensako da maizoj surdorse, mia patrino malfacile vadis en la koto. Ŝia dorso iom kliniĝis sub la peza ŝarĝo, ŝiaj paŝoj ŝanceliĝis, ŝiaj vangoj sangostriiĝis kaj ŝiaj okuloj plenis je pezaj zorgoj kaj timegoj. Ŝi sin trenis antaŭen. En la malproksimo konturiĝis dometo, tra kies etaj fenestroj filtriĝis du oranĝaj lumfasketoj. Tio estis ŝia espero. Ŝi estis espero de mia tuta familio. Mia tuta familio atendis ŝian revenon ...

Mi kore dankas al s-ro John Huang pro tio, ke li prilaboris tiel belan bildon kaj enscenigis al mi belan memoron.

24a, julio, 2024

Titolo: Birdotimigilo
Filminto: Pipi
Verkinto: Pipi
Deklamanto: Pipi
Subtitolo: Z. Drakido
Produktoro: Z. Drakido
Asistantoj: Xiong Linping, Solis
Eldonistoj: John Huang,
Z. Drakido

Birdotimigilo

Fazanoj ofte enŝteliĝis en la kampon de Onklo Pan por beki grajnojn. Onklo Pan multe suferis de tio. Li starigis plusurson ĉe la kampo por fortimigi la fazanojn. Komence, pro timo al la plusurso la fazanoj ne kuraĝis proksimiĝi al la kampo. Post observado ili venis denove por beki grajnojn. Kaj ili eĉ sidiĝis sur la plusurso por ripozi. Tio terure kolerigis Onklon Pan. "Kion fari? Kion fari?" Onklo Pan diradis al si en la koro. Post nelonge, trafis lin lerta ideo — li ĉiam majstris pri eltrovaĵoj. Li faris el plastaj boteloj kaj ladpelveto birdotimigilon, kiu, pelata de la vento, turniĝadis kaj tintadis tage kaj nokte. Je tio, la fazanoj ne kuraĝis ĉei la kampon. Onklo Pan ja estas saĝa homo. Rigardu lian belan birdotimigilon! Ĝi estas tre amuza, ĉu?

7a, novembro, 2025

Hieraŭ kiam mi promenis sur la teraso antaŭ mia domo, mi renkontis la filinon de mia malnova amiko Onklo Pan. Mi salutis ŝin kaj demandis al ŝi kiel ŝia patro fartas. Ŝi kun ruĝaj okuloj diris al mi, ke ŝia patro mortis la 25-an de la lasta monato, en la aĝo de 82 jaroj. Tiu novaĵo surprizis min. Mi redemandis ŝin, kiel li mortis. Ŝi diris al mi, ke infarkto de la miokardio forrabis de li la vivon, ke li mortis sen doloro, ke liaj okuloj iom fermiĝis kaj rideto ludis ĉe liaj buŝanguloj kaj ke ŝi pensis ke li endormiĝis. Ĉe tio ŝi ne kapablis bridi siajn larmojn. Je tiu sceno mi sentis doloron en mia koro kaj miaj okuloj iom malsekiĝis. Ĉe la adiaŭo, mi konsolis ŝin, ke ŝi nepre moderigu sian doloron.

Antaŭ 10 jaroj mi konatiĝis kun Onklo Pan. Tiam li estis tre sana kaj babilema kaj ŝercema. Ni ofte babilis kaj ŝercis. Li ankaŭ estis tre laborema kaj ŝatis fari terkulturadon. Li havis parceleton da kampo sur la montodeklivo, en kiu li plantis arakidojn. Fazanoj ofte ŝtelis liajn arakidojn. Li faris el plastaj boteloj kaj ladpelveto birdotimigilon por fortimigi la fazanojn. La birdotimigilo tre efikis. Ĝi turniĝadis kaj tintadis tage kaj nokte. Pro tio la fazanoj ne kuraĝis ŝteli. Mi sentis la birdotimigilon tre bela kaj amuza. Mi filmis ĝin kaj petis s-ron Zhou Zhiqi produkti filmon.

Antaŭ 2 jaroj la sano de Onklo Pan ekŝanceliĝis. Li enfermis sin endome. De tiam mi ne vidis lin kaj nenion aŭdis de li.

Post kiam mi aŭdis pri lia morto, mi refoje spektis la filmon far s-ro Zhou Zhiqi. Vidante lian silueton laborantan en la kampo, mi sentis bedaŭron, ke li ne vidis la filmon. Ho, se li rigardus ĝin antaŭ sia morto! Ve, ve, ve! tio estas mia kulpo! Mi bedaŭras lin!

4a, februaro, 2025

Titolo: Ĉu vi kredas je sonĝoj?

Verkinto: Pipi
AI-ilustrinto: John Huang
Deklamanto: Przemysław Wierzbowski (Pollando)
Subtitolo: Z. Drakido
Produktoro: Z. Drakido
Asistantoj: Xiong Linping, Solis
Eldonistoj: John Huang, Z. Drakido

Ĉu vi kredas je sonĝoj? (Verkis Pipi)

Ĉiu spertis sonĝojn, ĉu bonajn, ĉu mavajn.

Ĉu vi kredas je sonĝoj?

Se oni demandas min, ĉu sonĝoj povas realiĝi, mi diros, ke jes, nur pli aŭ malpli frue.

Iun someran nokton de la jaro, kiam mi estis 12-jara, min trafis terura sonĝo.

Estas tagmezo. Premas la varmego. Estas nenia spiro de vento. Tuj post la manĝo, samkiel en multaj aliaj tagmezoj, mi forlasas la hejmon kaj marŝas al la rivereto ne malproksime de la vilaĝo, por lavi min.

Mi nudpiede vadas en la rivereto, trankvila kaj travidebla. Subite mi vidas, ke en la akvo kolektiĝas multe da misgurnoj, kiuj, kun brilaj okuloj, tre similaj al serpentoj, interimplikiĝas en futbale grandan bulon, kiu lante ruliĝas.

Ĉe tiu vido, grandpanike mi tuj returnas min kaj grandpaŝe pafas min en la direkton al la hejmo. Dume mi havas la senton, kvazaŭ la misgurnoj sekvus min. Ju pli mi volas peli miajn piedojn, des pli malfacile moviĝas la piedoj dronantaj en la mola sablo. Mi baraktas surloke dum longa tempo. Fine mi vekiĝas de laciĝo.

La postan matenon, mi kaj mia patro sarkis maizan kampon. Tre laca kaj langvora, mi sidiĝis sur platan ŝtonon rande de la kampo. Mi estas knabo denaske petolema, kun aktiva karaktero. Post iom da ripozo, mi renversis la ŝtonon, sur kiu mi ĵus sidis. Ekster mia atendo, sub la ŝtono koviĝis kavo, en kiu nestis etaj serpentoj, kiuj, intervolvitaj en formo de bulo, kun alte levitaj kapoj, senĉese siblis. Je tio, mia animo forkuris en la pinton de la piedo. Mi histerie vokis mian patron, tiel laŭte kiel mia voĉo kapablis: "Paĉjo! Paĉjo! Jen, jen! Serpentoj! Mi timas ilin!" Antaŭ ol mia patro ŝiris sin el la densaj maizoj, la serpentoj jam disiĝis en diversajn flankojn kaj vanuis en dense kreskantajn herbojn. Mi eksplodis per larmoj kaj sagis renkonte al mia patro ...

Tiu ĉi rakonto estas absolute vera. Mi ne mensogas. Se mi dirus mensogon, mi estus via nepo.

Pasis multaj jaroj. Mia sonĝo kune kun la serpentoj sub la ŝtono estas stampitaj por eterne en mia memoro. Kion vi pensas pri mia sonĝo kaj la serpentoj?

Ĉu tio estas nur hazarda renkontiĝo? Ekde tiam mi kredas sonĝojn, el kiuj, laŭ mi, unuj eble promesas favorajn aŭgurojn kaj aliaj eble sinistrajn.

4a, majo, 2015

Atendado de leporo

En la antikva tempo estis kampulo. Iun tagon, kiam li laboris en la kampo, li subite vidis, ke leporo elkuris el la arbaro, frapis sian kapon kontraŭ la arbostumpon ĉe la kampo, kaj mortis sen ajna kaŭzo.

Li tuj kuris tien kaj senpene havigis al si grandan kaj grasan leporon. Kiam li iris ĝoja hejmen, li diris al si en la koro: Kiel bone estus, se mi povus akiri leporon ĉiutage!

Depost tiu tago, la kampulo formetis la sarkilon kaj faris nenion alian ol sidadi apud la stumpo la tutan tagon, atendante kaj esperante ke plia leporo alkuros kaj morte frapiĝos kontraŭ la arbostumpon . Tagon post tago neniu leporo alvenis, dum lia kampo pleniĝis je sovaĝaj herboj kaj la grenplantoj tute morte velkis.

1a, majo, 2015

Pasero (Verkis Turgenev; Esperantigis Pipi)

Mi iris hejmen sur aleo post ĉasado, kun mia ĉashundo kuranta antaŭ mi.

Subite mia ĉashundo malrapidigis siajn paŝojn kaj senbrue iris antaŭen, kvazaŭ flarsentante ian ĉasaĵon.

Vento forte skuis apudvojajn platanojn. Direktante la okulojn antaŭen laŭ la avenuo, mi vidis paseridon stulte staranta surtere kaj senhelpe batanta per siaj delikataj flugiloj. Kun helflavaj bekoanguloj kaj lanugoj surverte, la paserido evidente estis ĵus elkovita birdideto, falinta el nesto.

Post alŝteliĝo al la paserido, la ĉashundo ekflaris ĝin kaj malfermis la buŝegon nudigante la akrapintajn dentojn. Senatendite, plenkreska pasero kiel ŝtono ĵetis sin de sur la arbo antaŭ la ĉashundon. La plenkreska pasero ekhirtigis siajn ĉiujn plumojn kaj eligis malesperajn akrajn kriojn.

La plenkreska pasero perkorpe ŝirmis la paseridon por savi ĝin, sed ĝi tutkorpe tremadis kaj eligadis raŭkajn kriojn pro nervozo. Starante rigide, ĝi sin pretigis lukti kontraŭ la ĉashundo. Kiel grandega monstro estis la ĉashundo en la okuloj de la plenkreska pasero! Tamen ĝi ne povis trankvile kaj senzorge resti staranta sur la alta branĉo for de la danĝero. Pelata de granda forto, ĝi flugis malsupren.

La ĉashundo mirstultiĝis. Probable ĝi ne atendis ke la plenkreska pasero estis tiel kuraĝa, kaj iom post iom retropaŝis.

Je tio, mi tuj revokis mian ĉashundon, kaj kondukis ĝin for. ◆

Regulardo de la Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” (2026)

Sub aŭspicio de UEA kaj kunlabore kun la redakcio de Literatura Vivo

•**Celo:** Honori la memoron de prof. Vejdo (Wei Yida) kaj stimuli altkvalitan tradukarton en Esperanto.
•**Organizo:** Oficiale rajtigita de UEA kaj kunorganizata de *Literatura Vivo*.
•**Partoprenantoj:** La konkurso estas malferma al ĉiuj esperantistoj tra la mondo.
•**Verkoj:** Akceptiĝas propraj tradukoj el **iu ajn nacia lingvo** en Esperanton. Ĝenroj inkluzivas poezion, mallongan prozon, rakontojn/mikro-novelojn, kantotekstojn, kaj artikolojn/eseojn.
•**Kondiĉoj:**

- Maksimuma longo estas **1500 vortoj** po verko.
- Nur **manfaritaj tradukoj** estas akceptataj; tradukoj faritaj de artefarita intelekto (AI) ne estas konsiderataj.
- Ĉiu partoprenanto rajtas sendi maksimume **du verkojn**.

•**Sendado:** Verkoj devas esti senditaj al **info@literaturavivo.com** ĝis la limdato: **1-a de aprilo 2026**.
•**Ĵurio:** Konsistas el spertaj esperantistoj kun kompetento en literaturo kaj tradukarto, reprezentantaj diversajn naciajn lingvojn (angla, franca, hispana, rusa, ĉina, portugala, itala, hungara, pola).
•**Premioj:**

- Unua premio (1 gajninto), Dua premio (3 gajnintoj), Tria premio (10 gajnintoj).
- Konkretaj premioj estas provizitaj de UEA.

•**Rezultoj:** La fina rezulto estos publikigita dum la **111-a Universala Kongreso de Esperanto** en Graz, Aŭstrio, en julio 2026. Elektitaj verkoj aperos en la revuo *Literatura Vivo*.
•**Rajtoj:** La organizantoj rajtas publikigi la premiitajn aŭ elektitajn verkojn kun plena mencio de la aŭtoro kaj tradukinto.

En nomo de la redakcio de Literatura Vivo kaj UEA, ni kore invitas ĉiujn esperantistojn partopreni! contact: info@literaturavivo.com